



Popularaj bildoj de sankta Antono abato

VIVO DE LA BEATA ANTONO (la granda)

LETERO DE ATANAZIO
Ĉefepiskopo de Aleksandrio
(al la monaĥoj de fremdaj landoj)

El la greka esperantigis Armando Zecchin
Kun reviziado de Silvia Garnero

ANTAŬPAROLO

Por pli certa kompreno de la nuancaro de la antikva helenlingvo helpis min la kritike prizorgita traduko de M. Bartelink por la serio “Sources Chretiennes” (n. 400) en Athanase d’Alexandrie, Vie d’Antoine. Les éditions du Cerf, Paris, 1994; la disdivido laŭĉapitre sekvas la francan version de la sama Bartelink. Helpis kaj komfortis ankaŭ la itala traduko de Paŭla Savio, amatore presita ĉe la Torina Didaskalejo -1998.

Tiu ĉi Vivo de Sankta Antono ĝuis ĉiam popularecan disvastiĝon per du versioj al la latina; unu el tiu hazarde alvenis tramane, instige de du imperiaj funkciuloj de Treviro (kiuj fine sin monaĥigis), de Sankta Aŭgusteno, kiu ĝin laŭdis kaj plidisvastigis.

Atanazio verkis tiun «Vivo» eble en la jaroj 357-358, eble tujpost la morto de Antono (je 105 jaroj!). Kial li verkis tiun ĉi “Vivon”? En la enkonduko estas klare deklarete: por kontentigi monaĥaron de la okcidenta eklezio kiu de li, kiel atestanto sur la loko, petis informojn pri la jam famigita ermito Antono.

Krom en la latina, la VIVO estis tradukita al diversaj orientaj lingvoj (kopta, etiopia, siria, asiria, gruzuja...), sekurigante al la sanktulo, kies liturgia jara festo de la deksepa de Januaro celebras la glorajn agojn, popularecon kiu daŭras ankaŭ nun: patrono de Napolo kaj de diversaj landoj kaj urboj, protektanto de malsovaĝaj bestoj (en lia festotago kelkloke viglas ankoraŭ la kutimo de la beno por bestoj), alvokata kontraŭ la Zostero (populare, la fajro de sankta Antono), reprezentata kun piedapude fidela porketo (sankta Antono de l’ porketo¹), fariĝis ankaŭ la protagonisto de legendaj interpretoj je klera nivelo: sufiĉas rememori la pentraĵojn de la XVI jarcento de Hieronimo Bosch kaj, de la XVIII, la prozan poemeton de Gustave Flaubert titolitan “La tentoĵ de sankta Antono”.

Sed Sankta Antono estis persono firme historia, kaj tiu ĉi biografio, superante la intencon de la aŭtoro propagandi sian kontraŭherezan agadon, lin bildigas per surpriza freŝeco. Lia vivmaniero, soleca sed ne mallaborema², kaj kiu ne rifuzas kontaktojn kun la “ekstera” mondo, estas karakterizita per senartifika sereneco (“La Sinjoro neniam kreis ion malbonan”. n. 22) kaj bonhumoro

¹ Eble pro tio la monaĥoj, kiuj celis sin kondukti laŭ lia ekzemplo - nome la Ordeno de Antonanoj, plimalfrue asociigita al la Ordeno de Malto en 1777 - kutimis kreskigi porketon por la najbaraj senbienuloj. Tamen svarmis ankaŭ aliaj interpretoj.

² Li interplektis palmajn foliojn kaj per tiuj faris korbojn: labora aktivado ofte elstarigita en la monaheca literaturo. Li krome semis kaj kultivis legomojn donacotajn al siaj vizitantoj lacigitaj pro la pena ascendo. Ĉiuj rezidejoj iom post iom laŭeble tion imitis jen pro ekonomiaj motivoj jen por varii okupiĝojn.

("Ĉiu aĵo en tiu ĉi mondo vendiĝas je la ĝusta prezo kaj oni liveras iun aĵon interŝanĝe kun alia je la sama valoro: la promeso, male, de la eterna vivo elaĉetiĝas per malmulto". n. 16). Tiu homo, vivinta en dezerto, "ne havis krudajn manierojn, sed anstataŭe li estis ameblo kaj sociema". n. 73) kaj "traktis ĉiujn ameblojn" (n. 81). Li ardis pro la deziro vivi solece ("Kiel fiŝoj mortas restante longatempe sur sekigita tero, tiel la monaĥoj, kunparolante kaj malfruante ĉe vi, febliĝas.". n. 85), sed li kutimis interveni por "defendi la suferantojn pro maljusteco tiamaniere, ke ŝajnis, ke la suferanto estu li mem". n. 87).

El ĉio tio, tial, oni komprenas lian popularecon: leganto trovas en sankta Antono abato aŭ la granda (tiel kutime nomata por lin distingi el aliaj sanmonaj sanktuloj, aparte sankta Antono el Padovo) homon proksima al la suferanto, kaj do sanktulo kiun li povas ricevi kiel modelon de vivo (laŭ la celo kiun ĉiu hagiografo sin proponas); kaj samtempe liaj eksterordinaraj taŭmarturgaj povoj kontentigas la deziron de mirindo kiu sin tiklas ĉiun homon.

Se la hodiaŭa leganto emas senti ian ĝenon antaŭ la abundo de miraklecaj epizodoj atribuitaj al la sanktulo kaj la ofteco de liaj, eĉ fizikaj, luktoj kontraŭ la diablo, mem konsciigu unuaflanke, ke la aŭtoro faras cedojn al la legendeaj elementoj kiuj akompanis kaj ĉirkaŭis jam dumvive la faraĵojn de Antono kaj ke tia hagiografia procedo adheris al la gustoj kaj al la pensmaniero de siatempa meza leganto (al kiu Atanazio celis adresiĝi), kaj aliflanke, ke absolute nura tipfolkloro eksplikoj pri tiaj faktoj ne plene atentus pri sperto kiu igas Antonon la sekvanto de tiu Kristo kiu estis promesinta al siaj disĉiploj, ke Li koncedu al tiuj ĉion kion ili petos en lia nomo kaj ke ili havos povon sur la diablo.

La moralajn kaj religiajn kaj homecajn kvalitojn de Antono hodiaŭ onihagiografus alimaniere kaj alistile: tamen ili, kaj tio estas la plejefika celo de la verko, splende brilas kaj altiras.

Ĉu Antono estis la unua en la dezerto? Laŭ ĵusaj studoj kaj arkeologiaj malkovroj, precipe en la Sinaja zono, hodiaŭ oni konvinkiĝis, ke jam en la epoko de Konstateno kaj antaŭe dum la lastaj persekutadoj ekfloris ermitejoj Antono sendube donis gravan impulson kaj reguligon al la soleca monaĥa vivo.

La leganto kiu emas mallevi la okulojn por legi ankaŭ la piedpaĝajn notojn, ne forgesu, ke foje la bibliaj citaĵoj pli aludas ol ĉerpas.

Pri sankta Atanazio

Li, naskiĝinta en Egiptuja Aleksandrio en 295, alkalkuliĝas inter la plej dramaj kaj influaj personoj en la vasta gamo de la Ekleziaj Patroj. Episkopigita, por Aleksandrianaj fideluloj tujpost la Nicea Koncilio (325), li estis ege kontrasta de Arianoj, kiuj malgraŭ la Nicea kondamno kontraŭ arianismo, provis subfosi

la ortodoksion. Ili sukcesis altiri al sia kaŭzo, dum certaj momentoj, eĉ la imperiestrojn Konstantenon, Konstancon, Julianon kaj Valenton, kiuj pretendinte sugestis kristanajn kredinderojn, sendigis, aŭ lin devigis, Atanazion al ekzilo. Sed Atanazio ĉiuloke, kaj vorte kaj verke, adheris kaj adherigis al kredo laŭ kiu Jesuo estas, ja jes, persono malsama el la Patro, sed je la sama naturo kaj, do, je samdigno. La ariana doktrino ŝajnis pli facila kaj akordiĝebla kun la paganaj religioj kaj pli akcepteblaj ĉe la diversaj kulturoj. Sed Atanazio montris, preninte el la Skriboj kaj Tradicio, ke la dieco de Kristo estas esenca kaj kunnatura en kristanismo.

Lia hardita karaktero de luktanto lin portis batali lancvorte kontraŭ kontraŭuloj, eĉ kontraŭ la imperiestroj, foje de li signataj per farsaj serĉnomoj, “Min komfortas la devo min defendi”; kaj tio vidiĝis kiam, kulpigita mortiginti la episkopon Arsenion, kiu poste aperis viva kaj vigla, ardigis lian ŝercervan stilon. Foje liaj fuĝoj havas ion rokambleskan kaj originis tutan anodiktaron.

Li pasis la du (estis entute almenaŭ ses) lastajn ekzilojn en la dezerto inter la monaĥoj, kie skribis historion pri la Ariana Movado, bedaŭrinde hodiaŭ grandparte perditan. Dum la nevolaj vagadoj li estis ankaŭ en Okcidento, en Romo, en Treviro, kie li konigis la egiptan monaĥismon kiel vivstaton organizitan laŭmaniere tute originalan en la dezerto, prezentante la idealan monaĥon, en la fascina figuro de anakoreto, Sankta Antono, pri kiu li verkis la celebritan Vivon, kiun oni povas konsideri apartan specon de manifesto de monaĥismo

Se li mortis ekzilita, lia engaĝiĝo por protekti la Nicean kredon trovis la konsenton, kiu ne povis manki, ĉe la roma eklezio kaj ĉe la fideluloj, iluminitaj ankaŭ de liaj klerigaj instigoj, fine fruktis kaj la kristana mondo, kiu unuaaspekte ŝajnis tute arianeca, vekiĝis denove katolika.

Armando Zecchin

ENKONDUKO

Bonan konkuron vin entreprenis kun la ermitoj de Egiptio, celante mem egaliĝi al ili aŭ eĉ ilin superi per via askezo sin proponanta la atingon de la virto. Kaj fakte, eĉ ĉe vi troviĝas loĝejoj por soleculoj kaj la nomo “monaĥoj”³ ricevis rajton de komuna uzado. Sendube, tia propono meritas laŭdon, kaj Dio volu ĝin porti al plenumiĝo pro viaj preĝoj.

Sed pro tio, ke vi enketis ankaŭ ĉe mi pri la vivmaniero de la beata Antono, kun la volo lerni kiel li ekis la askezan vivon, kiu li estis antaŭ ol sin dediĉi al tiutipa vivo, kiel li finis sian vivon kaj ĉu la rakontaĵoj pri li respegulas la veron, por ke vi mem povu lin imiti, mi arde konsentis kun via peto. Ankaŭ por mi fakte estas granda gajno eĉ la nura rememoro pri Antono. Kaj mi scias, ke ankaŭ vi, kiuj pri li jam aŭdis preparolantojn, krom miri pri la homo, volus imiti lian stilvivon. Fakte la vivo de Antono estas, por monaĥoj, taŭga modelo cele de askezo. Tial, ne malkonfidu pri kio aŭdita pri li flanke de disvastigantoj, sed prefere pensu, ke vi ricevis malmulton de ili, ĉar ili hezitis rakonti multon.

Tial, ankaŭ mi, spronita de vi, sendas al vi, el inter miaj memoraĵoj pri li, la malmulton kio eblas komuniki per letero. Sed vi ne ĉesu demandi tiujn kiuj el tie ĉi transmaras. Verŝajne fakte, kvankam ĉiu preparolu kion li scias, malfacile oni kapablas lin memori laŭ la dignece de la objekto. Tial, tujpost la ricevo de via letero, mi ekdeziris sendi venigi ĉe min iujn monaĥojn kiuj plejofte kutimis travivi proksime de li. Eble, lerninte ion plian pri li, mi povintus verki pli komplete.

Sed, ĉar la tempo oportuna por la navigado forpasadis kaj la mesaĝisto havis urĝon, ĝuste pro tio mi engaĝiĝis skribi al Via Pieco jen kion de mi persone spertitan (fakte mi lin ofte renkontis) jen kion al mi sciigitan de tiu kiu lin sekvis ne laŭ malmulte da tempo kaj verŝis la akvon (= familiariĝis) sur lian manon, serĉinte nur pri la vero por ke, kiu multe aŭdis, ne malkonfidu, kaj kiu, male, aŭdis malpli ol necese, ne malŝatu tiun homon.

1. *Naskiĝo kaj junaĝo de Antono*

Antono estis naskiĝe egiptano, de gepatroj nobelaj kaj posendantaj riĉaĵojn konsiderinde grandaj. Ĉar ili konfesiis kristane, ankaŭ ilia filo estis edukita kristane.

³ Ĉi tie, kaj en la tuta verko, la termino “monaĥo” havas apartan signifon: tiam, en la dezerto solaca unuopulo vivis vere solece kiel la greka vorto “monos” indikas. Nur poste, kaj precipe en Okcidento, “monaĥo” akiris la signifon de vivo en monaĥejo kie la religiuloj vivas kune. Kvankam en la dezerto, tie ĉi parolata, oni vivis najbare aŭ apude, ĉiu el ili havis sian apartan loĝejon kaj travivadis tute *solece*.

Ĝis la fino de la unua infanaĝo, li estis kreskigita ĉe la gepatroj, spertante do nenion alian ol ilin kaj sian domon. Sed kiam, kreskiĝinte, li atingis la plenaĝan infanecon, li ne plu eltenis, por eviti disipigan familiarecon kun aliaj infanoj, kolegiane viziti lernejon. Ununura lia deziro estis loĝi en sia domo en tuta simpleco, laŭ kio skribita⁴.

Tial, li havis okazon rekuniĝi kun siaj gepatroj en la domo de la Sinjoro; kaj ne travivis senpripense dum infanaĝo, nek sin montris aroganta dum adoleskaĝo, sed estis submetita al siaj gepatroj kaj, atentigante pri la legitaĵoj, li konservis ene de si mem la gajnon kiun el ili devenis. Krome, kvankam vivante en bona financa situacio, infanaĝe li ne ĝenis la gepatrojn por havigi al si nutraĵojn variajn kaj riĉultablajn, nek serĉis la plezuron kiun la nutro povas doni, sed kontentis je tio kion li trovis ĉetable kaj ne serĉis ion plian.

2. La evangeliuj vortoj pri la perfektigo lin altiras al la konvertigo

Post la morto de la gepatroj, li restis sola kun unu fratino ankoraŭ etulino; li havis proksimume dekok aŭ dudek jarojn kaj ne disdegnis prizorgadi jen pri la domaj farenaĵoj jen pri la fratino.

Ne jam pasis ses monatoj disde la morto de la gepatroj kaj, dum irado al domo de la Sinjoro kiel kutime, li ekmeditis konsiderante kiel la apostoloj, forlasinte ĉion, sekvis Jesuon, kaj kiel aliaj, laŭ la rakontaĵo de la Agoj de la Apostoloj, “vendante” siajn posedaĵojn, la enspezon portis kaj deponis ĉe la piedoj de la apostoloj por helpi la bezonantojn, kaj (konsiderante) pri kia kaj kiomgranda espero estas rezervata por tiuj ĉi en la ĉielo.

Enplektiĝinte inter tiaj pensoj, li eniris preĝejon kaj okazis al li, ke tiam estis legata evangelio, kaj aŭkultis la Sinjoron dirantan al la riĉulo: “Se vi aspiras al la perfektigo, iru, vendu ĉiujn viajn posedaĵojn kaj ĉion donu al la malriĉuloj, kaj poste servu min kaj havos trezoron en la ĉieloj”⁵. Tiam Antono, kvazaŭ venus el Dio mem la rememoro pri la sanktuloj kaj kvazaŭ la legaĵo estus farita ĝuste por li⁶, tuj elirinta el la domo de la Sinjoro, donace transdonis al la loĝantaro de sia vilaĝo la bonaĵojn havitajn de la geavoj (li posedis tricent “arurojn” je grundo fruktema kaj optimkvalita, nome ‘kvardek etarojn’), tiel ke ili neniel estus kaŭzo de malkvietigo por li kaj lia fratino. Post vendado de

⁴ Laŭ iamaj komentistoj, kiel ekzemple Filono, la patriarĥo Jakobo, ĉi tie aludita, estis konsiderita homo “*simpla*” dum la frato Esavo homo “*malobea kaj maljusta*”. Rilate “instruiĝi kaj studi ĉedome” estis nemalofta tiama kutimo.

⁵ Mt 19,21.

⁶ La motivo de la konvertado aŭ de la religiula vokiteco, okazanta sekve de hazarda lego aŭ aŭskulto de bibliaĵo, estas toposo (komuna diro) en la kristana literaturo. Tiaj estis la origino de la konvertado de sankta Aŭgusteno, kiu ne forlasas trovi similecon inter la sia kaj tiu de Antono (Konfeso VIII, 12).

ĉiuj ceteraj moveblaj posedaĵoj kaj akirinte sufiĉe da mono, ĝin distribuis al povruloj, ne forgesante reteni nemulton por la fratino.

3. *Komenco de la askezvivo*

Sed ĵuse enirinte la domon de la Sinjoro, aŭskultis el la evangelio la Sinjoron dirantan: “Ne maltrankviliĝu pro la morgaŭo”, ne plu eltenante la malfruon, li eliris el la preĝejo kaj ekdistribuis al la povruloj ankaŭ la restaĵon konservitan.

Post kiam li konfidis la fratinon al konataj kaj fidindaj virginoj, kaj konfide ĝuste pro tio, ke ŝi edukiĝus al estimo de la virgeco, li, ne prizorgante alion, sin ekdediĉis al la askezo senŝirme restante mediteme antaŭ sia loĝejo. Fakte, en Egiptio jam ne estis porsoleculaj loĝejoj sufiĉe nombraj, kaj la monaĥaro (soleculoj) neniel jam sperte sciis pri la granda dezerto; sed ĉiu el tiuj kiuj celis mediti sin ekzercadis unuope ne malnajibare de sia vilaĝo.

Estis tiam en najbara proksima vilaĝo maljunulo, kiu ekde la unua junaĝo sin ekzercadis en solecula vivo⁷. Vidinte tiun, Antono provis lin virte rivali en la bonagado. Dekomence ankaŭ li ekrestis najbare de sia urbeto, kaj el tie, se estis aŭdite pri iu kelkeloke fervorulo⁸, kiel saĝa abelo⁹ li iradis lin serĉi kaj revenis al sia loko nur post renkontiĝo kun li, kaj estis kvazaŭ li el tiu ekipe proviziĝis por la marŝado en la direkton de la virto.

Tie, do, unuatempe, li trejnadis sian animon por eviti realkrociĝi al la bonaĵoj de la geapatroj kaj al la rememoro pri sia parencaro, sed por direktigi tutan sian dezirforton kaj tutan sian ardemon al la intenseco de la askezo. Li laboris per siaj manoj, aŭdinte: “kiu ne laboras ne manĝu”. Kaj unu parton li elspezis por la pano, la alian por la bezonuloj, Kaj li preĝadis daŭre ĉar li ellernis, ke nepras preĝi private¹⁰ en sia animo seninterrompe¹¹. Fakte li tiel atentis legaĵojn, ke nenio el la Skriboj faladis teren, sed li retenis ĉion¹² kaj, do, la memoro tenis en li la postenon de libroj.

⁷ Evidente Antono ne estis la unua: fakte praktikantoj de Askezo, laŭ tiutempaj atestoj, jam floris diversloke en Egiptujo.

⁸ Per tiu vorto (el helena spudaios signifanta adplena aŭ fervorplena) fariĝos la teknika termino en la kristana literaturo por indiki personojn kiuj praktikis askezon por gajni la virton.

⁹ Tiu figuro oftas en la kristana literaturo kaj eĉ en samtempa pagana. Per tiu metaforo Sankta Bazilio, ekzemple, instigas siajn adresitojn profiti de la trezoroj de la pagana saĝo nur tion kio konformas al la vero same kiel faras abeloj kiuj el determinitaj floroj eltiras nur tion kio utilas por sia laboro. Laŭ la paso de la tempo kristanoj ĉiam pli malkovros kaj akceptos homajn valorojn de la pagana kulturo, kiuj tamen jam fontantajn el la sama kristanismo. Ĉio tio videblas en diversaj Sanktapatraj verkoj.

¹⁰ Mt 6,6.

¹¹ Ts 5,17

¹² Lk 8,15

4. *Antono enprofundiĝas askezen imitante la virtojn de aliaj soleculoj*

Do, lerniginte sin mem tiele, li estis amata de ĉiuj. Li mem sincerece sin surmetiĝadis al la fervoruloj, ĉe kiujn li iradis, kaj el si mem instruiĝis pri la grandvaloro de la fervoro kaj askezo de unuopa vizitito. Kaj kontempladis la ameblecon de unu kaj la strebon al preĝo de alia, de tiu rimarkadis la nuliĝon de koleremo, de la alia la amon al la homoj; li direktadis sian konsideron jen al la viglemulo jen al la studemulo¹³; li admiradis unu pro ties firmeco, alian pro ties fastoj kaj surgrundaj dormoj; li observadis la mildecon de unu, kaj animlarĝecon de la alia: el ĉiuj senescepte li notadis la piecon al Kristo kaj la reciprokan amon.

Kaj tiel, plenpleniĝinta je instruoj, li revenis al sia loko pretigita por praktiki askezon, poste, siaengage, kunigante ene de si mem la instruadojn lernitajn ĉe ĉiu el ili, engaĝiĝis ĉion tion igi kutimon en siaj ĉiutagaĵoj. Fakte, li malemis disputi kun siaj samaĝuloj, se ne por ne sin montri dua al ili en la plej virtaj aferoj. Kaj, tion farante, klopodis ne suferigi iun ajn, dum, male, engaĝiĝis por ke ili ĝoju pro li.

Do, ĉiuj siaj vilaĝanoj kaj ĉiuj honestaj personoj kun kiuj li konfidence konatiĝis, tia lin vidinte, lin nomadis “teofilo” (= amanto de Dio); kaj unuj montradis amon al li kvazaŭ al filo, la aliaj kvazaŭ al frato.

5. *La diablo tenace baraktas por ke li rezignu la askezan vivon.*

Sed la diablo, malamiko al ĉiu bono kaj enviema, ne eltenis konstati en junuleto tian proponon, sed sin pretigis por agi kontraŭ li laŭ sia kutima konduto. Kaj unue provis konvinki lin ŝrumpi rilate la askezan vivon, aspektigante antaŭ liaj okuloj la memoron pri proprajoj rezignitaj, la devoj rilate la fratinon, familiaj ligoj, graveco de la mono, belo de famo, plezuro de varispecaj nutraĵoj kaj allogantaj vivtravivaĵoj kaj, laste, pri la krudeco de la virto kaj ĉefe malfacilaĵoj por ĝin atingi; li instigis konsideron pri la febleco de la korpo kaj la longdaŭro de la tempo. Sume, celante deŝiri tian homon el la honesta decido, tiu naskigis en li grandan mueladon de duonduboj.

Sed la malamiko, kiam sin vidis senpova antaŭ la firmeco de Antono kaj venkita de lia kredo kaj submetita pro lia konstanta preĝado, tiam, konfidinte en la armiloj kuŝantaj ĉe la umbeliko¹⁴ kaj pro ili sin glorante (tiaj fakte estas liaj unuaj embuskoj kontraŭ junuletoj), avancis kontraŭ la junuleto, lin malkvietigante

¹³ Studumo pri *biblio*. Fakte, en la kristana medio la helena termino ĉi tie uzata *filologeîn* praktike tiam jam akiris la specifan sencon de “legi, studi la biblion”

¹⁴ Tiu esprimas kiu povas rilati jen al la voremo jen al la voluptamo, referencas al Ijob 40,15, en kiu estas priskribita la sovaĝa forto de monstro kiun nur Dio povas submeti. Tia monstro, kiu en la koncerna biblia teksto identiĝas kun hipopotamo, estas dirata en la hebrea *behemot* kaj povas indiki la bestion aŭ bruton antonomazie, nome Satano mem.

dumnokte kaj ĝenante dumtage, tiel ke ankaŭ lin renkontantoj sense perceptis la batalon okazantan inter la du.

Fakte, unu ade inspiris sordidajn pensojn kaj la alia ilin reĵetis per la preĝo Tiu solecitis, sed tiu ĉi sentante, se diri tiel, ruĝiĝon, ade fortikigis sian korpon per kredo kaj fastoj. La diablo, ja malŝatinda, mizere adaptiĝis jen al aspekto, dumnokte, de ornamita virino jen tiun ĉi koketigi ĉiumaniere, nur por trompi Antonon. Sed tiu ĉi, havante Kriston en sia koro kaj prikonsiderante la noblecon kaj raciecon, enokulitajn de Dio, de la animo, ade malfajrigis la ardan karbon de lia trompo.

Kaj denove la malamiko reprovadis lin sugestii per la dolceco de la vivplezuroj, sed li, kvazaŭ koleriĝinta kaj ĉagrenita, revenigadis al la menso la fajrminacon kaj turmenton de la verno¹⁵; kaj oponante per tiuj pensoj, li sukcesadis sendanĝere superi tiujn pruvojn, kiuj estis ĉiuj hontecaj fiaskoj por la malamiko

Tiu ĉi fakte, kiu intencis sin fari egalan al Dio, ĉi-cirkonstance estis primokata de junuleto. Ĝuste li, kiu mem sin gloris per la kapablo submeti la karnon kaj la sangon, estis retropusŝita de ulo revestita je karno. Kun tia homo, fakte, ade kunlaboris la Sinjoro, nome tiu kiu por ni enkarniĝis kaj donis al la korpo la venkon kontraŭ la diablo, tiel ke ĉiu el tielaj batalantoj diru: “Tamen ne mi, sed graco de Dio kiu estis kun mi”¹⁶.

6. La diablo al li aperis subforme de nigra infano

Ĉe la fino, tial, ĉar la drako¹⁷ ne sukcesis submeti Antonon per la jam priskribitaj artifiko, male eĉ li sin sentis forigita el lia koro, dentgrincante (kiel oni jam tiel metaforis) kaj kvazaŭ eksterigante el si mem, sin manifestas al li ankaŭ malene kia li vere estas en sia eno, aspektiĝante nome subforme de nigra infano. Kaj preskaŭ adorsterniĝante antaŭ li, lin ne plu atakis per penssugestioj (la trompanto fakte estis jam venke reĵetita), sed nun, sin servante je homa voĉo, siblis: “Mi trompis multajn kaj multegajn faligis, male nun, malgraŭ la uzo, kontraŭ vi kaj viaj ŝirmoj, de la samaj artifiko jam uzitaj kontraŭ aliaj, mi restis senpova”.

Kaj kiam Antono lin demandis: “Kiu estas vi, kiu babilaĉas tiaĵojn kun mi?”, tiu elmetis aĉajn vortojn: “Mi estas la kuraĝiganto de la prostituado, mi engaĝiĝis en la arto de la embuskoj por altiri al ĝi kaj ties tikletadoj, kaj pro tio mi estis kromnomata ‘spirito de prostituado’¹⁸; celintojn al sobreco mi altiris al trompiĝo; mastrintojn de si mem mi allogis al opiniŝanĝo per miaj sugestioj. Kaj mi estas tiu pro kiu la profeto riproĉis la falintojn dirante: «vi estis devojigitaj

¹⁵ Iuĝ 16,17; Jes 66,24; Mk 9,48; Prd 7,17

¹⁶ 1 Kor 15,10

¹⁷ Tiel estas nomata la diablo en la hebrea tradicio. Vidu ankaŭ, ekzemple, Ap 12,3ss.

¹⁸ En la helena πορνεία (= porneia) havas ankaŭ la signifon de malfideleco al Dio. Interalie, tio videblas ankaŭ en Oseo 4,12.

subpuŝe de la spirito de prostituado». Fakte estis mi ilia faliganto per krurhoko. Mi estas kiu vin multfoje turmentis, sed kiu samfoje estis venkita de vi”.

Antono, tiam, dankinte la Sinjoron kaj kuraĝiĝinte kontraŭ tiaulo, reagis: “Vi estas vere malŝatinda: vi nigras en la animo kaj feblas kiel infano; pro tio mi neniel timas pro vi; «La Sinjoro fakte estas mia helpanto kaj mi malŝatos miajn malamikojn»¹⁹ “.

Tion aŭdinte, la nigraĉulo tuj forfuĝis terurita pro tiaj vortoj timante eĉ al li alproksimiĝi.

7. Antono pliintensigas sian askezulan vivmanieron

Tiu estis la unua batalo de Antono kontraŭ la diablo, aŭ en prefere ekestis en Antono la sukceso de la Savinto “kiu kondamnis la pekadon en la karno, por ke la postulo de la leĝo plenumiĝu en ni iradantaj ne laŭ la karno sed laŭ la spirito”²⁰.

Sed Antono, malgraŭ ke la diablo inkliniĝis al liaj piedoj, ne pro tio ĉesis kontraŭbatali aŭ orgojliĝis, nek la malamiko, kvankam venkita, rezignis teksu trompojn. Denove, fakte, lin ĉirkaŭiris kiel leono serĉanta revanĉan okazon. Sed Antono, jam lerninte el la Skriboj, ke multas la insidoj de la malamiko, intense praktikis la askezon konsiderante ke, se tiu ne iam havis forton trompe eniri lian koron per la korpaj logaĵoj, sendube provus lin embuski per alia artifiko, ĉar propras al la diablo esti amanto de la peko.

Tial Antono ĉiam pli “kontuzis krude sian korpon kaj ĝin sklavece submetis”²¹ por ne esti malsupren trenita en kelkaj kazoj, malgraŭ la venko en aliaj. Li, do, decidis kutimigi sin al pli severaj vivnormoj.

Kaj multaj miris, sed li eltenis sufiĉe facile la penon. Fakte, la anima ardo, kiu en li jam firmiĝis laŭ longa tempo, kreis en li kutimon²²: tiel ke se homoj prezentis eventualan motivon, eĉ malgrandan, li montris tutan sian fervoron en tio. Li vigladis tiom intense, ke li pasadis la tutan nokton sendorme, Kaj tion li faradis ne unufojon, sed la plejparto de la noktoj, li eĉ pro tio estis objekto de admiro. Kaj li sin nutradis unufojon dumtage kaj postsunsubire, plurfoje okazis, ke li tuŝis manĝaĵon nur ĉiudutage, ofte eĉ ĉiukvartage.

Lia sola nutraĵo estis pano kaj salo kaj lia sola trinkaĵo akvo. Pri viando kaj vino superfluas eĉ paroli, ĉar eĉ ĉe la aliaj tiel zorgantaj kutimiĝis tiaĵoj. Por la

¹⁹ Ps 117,7. La Malamikon, t.e. la diablo, oni kutimis vidi simbolata en la serpento de Genezo 3.

²⁰ Rm 8,3-4.

²¹ 1 Kor 9,27

²² La helena ἔξις (=éxis) respondas al la latina *habitus*, *habitus*, en la senco de kutimo kiu kreas “veston”, nome karaktero kun etika kutimo konstituanta la saman esencon de la moraleco. Ne forgesendas, ke laŭ stoikulo Epiteto se iu volas bone fari iun aĵon, nepras kutimiĝi ĝin fari per plurfoja ripetado. Kaj ĝuste el la ripetado naskiĝas, en stoikuloj kaj en kristanoj, la regado sur la pasioj,

dormo li estis kontenta je eta mato, sed plejfoje li kuŝadis sur la nuda tero. Li rifuzis sin ungi per oleo, asertante, ke por junuloj prefereblas arde praktiki la askezon anstataŭ serĉi aferojn kontentigantajn la korpon, por tiun ĉi kutimigi al penaj streĉoj, memorante la apostolan diraĵon: “Kiam mi estas malforta, tiam mi estas forta“. Kohere kun tio, fakte, li ripetadis, ke la anima inteligento fortas kiam la korpa plezuremo malfortiĝas.

Li traremaĉis ankaŭ tiun penson vere eksterordinaran: la vojo al virto kaj apartiĝo el la homara mondo ne estas akiritaj per la tempo travivita sed per la deziro kaj voldecido. Li mem, do, ne retenis memoron pri la tempo kiu jam pasis, sed tagon post tagon, kvazaŭ li komencus nun la askezan vivon, plenumadis pliintensan klopodon, daŭre prezentiĝante al si la Paŭlan averton: “orgesante tion kio estas malantaŭe kaj strebante al tio kio staras antaŭe”²³, kaj ne preterlasante la voĉon de la profeto Elija diranta: “Vivu la Sinjoro, antaŭ kiu mi staras hodiaŭ”²⁴. Li rimarkadis, fakte, ke, dirante “hodiaŭ” Elija ne mezuris la tempon kiu jam pasis, sed, kvazaŭ li ĵetus ĉiam denove la fundamentojn, tagon post tagon klopodis sin montri al Dio tia kia oni devas aperi antaŭ Dio, nome korpura kaj preta obei ties volon kaj neniom pli.

Kaj admonadis sin mem: “Nepras, ke askezulo masonu el vivstilo de Elija, kiel el speculo, sian vivon por ĉiam”²⁵.

8. Antono, enfermita en tombo²⁶, estas atakata de la diablo

Tial, post tia plifortiĝo de lia spirito, Antono decidis ekloĝi en tombo iom fore de la vilaĝo

Kaj rekomendinte al unu el siaj amikoj porti panon al li de tempo al tempo, kaj, enirinte iun tombon kaj pere de li ĝin ŝlosiginte malantaŭ si, tie ĉi li ekrestis sola. Ĉi tie la malamiko, kiu ja ne nur tion ne eltenis, sed eĉ timis, ke baldaŭ tiu igos la dezerton loko por la fondo de urbo de askezo, alproksimiĝinte iun nokton

²³ Fil 3,13

²⁴ 1 Re 17,1

²⁵ Ĉe multaj prakristanaj verkistoj profeto Elija estas imagata kaj priskribita kiel modela soleculo (monaĥo).

²⁶ La tomboj de Egiptanoj sin prezentis kiel etaj hejmoj kun la pordo orientita al Nilo, En tiamaj dokumentoj oni parolas οικήσκος «eta domo», «ĉambreto», el οίκος (= oikos) “domo, loĝejo”; subtere estis fosita la sepulkra ĉambro. Tiu en kiu enfermiĝas Antono estas evidente tombo forlasita, unu el la multaj dissemiĝintaj en la pagana Egiptio. Ankaŭ pri Pakomio estas rakontate ke, ĉekomence de monaĥa vivo, vizitis tombojn kaj pasigis tie noktojn preĝante.

La antikvuloj konsideris, fakte, la tombojn kiel lokojn loĝatajn de la diablo (temas pri koncepto nemalĉeesta eĉ en la evangelioj, Mt 5,25 kaj Lk 8,29) kaj Antono intencas ĝuste alfronti la demonon en ties sama loĝejo: Eblas, ke la aŭtoro, antaŭ la malfacileco montri, ke tio estas malliberiga fantaziaĵo, preferus montri ilian senpotencon. Finfine “En la soleco kaj silento iu mortas al si mem; en la dezerto spertas sian mizeron kaj la dian mizerikordon”.

kun svarmo da demonoj, lin tiom batis ke, pro la turmentoj, li restis kuŝanta surtere senvoĉe

Antono fakte deklaris, ke la suferoj estis tiom fortaj ĝis diri, ke la battoj de homoj ne povintus kaŭzi tian suferon. Sed pro dia interveno (la Sinjoro fakte ne neglektas esperantojn en li), la postan tagon lia konato venis porti panon. Kaj tiu ĉi, malferminte la pordon lin vidinte tiel kuŝantan surpavime, lin levis el tero kaj kunportis en la domon de la vilaĝestro kaj lin demetis surteren. Multaj el liaj parencoj kaj vilaĝanoj sidis ĉirkaŭ Antono kvazaŭ asiste al mortinto. Sed, preskaŭ meznokte, Antono, reveninte en si mem kaj vekiginte, ĵus konsciiĝis, ke ĉiuj dormas kaj ke nur sia konato vigilas, mansigne invitis, ke tiu ĉi alproksimiĝu, petis, ke mem lin kunportu al la tombejo sen veki la aliajn.

9. La diabloj sturmas sur Antonon subforme de sovaĝaj bestoj

Li estis, do, transportita de tiu homo kaj, malantaŭ la ŝlosita pordo kiel kutime, li restis sola ene de la tombo. Rilate la battojn ricevitaĵajn de la diabloj li ne havis la forton piedstari kaj pro tio li ekpreĝis kuŝante; kaj post la preĝo li aldonis laŭtvoĉe: “Jen mi, mi estas Antono, mi ne fuĝas antaŭ viaj battoj, ĉar, eĉ se vi pli aĉe agus, nenio min «apartigis el la amo de Kristo»²⁷. Sekve li kantadis psalmojn: “Kaj se kontraŭ leviĝus armeo, mia koro ne suferus timon”²⁸.

La asketulo, do, pensis kaj diras tiaĵojn. Sed la malamiko, kiu malamas la bonon, mirigita pro la fakto, ke li, eĉ post la battoj, kuraĝis reveni, alvokinte siajn hundojn²⁹, diris al ili kolere: “Vidu, ke ne per la *spirito de la prostituado*, nek per battoj ni lin ne konvinkis rezigni, anstataŭe li aŭdacas defii nin, lin ni sturmu per aliaj artifikaĵoj”. Facilas por la diablo preni diversajn formojn cele de malbonaĵoj.

Tiam, en la nokto, ili faris tiom da frakaso, ke en tiu loko ĉio ŝajnis tremi. Kaj ŝajnis, ke la demonoj, kvazaŭ ili rompus la kvar ĉambretajn murojn, tra tiuj enirus ŝanĝinte siajn formojn nun aspektiĝantaj kiel ferocajn bestojn kaj reptiliojn. Tiu loko subite pleniĝi je aperoj de leonoj kaj, ursoj, leopardoj, virbovoj, serpentoj kaj aspidoj, skorpioj kaj lupoj; kaj ĉiu el tiuj sovaĝbestoj sin movis laŭ sia propro. Leono roris emante ataki, la taŭro ŝajnis kolizii, la serpentoj ŝoviĝis sen tamen lin atingi kaj la lupo eklanciĝis sen tamen lin sturmi:

²⁷ Rm 8,35

²⁸ Ps 27,3

²⁹ Utilas rimarkigi, ke en kopta agiografio literaturo oftas la figurado de demonoj subforme de hundoj kaj ke eblan eksplikon pri tio oni povas trovi en la antikva egipta religio, plenplena je diecoj je feroca aspekto. Aparte, eble, en la spirito de Antono la demonoj estis identigitaj kun la dioj de la antikva Egiptio kaj, tiukaze, la imago de hundo povas esti alvokata de la dio de la mortintoj Anubo, reprezentata ŝakalkape, kiun helenoj kaj romianoj facile konfuzis kun hundo, kiel ĉeVirgilo.

la furoro de ĉiuj tiuj aperantoj, kune kun la frakaso de iliaj krioj, estis ververe terura.

Reveninte al Antono, batita kaj vundita de ili, tiu ĉi sentis en sia korpo doloron pli intensan ol antaŭe, restante tamen kuŝita sed sentrema kaj vigla en la animo. Li ĝemis pro la fizika doloro, sed veka en la menso kaj preskaŭ primokante ilin, li ripetadis: “Se estus en vi iu ajn povo, sufiĉus, ke nur unu el vi venus; sed pro tio, ke la Sinjoro forprenis de vi la energion, ĝuste pro tio vi provas iamaniere timigi min per la nombro. Kaj via imitado laŭforme de estaĵoj senaj je racio estas signo de via malfortiĝo”.

Kaj kuraĝe plue diris. ”Se vi vere havas povon sur min, ne hezitu, ŝtormu sur min. Se, anstataŭe, vi ne havas iun ajn povon sur mi, kial vi agitiĝas tiom ekscese? Fakte, estas kontraŭ vi sigilo kaj defenda muro nia fido en la Sinjoro”³⁰. Tial, post multaj provoj, ili dentgrincis kontraŭ li, furiozaj pro tio, ke ili primokis pli sin mem ol lin.

10. La Sinjoro alkuras helpi Antonon

La Sinjoro ne eĉ en tiu momento forgesis pri la lukto de Antono, kaj eĉ li venis helpe al Antono. Tiu ĉi, fakte, levinte la kapon, vidis, ke la tegmento aspektis aperta kaj lumradio ŝajnis direktiĝi al li. La diablaro subite malaperis, la doloro subite ĉesis kaj la loĝejo refariĝis integra.

Antono tiam, konsciiĝinte pri la helpo de la Sinjoro, enspirante pli profunde kaj liberigita de la sufero, demandis vizion aperintan: “Kie vi estas? Kial vi ne prezentigis ekde la komenco por ĉesigi miajn turmentojn?”. Voĉo atingis lin: “Antono, mi estis ĉi tie, sed mi ĉeestis atendanta vidi vian lukton. Ĉar vi, do, rezistis kaj ne estis venkita, mi estos ĉiam via helpanto kaj igos vin fama ĉiuloke”:

Aŭdinte tiaĵojn, Antono, kaj leviĝinte, preĝadis; kaj eksentis en sia korpo tiom da forto, ke li perceptis, ke mem akiris energion ege pli grandan ol kiun posedatan antaŭe. Li aĝis tiam preskaŭ tridekvin jarojn.

11. Antono fortikigas sian askezan staton en la dezerto

La sekvan tagon, elirinte el la tombo-loĝejo, li eĉ pli fervoriĝis en la amo al Dio, kaj, vizitinte tiun maljunulon pri kiu estis menciata antaŭe, tiun ĉi petis esti akceptita en la dezerto ĉe li. Kaj malgraŭ ke tiu, pro sia maljunuleco kaj pro tio, ke jam ne naskiĝis tiu kutimo, estis rifuzanta, li sin rapidigis en la direkton de la monto³¹.

Sed denove la malamiko, vidinte lian ardon kaj volante lin ŝrumpigi, plonĝigis laŭstrate antaŭ li aperaĵon de granda argenta disko. Antono, kompreninte la artifikon

³⁰ Psa 61,3 kaj 7-9; Sen 18,10s

³¹ Temas pri monto hodiaŭ monata Pispir, situanta oriente de Nilo, ĉirkaŭ 75 km sude de Menefro.

de la malamiko de bono, haltis kaj, sin adresante al la disko tra kiu videblas la diablo, eldiris: “De kie aperas disko en dezerto? Eĉ la vojo ne estas trairata kaj ne konstateblas spuroj de pasintoj: se ĝi plonĝus el alto, ĝi ankaŭ ne povis eskapi el vido ĉar tre granda. Krome, se ĝin perdinto revenintus sur siajn spurojn kaj ĝin serĉintus, ĝin li jam trovintus ĉar temas pri dezerta loko. Tia afero estas insido de la diablo: vi, diablo, ne malhelpos mian fervoron per tiaj ruzoj! Kaj tia aĵo «iru en pereon kun vi»³².

Post kiam Antono tion diris, tiu disko malaperis kiel fumo antaŭ fajro.

12. Antono ekloĝas en fuorto forlasita

Aliafojon, ne plu li vidis aĉaĵojn, sed verajn orerojn ĵetitajn survojen, dum sia paŝado. Sed, kiu ajn estus la dissemanto, ĉu la malamiko ĉu supera potenco celanta ekzercigi la atletojn³³ kaj demonstri al la diablo, ke Antono allogiĝas eĉ ne pro konkretaj riĉaĵoj, nek li pri tio raportis, nek ni ion alian scias escepte ke tio kion li vidis estis vera oro. Antono miris pro la granda kvanto, sed, kvazaŭ paŝante surfajre, ĝin preterpasis tiom haste, ke mem ne provis emon retrorigardi, eĉ tiom rapidis en la kuro, ke la loko mem restis neidentigebla.

Do, ĉiam pli kohera kun sia decido, Antono rapidiĝis al la monto; kaj trovinte trans la rivero fuorton senhoman kaj plenan je reptilioj ĉar neflegatan de longa tempo, tien alkuris kaj ekloĝis.

La reptilioj subite malproksimiĝis, kvazaŭ io ilin postkurus. Tuj li, barinte la eniron kaj jam provizita je pano porsesmonate sufiĉan (tial kutimas la tebanoj, kaj ofte la panon ili konservas laŭ unu tuta jaro), kiel eniranto en sekretajn lokojn de sanktejo, ekvivis sola ene de tiu soleca loĝejo neniam elirante kaj iun ajn renkontante el la trairantoj.

Li, do, laŭ longa tempo sin dediĉis al sia askezo, ricevante panojn, dufojn jare, el la supro de la loĝejo, tra la tegmento.

13. Kromaj bataloj kontraŭ la demonoj

Kiuj el la familianoj venintaj ĉe lin, restante tamen ekstere (ofte laŭ tagoj kaj noktoj) ĉar la eniro estis de li draste nepermesita, ofte aŭdis, el la interno, bruaĵojn similajn al tiuj de homamaso krianta kaj brueganta, elmetanta voĉojn lamentajn kaj terurigantajn: “Restu for de niaj teroj! Kion havas vi por fari kun la dezerto? Vi ne kapablas elteni niajn insidojn!”. Tial, kiuj atendis elekstere dekomence kredis, ke ene homoj minacus lin kaj ke tiuj ĉi alirus ĉe lin

³² Ag 8,20

³³ La titolo de ‘atleto’, atribuita ofte al la martiroj, koretke aplikiĝas ankaŭ al la askezulo kiu luktas kontraŭ la demonoj, kaj agas kontraŭ siajn pasiojn kaj tiel fariĝas por la fiduloj ekzemplo de “atletoj”.

surirante per movebla ŝtuparo; sed, alproksimiĝinte por rigardi tratraue, ili vidis neniun; tiam, kompreninte, ke tiuj estas demonoj, timplene vokis Antonon.

Sed li, tiun ĉi atentante kaj ignorante ĉi-lastajn, tiujn invitis foriri kaj ne timi; diris fakte, ke la demonoj uzas aperi kontraŭ tiujn kiuj tion timas³⁴: “Vi, do, krucsignigu kaj foriru sentime: lasu, ke tiuj uloj moku sin mem”. Tial, la adresitoj foriris fortikitaj per krucsigno, li male daŭre restis sen esti eĉ minimume lezita far la demono ularo, kaj ne ĉesis lukti. Plie, la pliigo de l’ aperoj prezentiĝantaj al lia menso kaj la malforteco de la malamikoj okazigis en li grandan liberiĝon el la suferoj kaj ekscitis pli grandan fervoron.

Ofte liaj familianoj apudiĝis timante lin trovi morta kaj, male, aŭdis lin kantanta psalmojn: “Dio leviĝu kaj foriru liaj malamikoj, forfuĝu antaŭ li kiuj lin malamas. Same kiel dispeliĝas la fumo, tiel ili malaperu; same kiel fandiĝas la vakso ĉe fajro, tiel pereigu la pekuloj antaŭ Dio”³⁵. Kaj plue: “Ĉiuj popoloj min insidis, sed per la nomo de la Sinjoro mi ilin disbatis”³⁶.

14. Pri Antono post kiam li estis devigita forlasi sian rifuĝon

Do, laŭ preskaŭ dudeko da jaroj, li travivis askezan vivon tiamaniere, nome en soleco, sen eliri kaj sen iele sin vidigi de kelkaj homoj.

Post tio, ĉar multaj deziris kaj volis imiti lian askezon kaj ĉar aliaj parencoj venis kaj perforte faligis la pordon, Antono eliris kiel el sanktejo, kvazaŭ li estus incita al misteroj kaj inspirita de Dio. Tiam, unuafojon, li prezentiĝis ekster la fuorto al venintoj ĉe lin. Tiuj ĉi, lin ekvidante, miris pro tio ke lia korpo konservis la saman staton: ne dikiĝinta pro manko de fizikaj ekzercoj, nek maldikiĝinta pro la fastoj kaj la lukto kontraŭ la demonoj, sed li estis tia kia ili lin konis jam antaŭ ol li retiriĝis.

Rilate, plue, la kondiĉon de lia animo, tiu ĉi estis pura: ne depresia pro enuo, nek malfortigita pro tro da plezuroj, nek inklina al rido aŭ malĝojo. Jam kiam la demonoj amase aperis, li ne provis ĝenon, nek jam kiam li estis salutata far multaj personoj li spertis kontenton, sed ĉiam li restis la sama, similante al tiu kiu sin lasas konduki de la racio³⁷ kaj estas tia en sia natura stato.

³⁴ Rimarkindas la insistado superi la timon pro la demonoj: evidentas la intenco kontraŭstari la onian lokan emon subiĝi al tiu timo pro supozita forta influo de la demonoj. Pli ol ties agado kontraŭ la homoj, estas akcentata la malforto de la demonoj: principo tre eduka kaj liberiga en socioj inkliniĝintaj respekti se ne omaĝi la demonojn kaj similajn supernaturajn estaĵojn, por havigi el ili protekton.

³⁵ Ps 67,2-3

³⁶ Diversloke en psalmaro

³⁷ Eble “konduki de la Vorto de Dio (= Jesuo) “. La esprimo “*esti gvidata de la racio*” estas karakteriza de la stoika filozofio, kiu ĉi-kaze ne malplaĉis al la inlelrktula kristano, sed ĉi tie la helena logos λόγος (= logos), ĉi tie tradukita per *racio*, povas ankaŭ aludi al la johana Logoso, do al la Difilo.

La Sinjoro sanigis, konsentigita de lia perado, multajn el la ĉeestantoj suferantaj en siaj korpoj kaj liberigis aliajn el la diablo. Li donis al Antono ankaŭ afablecon en parolado; kaj tiel la askezulo komfortis multajn estantajn en afliktiĝo, repacigis aliajn estantajn en malamikeco; admonante ĉiujn por ke ne estu preferata ol la amo de Kristo nenia mundumaĵo.

Antono, atentigante en siaj prelegadoj pri la estontaj bonaĵoj kaj pri la amo de Dio al ni homoj (“Li kiu ne pardonis al sia filo, kaj lin transdonis pro ni ĉiuj”) ³⁸, persvadis multajn elekti la solecan vivon. Kaj tiel de tiam kreigis multaj loĝejoj ankaŭ sur montoj kaj la dezerto fariĝis urbo de monaĥoj kiuj jam forlasis siajn posedaĵojn kaj jam antaŭfigurigis la vivon de la ĉieloj ³⁹.

15. Antono fariĝas kiel patro por la monaĥoj de ĉirkaŭaĵo

Unufojon necesis, ke li transpasu la kanalon Arsinoo ⁴⁰ (tasko lia estis viziti la kunfratojn), sed la kanalo plenplenis je krokodiloj: Li prenis la solan prizorgon preĝi kaj poste li kaj ĉiuj lin akompanantoj mergiĝi en la kanalon kaj ĝin transpasis sendanĝere.

Reveninte al sia kutima soleca loĝloko, li daŭre sin dediĉis al siaj noblaj kaj senrezervaj klopodoj. Kaj en siaj oftaj paroladoj, li intensigis la ardon de tiuj kiuj jam monaĥiĝintaj, dum en la plejparto de la aliaj ekscitis la amon al la askezo. Baldaŭ, puŝite de liaj incitaĵoj, elstariĝis sennombraj soleculaj loĝejoj, pri kiuj li, kiel patro, alprenis la gvidon.

16. Parolado de Antono al la monaĥaro pri la klopodoj por atingi la askezan vivon ⁴¹

Iun tagon, ĵus elirinta, ĉar ĉiuj monaĥoj estis venintaj ĉe lin kaj estis invitintaj, ke li aŭskultigu al ili kelkajn siajn vortojn, li diris al ili en la kopta ⁴² lingvo. “La Sanktaj Skriboj sufiĉas por nin instrui, sed utilas, ke ni nin konfirmu reciproke en la kredo kaj nin fortikigu pervorte. Vi do, komunikante kion vi scias, kiel filoj alportas ion al la patro; mi, miavice, ĉar mi estas aĝe pli maljuna ol vi, al vi transdonos tion pri kiu mi jam spertis.

³⁸ Rm 8,32

³⁹ Lk 3,20; Heb 12,20

⁴⁰ Rivero Arsinoo fluis je 75 km diste de monto Pispir oriene de Nilo.

⁴¹ Tiu ĉi longa parolado de Antono al la monaĥaro okupas preskaŭ trionan parton de la tuta verko (16-43): temas pri literatura rimedo kiun profitas Atanazio por prezenti la ideojn de Antono pri la askeza vivo. La konformecoj kun juj pasaĝoj de aliaj verkoj de Atanazio evidentiĝas, ke tiu ĉi miksis inter la ideoj de Antono ankaŭ siajn konceptojn.

⁴² Antono parolis nur kopte, bezonis do interpretiston kiam li parolis al greklingvuloj: Laŭ verkisto Paladio, tiabezone helpis la monaĥo Kronio kiu tradukadis al la greka la paroladojn de Antono.

“Precipe estu en vi komuna zorgemo ne malfervoriĝi post nia komenco, ne malkuraĝigi pro la penoj, ne diri: «Jam de multe ni praktikas askezon», sed anstataŭe intensigu ĉiun tagon nian ardon kvazaŭ ni estus en la komenco. La vivo, fakte, de la homoj estas mallonga, se komparata al estontaj jarcentoj, tiel ke mia tempo estas nenio fronte al la eterna vivo.

“Ĉiu aĵo en tiu ĉi mondo vendiĝas je la ĝusta prezo kaj oni liveras iun aĵon interŝanĝe kun alia je la sama prezo: la promeso, male, de la eterna vivo elaĉetiĝas per malmulto. Oni skribis fakte: «La jaroj de nia vivo estas por ni sepdek, okdek ĉe pliforteculoj, sed la plejparto el ili estas sufero kaj peno»⁴³. En la kazo, ke ni trakurus en askezo ĉiujn niajn okdek jarojn, aŭ eĉ centon, ni ne reĝus tutedaŭre cent jarojn, sed anstataŭ centon ni reĝos jarcentojn de jarcentoj. Kaj se ni eĉ batalus sur la tero, ni ne ricevus nian heredon sur la tero, sed ni havas niajn promesojn en la ĉielo. Krome, por la forlaso de nia difektebla korpo, ni ĝin rehavos sedkorupta»⁴⁴.

17. Instigo al malaspiro al la grandaj faroj.

“Tial ke, filoj miaj, ne malkuraĝiĝu, nek nin taksu modeloj de konstanteco nek aspiru al grandiozaĵoj. Fakte. «la suferoj de la nuna tempo ne indas komparon kun la gloro, kiu estas malkaŝota al ni»⁴⁵. Ni ne pensu, rigardante al la mondo, ke ni rezignis grandajn aferojn, ĉar la tuteco de tiu ĉi tero estas malgrandega se komparata kun tiu de la tuta ĉielo.

“Tial, ankaŭ se ni estus la posedantoj de la tuta tero kaj ĝin ni rezignus, eĉ tio estus nenio kompare kun la ĉiela regno: kiel malŝatanto de bronza drakmo por gajni cent orajn drakmojn riskas malmulton kaj ricevas centoblon, tiel estas tiu kiu dominas la tutan teron kaj ĝin rezignas⁴⁶. Se la tuta tero ne kompareblas kun la ĉielo, kiu forlasas malmutajn arurojn (monerojn) perdas, se tiel diri, nenion; tamen eĉ se iu forlasus hejmon aŭ gravan kvanton da oro, tiu rajtas nek fieri nek malĝoji.

“Plue konsiderendas tio: eĉ se ni ne forlasus tiaĵojn pro virto, pli malfrue, kiam ni mortos, ilin ni lasos, ofte al kiu malcelata, laŭ kio al ni memorigas Predikanto. Kial do ni ne lasos tiaĵojn pro virto, por iĝi heredantoj de la Regno? Tial, neniu el ni estus trafita de la deziro posedi: kian gajnon ni havos per la akiro de tiaĵoj kiuj ni ne povas kunporti? Kial ni ne akiras prefere kiujn ni povas kunporti kun ni, nome la prudento, justeco, fortenco, inteligenteco, karitato, amo al la povruloj, la kredo je Jesuo Kristo, mildeco, gastigemo? Se ni

⁴³ Diversloke en la psalmaro.

⁴⁴ 1 Kor 15,42

⁴⁵ Rm 8,18

⁴⁶ Mt 19,29

akiroj tiajn virtojn ilin ni trovos tie, antaŭ ni mem, pretajn nin ricevi en tero de la milduloj⁴⁷.



Tentoj de Sankta Antono de Martin Schongauer

⁴⁷ Tiu ĉi listo de virtoj estos analoge reproponta plurfoje.

18. Instigo al la konstanteco

“Tial, unuopulo konvinkiĝu pri la neceso ne malkuragiĝi, precipe pro tio, ke mem estas fidela servisto de la Sinjoro kaj do devigata servi al sia Sinjoro. Kiel servisto ne aŭdacus diri: «pro tio, ke mi laboris hieraŭ, mi rajtas ne labori hodiaŭ», nek, mezurante la pasintan tempon, li ĉesus labori en la sekvantaj tagoj, sed ĉiutage li montras la saman ardon plaĉi al sia Sinjoro (laŭskribite en la evangelio) kaj ne sin enranĉas en danĝero, tiel same ankaŭ ni persistu en la askezo, sciinte ke, se ni estos neglektantaj eĉ laŭ unu sola tago, la Sinjoro ne pardone akceptos la meritojn de la pasinta tempo, sed li koleros pro nia neglekto. Tiasence ni aŭdis ankaŭ ĉe profeto Ezekielo⁴⁸; tiel ankaŭ Judaso, pro unu sola nokto, perdis la laborfruktojn de la pasinta tempo”⁴⁹.

19. Ni vivu kvazaŭ ni devus morti ĉiutage

”Tial, miaj filoj, ni nin tenu firmaj en la askezo, kaj ne permesu, ke nin venkas la malagema malkuraĝiĝo⁵⁰, ĉar en tio ni havas nia kunlaboranto la Sinjoron, kiel estis skribite: kun kiu ajn elektas la bono «Dio kunlaboras por la bono».

”Kaj por ke nia animo ne febliĝu, utilas mediti la diraĵon de la apostolo. «Mi mortas ĉiutage». Se fakte ankaŭ vivas tiele, nome kvazaŭ ni mortus ĉiutage, ni ne pekus. Tiu diraĵo nin pensi, en la ĉiutaga vekiĝo, ke ni ne daŭros ĝisvespere, kaj, kiam ni prepariĝas al kuŝiĝo, ke ni ne vekiĝos, ĉar nia vivo necertas laŭ sia naturo kaj estas ĉiutage mezurata de la Providenco.

”Tiel ke, estante en tia animdispozicio kaj vivante tiamaniere ĉiutage, ni nek pekos, nek deziros ion ajn, kaj nek koleros kontraŭ iu, nek «akumulos trezorojn sur la tero»⁵¹, sed, kvazaŭ ĉiutage ni nin taksus ekmortantaj, ni vivos povraj kaj pardonantaj ĉion al ĉiuj. Ni ne enretiĝos tra la deziro pri virino aŭ alia nepura plezuro, sed ĝin ni malŝatos kiel momentan ĝenon, batalante ĉiam kontraŭ ĝin kaj adresante la rigardon al la juĝtago. Ĉiam fakte timo pli granda kaj la konsidero pri la turmentoj nuligas la dolĉecon de la plezuro kaj relevas la spiriton ekdevojĝantan»”

20. Animo kaj virto

“Ĉar, do, ni komencis direktiĝi laŭvoje de la virto, ni daŭrigu senĉese, por atingi plejbaldaŭ nian celon. Kaj ke neniuj turniĝoj malantaŭen, imitante la

⁴⁸ Ez 3,29 kaj diversloke

⁴⁹ Mt 26,47; Mk 14,43; Lk 22,47; Jo 13,30 kaj 18,3

⁵⁰ La greka ακηδία (=akedia) estas termino ofta en la monaĥecaj verkaĵoj por indiki malkuraĝiĝo-mlagemo-senardo.

⁵¹ Mt 6,19

edzinon de Lot⁵², precipe pro tio, ke la Sinjoro diris: «Neniu metinte sian manon al plugilo kaj rigardante malantaŭen, taŭgas por la regno de Dio»⁵³. Rigardi malantaŭen nenio alia estas ol penti kaj sopiri pri la mondaj allogoj.

Ne timu kiam vi aŭdas paroli pri virto, kaj ne miru pro tiu nomo: ĝi fakte ne malproksimas el ni, nek ekzistas ekster ni, sed estas afero ene de ni kaj facile realigebla, kondiĉe ke ni tion volus. Paganoj⁵⁴ forlasas sian landon kaj transmaras por ellerni literaturaĵon⁵⁵; ni, male, bezonas nek forlasi nian landon por alveni ĉielan regnon nek transpasi la maron por atingi la virton, ĉar la Sinjoro unua alparolis: «La Ĉiela Regno estas en nia eno»⁵⁶. Virto do postulas nur nian volon, ĉar ĝi estas ene de ni kaj naskiĝas el ni.

“Virto, fakte, naskiĝas kiam animo gardas laŭnature sian intelektan kapablon⁵⁷ kaj tio efektiviĝas kiam ĝi sin konservas tia kia estis kreita, nome multe bela kaj justa.

“Pro tio Josuo filo de Nun, diris al la popolo, ĝin admonante: «Adresu vian koron al la Sinjoro, Dio de Izraelo» kaj diradis Johano Baptisto: «Rektigu vian iradon». Esti rekte signifas por la animo havi la intelektan kapablon en propra natura stato, tia kia ĝi estis kreita. Male, kiam ĝi devojas, malproksimiĝante el sia natura stato, tiam oni parolas pri depravacio de animo.

“La problemo do ne estas malfacila: se ni restas tiaj kiaj ni naskiĝis, ni estas en la virto, se anstataŭe ni engligas malicajn aferojn, ni estas juĝataj kiel maliculoj. Tial, se ni estus devigataj proviziĝi je virto el la maleno, tio estus vere malfacila afero; sed se ĝi jam estas en ni, ni nin protektu el malpuraj pensoj kaj konservu nian animon por la Sinjoro kvazaŭ ni ricevintus deponaĵon. Por ke Li rekonu sian verkon, nome la animo en la stato de Li kreita”.

21. Ni luktu kun la demonoj

“Nia lukto taŭgu por malhelpi, ke svagemo fariĝu nia tirano kaj ke la pasioj nin dominu. Estis skribite, fakte: «Kolero de homo ne enkondukas al plenumiĝo

⁵² Gn 19,26

⁵³ Lk 9,62 kaj 17,32

⁵⁴ La originala teksto uzas la vorton ἑλληνες (Ellenes = Helenoj, Grekuloj); sed ĉi tie, kaj aliloke en la verko, signifas paganoj.

⁵⁵ Aludo al studvojaĝoj al Ateno, aŭ al Aleksandrio aŭ al Konstantinopolo, tio estas al la grandaj centroj de la tieepoka kulturo.

⁵⁶ Lk 17,21

⁵⁷ Filozofiaj elementoj estas ĉi tie proponataj ene de kristana perspektivo: aparte, la esprimo κατὰ φύσιν (= kata fusin), origine stoika, estas ĉi tie asociita al konceptoj origine bibliaj kaj kristanaj kaj signifas “laŭ la vera naturo de la homo”, tiu nome kun kiu Dio ĝin kreis. Tiu esprimo estas tuj klarigita en la sekva aludo al la geneza bildo de Dio (vidu Gn 1,26). Tiu esprimo fortigas la indecon de la homo.

de la justeco de la Sinjoro; avido koncipas kaj generas pekon kaj peko, fatale, generas morton»⁵⁸.

Vivante tiele, ni restas sobraj kaj, kiel estis skribite, «ni ŝirmas nian koron ĉiuzorge»⁵⁹, ĉar ni havas terurajn malamikojn, nome la aĉaj demonoj. «Kontraŭ tiuj uloj estas nia luktado: ne kontraŭ sango kaj karno, sed kontraŭ regantaro, kontraŭ dominantaro, kontraŭ mondpotenculoj de la nuna mallumo, kontraŭ la spiritaro de la malbono en la ĉielarejoj»⁶⁰. Multenombas tia amaso en la nin ĉirkaŭanta aero⁶¹ kaj ne malproksimas el ni; inter ili multas la malsamecoj. Sed parolado pri iliaj naturo kaj malsamecoj estus longa kaj krome ĝi apartenas al la kompetenteco de aliaj pli elstaraj ol ni.

Kio nun urĝas kaj necesas por ni konsistas nur el la kono pri iliaj ruzecoj kontraŭ ni»⁶².

22. Nepras koni iliajn instigojn

“Ni devas antaŭĉio scii, ke la demonoj ne naskiĝis kiaj ilia nomo supozigas: Dio, fakte, kreis nenium estaĵon malbonan⁶³. Eĉ ili naskiĝis bonaj: sed, defalinte el ĉiela saĝo kaj poste vagante ĉirkaŭ la tero, ili trompis la paganojn per siaj aperoj, dum kontraŭ ni kristanoj, kontraŭ kiuj adresiĝas ilia malamo, ili tutelerte engaĝiĝas malhelpi nian ascendon al la ĉieloj, por ke ne ascendu ni mem al tiu loko el kiu ili falis.

“Tial oni bezonas multe jen da preĝemo kaj jen da askezo por ke, jam ricevinte de la Sankta Spirito la donon de la distingo de la spiritoj⁶⁴, oni kapabliĝu koni tion kio ilin koncernas: kiuj inter ili estas malpli malbonaj kaj kiuj male pli, pri kiuj apartaj sinŝarĝoj ĉiu el ili lerte okupiĝas kaj, fine, kiamaniere ĉiu el ili estas superebla kaj forigebla. Diversspecaj fakte estas iliaj ruzaĵoj kaj lertaĵoj

⁵⁸ Jk 1,20 kaj 1,15

⁵⁹ Sen 4,23

⁶⁰ Ef 6,12

⁶¹ La opinio laŭ kiu en la aero-zono loĝas, celantaj kapti la de ili logitojn, malbonaj spiritoj estas nekonata en Malnova Testamento kaj en la juda apokalipsa antaŭkristana literaturo; ĝi ekaperas, male, en la rabineca judismo kaj estas ĝenerale akceptata en la fru-kristanismo de la unuaj jarcentoj. Plurnombraj atestoj troviĝas, fakte, en diversaj kristanaj aŭtoroj, krom en Ef 2,2 kaj 6,12. Laŭ tiufakaj specialistoj, tiu stranga “teologiaĵo” enradikiĝis, en la helenismaj medioj, sub influo de persa kulturo disvastigita de Plutarco kaj Porfirio. Oni komprenas, sekve, ke ne temis pri kredendaĵo.

⁶² Tiu ĉi estas la centra koncepto pri la laŭkristana demonologio, kontraste kun la manikea koncepto kiu, identigante la diablon kun la principo de la malbono, estas devigata konfesii dualismon, laŭ kiu Dio perdas jen ĉiopotencon jen aŭtonomion: pro tio la “granda” Eklezio tion kondamnis.

⁶³ Vidu la antaŭan noton.

⁶⁴ 1 Kor 12,10. E tiu “distingo de la spiritoj” videblas malfacileco koni la nekonsciaĵojn de la homa psiko, objekto de modernaj sciencoj.

en sturmaj atakoj. Tial, la beata apostolo kaj ties sekvantoj elsperte montris scii tiaĵojn kiam ili diris: «Ni ne estas sen scioj pri liaj (= de Satano) ruzoj»⁶⁵. “Instruite pri tio, per la farita sperto pri iliaj tentoj, ni devas nin korekti reciproke. Tial, mi, kiu faris kelkajn spertojn pri ili, parolas al vi kiel al filoj”.

23. la demonoj provas nin trompi ĉiujle

“Tiuĵ ĉi demonoj, do, kiam vidas iujn ajn kristanojn, aparte monaĥojn, engaĝiĝantajn kaj progresantajn en la virto, tutklopode provas intermeti obstaklojn sur ilia vojo, kaj iliaj obstakloj estas malĉastaj pensoj.

“Sed ni ne timu iliajn embuskojn, ĉar per la preĝo, la fastoj kaj la fido en la Sinjoro, ni ilin rapide forfaligas. Sed, eĉ se forfalintaj, ili ne ĉesas, male ili insistas per ruzoj kaj trompoj Fakte, ĉar ili ne sukcesas trompi koron per aperta kaj sordida plezuro, ili atakas denove alimaniere. Tiam ili pretendas terurigi ŝanĝante eksterajn, sin transformante en virinojn, bestojn, serpentojn, gigantojn kaj sturmajn soldatojn.

“Sed, eĉ se tielas la afero ni ne sentu timon pro tiaj iliaj aperoj, ĉar ili konsistas el nenio, eĉ ili haste malaperas, precipe se ni nin protektas per la kredo kaj kruccsignoj.

Ili aŭdacas kaj arogantas senmezure, ĉar se ankaŭ tiele malsuperaj, ili sturmas ankoraŭ alimaniere: ili havas pretendon profeti kaj antaŭdiri la estontecon, sin montri altaj ĝis tegmento kaj senmezure larĝaj, por surprizi kiujn ili ne sukcesis trompi en la pensoj. Kaj se eĉ tiukaze, ili trovas animon fortigitan en la kredo kaj espero de la menso⁶⁶, tiam ili kondukas kun si tiun kiu ilin estras”.

24. Nepras ne timi la demonojn ĉar ili estas malfortaj.

“Ili sin montras ofte - ankoraŭis Antono - tiaj kiaj la diablo pri kiu la Sinjoro revelaciis al Ijob, dirante: «Liaj okuloj havas ŝajnon de matena stelo: el lia buŝo eliras ardaĵ flamoj kaj ŝprucas fajreroj; el liaj naztruoj ellasiĝas fumo same kiel el forno bruliganta karbon: lia animo estas karbo dum flamo eliras el lia buŝo»⁶⁷.

“Aspektante tiele, la ĉefo de la demonoj, kiel dirite antaŭe, sentigas timon, ruzule klaĉante pri siaj grandaj povoj, ĝuste same kiel montris la Sinjoro al Ijob dirante:«Li konsideras feron pajlo kaj bronzon vermaborita ligno. Li taksas la maron parfumovazo, la abisman tartaron sia kaptaĵo: li imagis abismeriron

⁶⁵ 2 Kor 2,11

⁶⁶ La teksto ne klaras: en kodeksoj alternas lego διάνοια (dianoja = mente) kaj la varianto μετάνοια (metanoja = konvertiĝo). Eble per tiu esprimo oni celas diri, ke kredi kaj esperi estas funditaj sur raciaj bazoj; fakte, unu el akuzoj kontraŭponitaj de paganoj al kristanoj estis ĝuste, ke tiuj ĉi konfesus neracian kredon.

⁶⁷ Ijob 41, 10-13

promenado». Kaj parolante pere de la profeto diranta: «la malamiko diras: post tiom da sinsekvo mi celatingos; kaj: per mia mano mi kaptos la tutan teron kiel neston kaj kiel ovojn forlasitajn ĝin mi rikoltos»⁶⁸.

“Koncize, la demonoj provas fieri pri tiaĵoj kaj tion proklamas por trompi la homojn piajn. Sed eĉ tiukaze, ni fideluloj ne devas timi liajn aperojn, nek aŭskulti liajn vortojn, ĉar li mensogas kaj neniam diras la veron. Falte, la fieranto pri tiaj kaj tiom grandaj aferoj kaj kiu sin montras tiom aŭdaca, estis kiel drako hokprenita, de la Savinto, subigita al nazbrido kiel ŝarĝbesto, kiel al fuĝinta sklavo oni algruis tra liaj naztruoj ringon kaj liajn lipojn oni traboris per cirklo. Kaj estis ligita, de la Sinjoro, kiel pasereto tiel ke ni moku lin; li kaj liaj demonoj estis reduktitaj al skorpionoj kaj serpentoj por ke ni kristanoj povu ilin treti.

“Evidentigas tion la fakto, ke ni nun travivas nian vivon por lin almiliti: li, kiu fieris pri kapablo malaperigi la maron kaj konkeri la teron, ĝuste mem nun montriĝas nekapabla obstakli nian askezon kaj melhelpi, ke mi parolu kontraŭ li. Tial ni ne allasu atenton al tio kion li diros (li fakte mensogas) kaj ne timu liajn aperojn, ĉar ankaŭ tiuj ĉi estas mensogaj. Ne estas, fakte, lumo de vero kiu eliras el ili, male ili prefere disvastigas antaŭsignon kaj bildon de la fajro preparita por ili⁶⁹ kaj provas timigi la homojn per la aferoj pro kiuj ili restas en bruligejo. Ili aperas reale, sed malaperas samamaniere rapide, sen lezinti neniun el fideluloj kaj portante kun si la reflekson de la fajro kiu estas ilin ricevanta. Tial, eĉ en tiu kondiĉo konvenas, ke ni ilin ne timu, ĉar, per la sinjora graco, ĉiuj iliaj agojn reduktiĝas al nenio”.

25. Nepras ne agitiĝi pro iliaj insidoj.

“La demonoj estas insidemaj kaj pretaj ŝanĝiĝi kaj preni ĉiuformojn: ofte sen sinmontrado, ŝajnigas kanti psalmojn kaj memorigas pasaĵojn ĉerpitajn el la Skriboj. Foje, dum ni legas, ili tuj ripetas, kvazaŭ eĥo, tion kio estis legita, kaj ofte, dum ni dormas, nin vekas pro la preĝo⁷⁰: ili tion konstante faras ĝis preskaŭ malhelpi al ni la dormon. Foje, preninte la formojn de monaĥoj, ŝajnigas paroli kiel piaj personoj, por devojigi per sia ekstera simileco kaj poste altiri kien volas mem tiujn kiujn ili trompis.

Sed nepras ne atenti ilin, ankaŭ kiam ili nin vekas por la preĝo, eĉ se ili konsilas neniel manĝi kaj ŝajnigas nin kulpigi kaj riproĉi pro eraroj kiujn ili scias iam plenumitaj de ni. Fakte, ne pro pieco aŭ pro vero ili tiaĵojn faras, sed por konduki la simplulojn al la malespero kaj por ilin konvinki, ke la askezo

⁶⁸ Jes 10,14

⁶⁹ Mt 25,41

⁷⁰ 2 Kor 11,14

estas senutila, kaj por provoki en la homoj naŭzon pri la ermita vivo per la pretendo, ke ĝi estas netolerebla kaj penega, kaj por obstakli tiujn kiuj vivas engaĝite en la batalo kontraŭ ili”.

26. La demonoj foje ŝajnis diri la veron por pli efike nin forlogi

“Tial la profeto, sendita de la Sinjoro, konsideris mizeraj tiajn ulojn dirante: «Ve! al tiu kiu trinkigas venenon al sia najbarulo»⁷¹. Tiaj maĥinaĵoj kaj elpenaĵoj ruinigas la vojon kiu kondukas al la virto. Sed la Sinjoro, siavice, ankaŭ kiam la demonoj diris la veron (ĉar ili diris la veron asertante: «Vi estas la Difilo»⁷²), ilin silentigis malpermesante, ke ili parolu, por eviti, ke per la sama vero dissemu mem sian aĉaĵon kaj por nin kutimigi ne priatenti ilin, eĉ kiam ili ŝajnas diri la veron.

Malkovenas, fakte, ke ni, posedante la Skribojn kaj la liberon liveratan de la Savinto, estas instruataj de la demono, kiu ne konservis la postenon al li asignitan kaj kiu, male, renversis siajn pensojn. Pro tio la Sinjoro, kiam tiu ulo citas la Skribojn, tion malhelpis dirante: «Dio diris al la pekulo: kial vi ripetadas miajn leĝojn kaj havas konstante sur la buŝo mian interligon?»⁷³.

La demonoj faras ĉion tion (nome: paroli, bruegi, ŝajnigi, renversi), por trompi la simplulojn. Kaj sammaniere ili rumoras, aplaŭdas, senkiale ridas kaj fajfas. Sed se neniu ilin atentigas, tiam ili ploras kaj ĝemas: pro tio, ke ili estis venkitaj”.

27. Ni ne aŭskultu la demonojn ĉar ili nin trompas.

”La Sinjoro, do, estante Dio, silentigis la demonojn; koncerne nin, al ni, male, kiuj estis instruitaj de la sanktuloj, konvenas, ke ni faradu kiel tiuj lastaj, imitante ilian kuraĝon. Ankaŭ ili, fakte, konstatinte tion, diradis: «Kiam la pekulo staris antaŭ mi, mi fermis mian buŝon, mi min humiligis kaj silentis pri la bono»⁷⁴. Kaj plue: «Mi kiel surdulo ne aŭdis, kaj kiel mutulo ne ŝlisis mian buŝon. Kaj mi estis kiel homo kiu ne sentas»⁷⁵.

Tial, ankaŭ ni ne aŭskultu ilin, ĉar ili estas fremdaj rilate nin, ne pri ili atentigu eĉ se ili nin vekas por la preĝoj, eĉ se babilas pri fastoj. Ni prizorgu prefere pri nia engaĝo, pri la askezo kaj ne lasu, ke nin trompu kiuj agas inside. Ne ilin ni timu, ankaŭ se ili ŝajnas nin sturmi, ankaŭ se ili nin minacas pri mortopafo: ili estas feblaj kaj nenio alian povas fari ol minaci”.

⁷¹ Hab 2,15

⁷² Lk 4,41; Mk 3,11

⁷³ Psalmo 50,16

⁷⁴ Psalmo 39,2-3

⁷⁵ Psalmo 38,14-15

28. La demonoj perdis tutan ilian povon post la veno de la Sinjoro

“Ĝis nun mi nur preterfluge tuŝis tiun temon, sed nun nepras ne heziti por pli amplekse diri pri la samaj aferoj, ĉar ilin memori estos por vi fonto de sekureco.

“Post la veno de la Sinjoro, la malamiko falis kaj liaj povoj malintensiĝis⁷⁶. Kvankam ne havanta, do, iun ajn povon, tamen li kondutas same kiel tirano, kiu, ankaŭ se falinta, ne restas kvieta, sed minacas kvankam nur vorte. Ĉiu el vi konsideru pri tio kaj nur post tio rajtos malŝati la demonojn.

“Se ili estus ligitaj al korpoj similaj al la niaj, ili povintus diri: «Ni ne malkovras la homojn kiam ili estas kaŝitaj, sed kiam ni ilin trovis, ilin ni ruinigis». Tiukaze ankaŭ ni kapablu forfuĝi el ili, nin kaŝante kaj fermante antaŭ ili la pordojn.

“Sed la afero ne tias! Ili kaj ilia ĉefo, nome la diablo, povas eniri ŝlositajn pordojn, kaj staras ĉie en la aero, ili estas malbonaj kaj pretaj damaĝi kaj, laŭ la vortoj de la Sinjoro, la diablo, patro de aĉeco, estas mortiginto ek de la komenco⁷⁷.

“Sed ni nun vivas aŭ, pliprecize, ni vivas luktante kun li; evidentas, do, ke la demonoj havas neniun povon, tamen neniun loko malhelpas, ke ili aranĝu intrigojn kontraŭ ni, nek ili vidas en ni amikojn helpobezonajn, nek amas la bonon por nin korekti, kontraŭe ili estas eksterordinare malbonaj kaj nenion ili aprezas ol damaĝi la virtoŝatantojn kaj Dihonorantojn.

“Kaj pro ilia nekapablo ion ajn fari, nenion ili faras ol minaci. Se fakte, ili povus, neniam atendus, eĉ ili tuj damaĝus, ĉar al tio estas celanta ilia volo, precipe kontraŭ ni.

“Jen ni nun kunigitaj por paroli kontraŭ ili; kaj ili konscias sian feblecon se ni progresas. Tial, se ili povintus, neniam ili lasintus, ke ni kristanoj vivu, ĉar «por la pekulo la pieco estas abomeninda»⁷⁸. Sed ne havante iun ajn povon, ili damaĝas precipe sin mem, pro tio, ke ili povas efektivigi neniun el siaj minacoj.

“Krome nepras konsideri ankaŭ pri jeno por ne ilin timi: se ili havus povon ili ne venus amase, nek inventus aperojn, nek prenu aspektajn trompigajn, sed sufiĉus, ke el ili venus eĉ unuopule kaj farus kion ili volas kaj povas; kaj precipe kiu havas povon ne mortigas per aperoj nek ekscitas timon sin helpante per multaro; sed tuj, laŭvole, profitas sian povon. La demonoj, male, havante neniun povon, ludas sur la scenejo, transformiĝante kaj timigante la infanaron per amasa apero kaj per sia ekstera aspekto; tial, precipe necesas ili malŝati pro ilia malforteco.

“La verdiranta anĝelo, sendita de Dio kontraŭ la Asirianoj, ne bezonis aperojn, nek bruegojn, nek aplaŭdojn: li, male, silente sin servis je sia potenco kaj mortigis

⁷⁶ Temas pri induktaĵo ofta en kristanaj aŭtoroj, inter kiuj neforgesendas, krom la sama Atanazio, la verkistoj Juliano, Origeno, Aŭgusteno.

⁷⁷ Jo 8,44

⁷⁸ Sen 1,22

unutrafe centokdekkvinmilojn da homoj⁷⁹. Sed tiuj kiuj, same kiel la demonoj, havas neniun povon, provas timigi ankaŭ nur per aperoj”.

29. La diablo ne havas povojn, se Dio al li tion ne koncedas

“Se iu pripensas pri la historio de Ijob kaj diros: «Kial la diablo venis kaj al li ĉion aĉan kombinis: lin senigis je liaj posedaĵoj, mortigis iliajn filojn, lin trafis per maligna plago?»⁸⁰, nu, tiu devas rekoni, ke ne estis la diablo kiu agis per sia forto, sed Dio kiu tion koncedis por elprovi Ijob. Fakte, povante fari nenion, la diablo petis de Dio la povon kaj agis nur post ricevado de ĝi.

“Ankaŭ pro tio necesas malŝati eĉ pli la malamikon, ĉar, malgraŭ ke li tion volis, posedis povon eĉ ne kontraŭ unusolan justulon. Se li havintus povon ne tion petintus el Dio, sed ĉar tiun li petis, kaj almenaŭ dufojojn, evidentas, ke li estas malforta kaj senpova. Kaj ne strangas, ke li ne havis povon kontraŭ Ijob, ĉar eĉ kontraŭ lia brutaro okazintus nenio se Dio ne permesintus.

“La diablo havas povon eĉ ne sur liaj porkoj, ĉar, kiel estas skribite en la evangelioj, la demonoj insistis ĉe la Sinjoro dirante: «Permesu, ke ni eniru la porkojn». Sed se ili havas povon nek sur la porkoj, tiom pli prave ne havas aŭtoritaton sur la homoj kiuj estis faritaj laŭ la bildo de Dio⁸¹.

30. La askezo kaj la virto: du armiloj kontraŭ la demonoj

“Ni devas do timi antaŭ Dio kaj malŝati, samtempe, tiujn demonojn, ne atenti ilin nenimotive. Kiom pli ili faras damaĝojn, tiom pli ni, por ilin kontraŭstari, devas intensigi askezon, ĉar la honesta vivo kaj fido je Dio estas fortika rimedo kontraŭ ili.

“Ili fakte timas la fastecon de la askezuloj, maleltenas ties vigilojn, preĝadon, mitecon, trankvilecon, malŝatemon al la mono kaj al la vanteco, humilecon, almozdonemon al la povruloj, ilian kvieton kaj precipe ilian amon al Kristo. La demonoj ĉion elpensas por eviti esti tretitaj de ili: Ili konas la gracon kiu estis donita al la fideluloj kontraŭ ili far la Savinto kiam tiu ĉi diris: «Jen, mi liveris al vi la eblon paŝi sur la serpentoj kaj skorpiojn kaj sur ĉiun alian povon de la malamiko»⁸².

⁷⁹ 2 Re 19,35. Antono (Atanzio) ankoraŭ ne eniris la modernajn ne nur sciencajn kategoriojn, laŭ kiuj ne ĉiam biblio estas historio sed ankaŭ alegorio.

⁸⁰ Ijob 1,13-22 kaj 2,1-7

⁸¹ Mt 8,31; Mk 5,12; Lk 8,32 Kial tiom insisti pri la senpovo de la demonoj? La leganto informiĝu, ke la tendenco atribui aŭtonoman potencon al la diablo favoras al glitado en dualismon, tiutempe kaj tiuloke ĉiam ekallogantan, nome al la neado de ĉiopovon de Dio.

Dualismo estas tro facila respondo al demando: de kie la malbono?

⁸² Lk 10,19

31. Ni ne aŭskultu la demonajn antaŭvidojn ĉar senfundamentaj

“En la kazo, ke ili ŝajnis antaŭdiri la estontecon, neniu montru priatenti ilin; ofte, fakte, ili antaŭdiras, tagojn antaŭe, la alvenon de fratoj en la sekvaj tagoj kaj tiuj ĉi fakte alvenas. Sed ili faras tion ne pro sia prizorgo pri la aŭskultantoj, sed por tiujn ĉi konvinki konfidi je ili, por poste ruinigi tiujn kiuj falas en iliajn manojn.

“Tial ni ne aprezu ilin, sed, male ni alestiĝu por ili forpuŝi, eĉ se ili parolas prizorge al ni, ĉar ni ne bezonas ilin. Kio strangas se ili, havante korpon pli subtilan⁸³ ol tiuj de la homoj kaj vidinte tiujn kiuj jam komencis vojaĝi, komunikas alvenon de tiuj kiujn ili kure antaŭiris? Simile rajdanto povas antaŭdiri tion antaŭ ol tiu kiu piediras. Sekve de tio, eĉ ne tiukaze ni bezonas ilin admiri: ili ne antaŭscias nenion el tio kio ankoraŭ ne okazis. Nur Dio konas aferojn antaŭ ol ili okazos. Tiuj, male, komunikas kion ili jam vidis antaŭirante, kvazaŭ ŝtelistoj. Al kiom da personoj ili nun komunikas niajn paroladon (ĉar ni kuniĝis kaj parolas kontraŭ ili), antaŭ ol iu el ni iru disvastigi ĝin? Ankaŭ infano, rapida en la kuro, povas tion fari kaj preterpasi tiun kiu iras malrapide.



Hieronymus Bosch

Jenon mi volas diri: se iu ekvojaĝus el la Tebaido aŭ el alia regiono, la demonoj ne tion scias antaŭ ol tiu ĉi ekvojaĝus se vere li ekvojaĝos, sed, post kiam ili lin vidis ekvojaĝanta, lin antaŭiras kaj komunikas lian alvenon antaŭ ol li alvenas. Kaj tiel okazas, ke tiu ĉi fakte alvenos post kelkaj tagoj. Ofte, la demonoj sin trompis, kiam ekvojaĝintoj decidas hejmenveni”.

32. La demonoj antaŭdiras tion kion ili jam vidis

“Sammaniere okazas, ke kiam ili blagas pri la akvo de Nilo: vidinte, ke en la regionaj de Etiopo abundas la pluvoj kaj sciinte, ke kaŭze de tio okazos superabordiĝo de la rivero, antaŭ ol la akvo atingas Egiptujon, ĝin ŝajnprofete anoncas nur ĝin antaŭirante. Sed ankaŭ homoj tion antaŭdiras se ili tiom povus kuri tiom rapide kiom ili. Kiel la gardostaranto de Davido, supreniranta altan lokon, vidis la ekalvenanton antaŭ kaj pli precize ol restanto malalte, kaj komunikadis antaŭ ol la aliaj, antaŭkonigante ne tion kio jam ne okazis, sed tion kio estas ekokazanta, similaranĝe ankaŭ tiuj uloj surprenas la klopodon indiki unuj al la aliaj la aferojn ekokazantajn, sed nur cele de trompo.

“Tial, se la Providenco intertempe ŝanĝus decidon, rilate la akvon kaj la vojaĝantojn (ĉar tio eblas ĉe Ĝi), la demonoj trompiĝus kaj ties konfiduloj trompiĝus”.

⁸³ Laŭ Antono, la demonoj havas korpojn kneditajn el subtila materio, kiu ebligas, ke ili sin movu tre rapide. Tiu koncepto estas atestita ankaŭ en Teretuliano kaj en Aŭgusteno.

33. La demonoj konjektas, ne antaŭscias

“Tiamaniere naskiĝis la orakoloj ĉe la paganoj kaj sammaniere alifoje tiuj lastaj estis devojigitaj pro la demona ruzo; sed ankaŭ tiukaze la erarfontoj ĉesis kun la alveno de la Sinjoro, kiu «reduktis al nenio» la demonojn kaj ties verkojn⁸⁴. Fakte, ili nenion scias el si mem, sed liveras malprecizajn informojn, laŭfraŭda sia naturo, pri tio kion ili vidas ĉe aliaj kaj faras pli konjektojn ol antaŭdirojn. Tial, ankaŭ se foje ili dirus la veron, eĉ tiukaze ili estas spitdignaj.

“Ankaŭ kuracistoj, kiuj kompreneble informiĝas pri malsanoj, kiam vidas en aliaj la saman malsanon, ofte faras antaŭvidojn helpate de siaj spertoj; tiel ankaŭ ŝipgvidistoj kaj kampuloj⁸⁵, konstatinte la kondiĉojn de la aero, antaŭvidas, helpate de sperto, ke okazos sturmo aŭ serena vetero: kaj ne pro tio oni dirus ke ili antaŭdiras per dia inspiro.

“Tial, se ankaŭ la demonoj, konjektinte, faras similajn antaŭsupozojn, ne pro tio ni devas ilin admiri kaj atenti.

“Kaj krome, kiu avantaĝo alvenas, por la aŭskultanto, se mem anticipe alprenas de tiuj uloj kion okazontan? Kia hasto urĝas koni tiaĵojn, ankaŭ se laŭvere antaŭanoncitaj? Tio ne kongruas kun la virto kaj neniom indicas pri saĝa konduto: Neniu el ni estas juĝata pro nescio pri io, kaj neniu estas taksata feliĉa pro tio, ke li lernis kaj sciis, sed ĉiu estas juĝata pri jeno: ĉu li konservis la kredon, kaj ĉu plenumis senmalsincere la ordojn”⁸⁶.

34. Profetecdono postulas puran koron

“Tial, oni bezonas nealte konsideri tiaĵojn kaj ne praktiki askezon zorgante koni la estontecon, sed anstataŭe zorgi perfekte plaĉi al Dio. Kaj ni ne preĝu por koni la estontecon aŭ proklami tion kiel rekompenco pro la askezo, sed oni devas preĝi por ke la Sinjoro kunlaboru kun ni por venki la diablon.

Se ni ŝatas koni la estontecon, eĉ ununuran fojon, konservu pura la koron; mi, fakte, opinias, ke animo tute purigita kaj laŭforne de sia naturo povas, fariĝinte travidebla, travidi pli kaj pli fore ol la demonoj, ĉar ĝi havas la Sinjoron rivelacie inspiranta. Tia estis la animo de Eliŝa⁸⁷, kiam li vidis tion koncernantan Giezon kaj ekvidis la trupojn lin ĉirkaŭantajn”.

⁸⁴ 1 Kor 2,6; Heb 2,14

⁸⁵ La referenco al kuracistoj, ŝipgvidantoj kaj kampuloj, kiuj antaŭvidas perhelpe de sia sperto, troviĝas ne nur en aliaj kristanaj aŭtoroj, sed jam en Platono kaj en Cicerono, ĝuste en la sama kunteksto de paralelismo kun supozitaj “antaŭvidoj” de demonoj.

⁸⁶ La laŭvirta perfektigo ne estas konstituata el karismaj donoj, sed el konstanta tensio al la virto. 2 Tim 4,7; 1Tim 6,14

⁸⁷ En 1-2 Reĝoj. Ni jam rimarkigis kiel Atanazio, skizante la figuron de Antono, ofte altirigas la atenton sur la grandaj “herooj” de la Malnova Testamento, por sugesti, per iaspeca paralelismo, la analogion kiu similigas lian personulon al tiuj virtaj homoj de Dio. En tiu teksto, estas elvokata, perbuŝe de la sama Antono, la figuron de Eliŝa, kiu bone taŭigas substreki la gravon de la korpureco por ricevi el Dio la donon de la profetio.

35. Kiel distingi la bonajn spiritojn de la malbonaj

“Konsekvence, kiam la demonoj direktiĝas noktotempe al ni kaj volas antaŭdiri la estontecon aŭ diras: «Ni estas la anĝeloj»⁸⁸, vi ilin ignoru, ĉar ili mensogas. Kaj se ili laŭdas vian askezon kaj vin proklamas feliĉaj, vi ili ne aŭskultu kaj neniel konsideru ilin. Krucsignu, anstataŭe, vin kaj viajn loĝejojn, kaj preĝu: vi vidu, ke ili malsaperos, ĉar ili estas malkuraĝaj kaj timegas la signon de la sinjora kruco ĉar per ĝi la Savinto ilin «senvestigis kaj faris je ili publika spektaklo»⁸⁹. Se plue ili insistas eĉ per plej granda senhonteco, dancante kaj sin montrante en diversaj aperoj, ne timu, ne lasu vin mirkonsterniĝi kaj ne atentu ilin kvazaŭ bonajn spiritojn. Eblas kaj facilas distingi la ĉeeston de la spiritoj malbonaj disde tiuj bonaj, se Dio tion koncedas. La vizio de anĝeloj ne ekscitas malkvieton: «ne konfliktos, nek krios kaj ne aŭdeblos ilia voĉo»⁹⁰. La apero de la anĝeloj prezentiĝas trankvila kaj dolĉa, tiel ke tuj en la animo estiĝas ĝojo, feliĉo kaj kuraĝo: nestas en ili la Sinjoro, kiu estas nia ĝojo, kaj la potenco de Dio Patro⁹¹. La pensoj de la animo daŭras resti senĝenaj kaj senagitiĝaj, tiel ke ĝi, iluminita, vidas el si mem la aperantojn; intensa deziro pri la diaj bonoj kaj pri tiuj promesitaj ĝin invadas kaj ĝi volus esti kunigita kun tiuj bonoj, se ĝi povus iri kune kun ili.

“Kaj se iuj, pro sia homa kondiĉo ektimus la vizion pri bonaj spiritoj, la aperantoj formovas tiun per amo; same kiel faris Gabrielo por Zekario, la anĝelo aperinta sur la dia tombo kaj tiu kiu, en la evangelio, diradis al la paŝtistoj: «ne timu»⁹². La timo pro tiuj spiritoj devenas ne de etanimeco, sed el konscio pri ĉeesto de supernaturaj estuloj. Tia estas la apero de anĝeloj”.

36. Signoj certigantaj pri la ĉeesto de spiritoj bonaj kaj malbonaj

“Tial la ensalto kaj apero de malbonaj spiritoj, male, estas tumulta, akompanata de krakado, bruego kaj krioj, kiel tra la junuloj senedukaj aŭ rabistoj. Post tio tuj sekvas malbraveco, malordiĝo, konfuziĝo en la pensoj, malkuraĝiĝo, malamo al la asketuloj, malemo, malĝojo, rememoro pri la familianoj kaj timo de la morto, pelmelemo al la virto kaj malordo en la kutimoj.

Kiam do, post la apero de spiritoj, vi ektimas, se la timo foriras tuj kaj en ĝia loko produktiĝas nedirebla ĝojo, gajo, kuraĝo, konsolo, trankvileco en la pensoj kaj ĉio tio de mi dirita antaŭe, kaj plue animforto kaj amo al Dio, kuraĝiĝu kaj

⁸⁸ 2 Kor 11,14

⁸⁹ Kol 2,15

⁹⁰ Mt 12,19; Jes 42,2

⁹¹ Rm 1,16; 1 Kor 18,24

⁹² Lk 1,13ss, 2,10; Mt 28,5

preĝu: ĝojo kaj stabileco de la animo montras la sanktecon de la estulo estiĝanta.

Tiel Abrahamo, vidante la Sinjoron, «ĝojegis», kaj Johano la Baptano, ekaŭdinte la voĉon de la Dipatrino, Maria, «eksaltis ĝoje».

Se, male, ĉe la ekapero de iuj spiritoj naskiĝas timo, bruego elekstere, mondum-ecaj aperoj, mortminacoj kaj ĉio pri kio mi supre traktis, oni sciuj, ke okazas atako de malbonaj spiritoj”.

37. La ekzemplo de la Sinjoro

”Indice servu ankaŭ jeno: kiam la animo de iuj persistas en malkuraĝiĝo, certe temas pri ĉeesto de la malamiko; la demonoj; la demonoj fakte ne pelas el tiuj animoj tian malnoblecon, kion male faris la granda ĉefanĝelo por Maria kaj Zehajo kaj tiu kiu aperis al la virinoj ĉe la tombo. Kontraŭe, kiam ili vidas senkuraĝajn animojn, ili pliintensigas siajn aperojn por ilin pli timigi kaj, atakante, ilin primoki dirante: «Terfalu kaj adoru nin»⁹³ Tiel ili trompis la paganojn, tiel ili estis trompe taksitaj dioj far tiuj ĉi.

”Sed la Sinjoro ne permesis, ke ni estu trompitaj de la diablo ĉar, kiam tiu ĉi efektivigis antaŭ li tiajn aperojn, li riproĉis per jenaj vortoj: «Iru for, Satano, ĉar estas skribate: «Adoru la Sinjoron, vian Dion, kaj servu al li sole»⁹⁴.

”Tial ni malŝatu ĉiam pli tian ruzaĉulon, ĉar kion diris la Sinjoro, tion li faris por ni por ke la demonoj, aŭdante de ni la samajn vortojn, estu trafitaj de la Sinjoro mem kiu per tiaj vortoj ilin riproĉis”.

38. Forĵeti la demonojn kaj fari sanigojn estas donacoj de la Sinjoro

“Ne oportunas, do, fieri pri kapablo peli demonojn, nek ekzaltiĝi pro la sanigado, kaj nek admiri nur tiun kiu forigas la demonojn malestimante tiun kiu ilin ne sukcesas forigi

“Ni ekzameni, anstataŭe, la askezon de ĉiu kaj ni provu ĝin imiti, ĝin ripeti aŭ ĝin korekti: fari miraklojn ne estas nia tasko, sed de la Savinto. Li diradis al la disĉiploj: «Ne ĝoju pro tio, ke la demonoj submetiĝas al vi sed pro tio ke viaj nomoj estas enskribitaj en la ĉieloj»⁹⁵; la fakto ke niaj nomoj estas enskribitaj en la ĉieloj estas atesto de nia virto kaj de nia vivo, dum forĵeti demonojn estas graco de Dio donace liverita. Al tiuj kiuj fieriĝis ne pri la virto, sed pri siaj mirakloj, kaj kiuj diris: «Ĉu ne estas je via nomo, ke ni forĵetis la demonojn kaj ni faris miraklojn?», la Sinjoro respondis: «Laŭvere mi vin diras, mi vin ne konas». La Sinjoro fakte ne konas la vojojn de la aĉuloj.

⁹³ Mt 4,9

⁹⁴ Mt 4,10; Read 6,13

⁹⁵ Lk 10,2

«Entute, kiel mi diris antaŭe, ni bezonas preĝi por ricevi la difavoron de la distingo de la spiritoj por ke, kiel estas skribite, «ni ne konfidu en ĉiu spirito»⁹⁶.

39. Antono rakontas sian sperton pri la demonoj

“Mi volus silenti kaj ne paroli pri mi kaj limiĝi nur al la supraj vortoj. Tamen, por ke vi ne kredu ke mi parolas pri tiaĵoj senpripense, sed kredu ke mi rakontas elsperte kaj laŭvere (kvankam eĉ nur pro tio oni povas min taksi frenezulo⁹⁷; sed la Sinjoro, kiu nun min aŭskultas, konas la sincerecon de mia konscienco⁹⁸ kaj scias, ke mi parolas ne por mi, sed pro dankemo al via amo kaj pro via instruo), mi al vi informos pri tiaj makinaĵoj kiujn mi spertis aĉtervene de la demonoj.

“Kiom da fojoj ili min proklamis feliĉa dum mi ilin forpuŝis je la nomo de la Sinjoro! Kiom da fojoj ili al mi antaŭdiradis pri inundo el la rivero kaj mi al ili diradis: «Sed kial tio interesas vin?». Kaj ili alvenis minacante kaj min ĉirkaŭante kiel soldatoj armitaj de kapo ĝis piedoj. Alifoje ili plenigis la hejmon je ĉevaloj, je sovaĝaj bestoj kaj serpentoj sed mi ekkantis psalmojn: «Tiuj ĉi orgojlas pro siaj ĉaroj kaj tiuj aliaj je siaj ĉevaloj, ni kontraŭe estos glorigitaj per la nomo de la Sinjoro, nia Dio»⁹⁹. Kaj per la preĝoj ili estis malproksimigitaj pro la interveno de la Sinjoro.

“Unufojon ili venis dum mallumo, sed ŝajnis, ke el ili radius lumo, kaj diris: «Ni venis por lumi por vi, Antono», sed mi ferminte la okulojn, preĝis kaj tuj malfajriĝis la lumo de la malbonuloj. Kelkajn monatojn poste, ili revenis psalmante kaj citante la sanktajn Skribojn¹⁰⁰, sed mi «kiel surdulo ilin ne aŭdis»¹⁰¹. Alifojon ili skuis mian solecan loĝejon, sed mi preĝis, ke mi restu senmova en la animo.

Post tio ĉio, reveninte, ili bruis, fajfis kaj dancis; sed apenaŭ mi ekpreĝis kaj ekuŝiĝis recitante psalmojn, tuj ili eklamentis kaj ekploris, kvazaŭ ili estus senfortigitaj.

“Mi male glorigis la Sinjoron kiu faligis kaj metis en abomenon iliajn altrudon kaj furiozon”.

40. Antono forpelas la demonojn dank'al la helpo de Kristo

“Unufojon aperis iu demono enorma aspekte kaj aŭdace diris: «Mi estas la potenco de Dio; mi estas la providenco. Pri kio vi deziras, ke mi vin kontentigas?». Tiam

⁹⁶ 1 Jo 4,1

⁹⁷ 2 Kor 11,16 kaj 12,6.11

⁹⁸ 2 Tm 1,3

⁹⁹ Ps 20,8

¹⁰⁰ Tiel sin kondukis kun Jesuo (Mt 4,6”).

¹⁰¹ Ps 37,14

mi blovis¹⁰² denove eĉ pli forte sur lin, eldirante la nomon de Kristo, kaj klopodis lin bati (kaj ŝajnis, ke ni sukcesis) kaj subite je la nomo de Kristo, tia demonformo malaperis kun ĉiuj siaj.

“Alifojon plue, dum periodo de mia fastado, la trompulo venis subaspekte de monaĥo kaj min konsilis per jenaj vortoj: «Manĝu, kaj ĉesu el ĉiuj viaj penoj: homo estas ankaŭ vi kaj jam ekmalsaniĝanta». Mi tamen, ekkonsciiĝinte pri la insido, leviĝis por preĝi kaj la ulaĉo tion ne eltenis, ĉar malaperis kaj ŝajnis eliri el la pordo «kiel fumo».

“Kiom da fojoj li en la dezerto aperigis antaŭ mi oraĵojn nur cele, ke mi ilin tuŝu kaj ekzamenu. Mi male ekrecitis psalmon kontraŭ lin kaj li foriĝis. Ofte la demonoj min batadis kaj mi eldiradis: «nenio apartigos min de la amo de Kristo»¹⁰³, kaj post tio ili sin batis reciproke.

Ne estis mi kiu devigis, ke ili ĉesu kaj faris ilin senpovaj, sed la Sinjoro, kiu diras. «Mi vidis Satanon falanta (el la ĉielo), kiel fulmo»¹⁰⁴. Se pri mi, filoj miaj, rememoriginte la vortojn de la apostolo, «mi min prezentis kiel ekzemplon por ke vi lernu»¹⁰⁵ ne malkuraĝiĝi en la askezo kaj ne timi la aperojn de la diablo kaj de ties demonoj»”.

41. Satano venkita de la monaĥoj

“Ĉar mi, pro la rakontado pri tio, estis juĝata freneza, atentiĝu plue rilate jenon por ke vi ne timu kaj, vi min fidu, mi ne mensogas.

“Tun tagon kelkiu frapis ĉeporde de mia soleca loĝejo; elirinte, mi vidis ulon nekredeble altan; lin petante: «Kiu estas vi?». la ulaĉo respondis: «Mi estas Satano». Tiam mi insistis: «Kial vi estas ĉi tie?», kaj li: «Kial monaĥoj kaj ĉiuj aliaj kristanoj min riproĉas senmotive ĉar ili min malbenas ĉiujn momentojn?». Kaj kiam mi lin demandis: «Kial vi ilin molestas?», li respondis: «Ne estas mi, sed ili mem kiuj molestas sin, ĉar mi estas malfortigita: ĉu ili ne legis, ke ‘por ĉiam estis terenĵetitaj la fortresoj de la malamiko kaj la urboj kiujn li detruis?’ Mi havas ne pluan lokon, nek ian ajn armilon, nek ian ajn urbon. Ĉiuloke troviĝas kristanoj; cetere ankaŭ la dezerto plenpleniĝis je monaĥoj: ke ili prizorgu pri si mem kaj ne malbenu min semotive!». Tiam, admirinte la dian gracon, mi al li diris: «Malgraŭ ke vi estas ĉiam mensoga kaj neniam diras la veron, tamen, senvole, vi nun diris ion veran, ĉar la Sinjoro per sia alveno vin faris feblaj kaj vin terenfaliginte senigis je ĉiu armilo». Tiu, tiam, aŭdinte

¹⁰² La rito de blovado sur la diablo, por manifesti sian volon de rezigno pri li kaj iliaj allogaĵoj, estis praktikita dum la baptito: katekumeno, informas Pseŭdo-Dionizio Areopaga, estis invitita surblovis trifojojn Satanon.

¹⁰³ Rm 8,35.39

¹⁰⁴ Lk 10,18

¹⁰⁵ 1 Kor 4,6

la nomon de la Sinjoro kaj ne eltenante la brulefikojn provoktajn per tio, malaperis”

42. La demonoj retiriĝas se ni nin montras netimantaj pro ili

“Se do la diablo persone akordiĝas pri la fakto, ke li jam havas neniun povon, ni devas senhezite malŝati jen lin jen liajn demonojn. Tiaj estas la ruzpovoj kiujn la malamiko kun siaj hundoj posedas; sed ni, informite pri ilia malforteco, povas ilin malŝati.

“Tiel ke ni ne nin allasu deprimiĝi! Ne okazu, ke ni venkiĝu pro pensoj kiuj igas nin malkuraĝaj. Kaj ni ne kreu al ni ĝenojn dirante: «Espereblas, ke la diablo ne venu por min distaŭzi; espereblas, ke li min ne levu por min ĵeti teren kaj ke li min ne surprizu kaj sukcesu min teruri».

“Neniom malfruiĝu sur tiaĵoj kaj ne suferu, kvazaŭ ni estas plongantaj en ruinon, sed prefere ni estu kuraĝaj kaj ĉiam ĝoju pro tio, ke ni estas savitaj. Ni rezonu, en nia animo, pri la fakto, ke estas kun ni la Sinjoro, kiu ilin forigis kaj depotencigis. Ĉiam konsideru kaj pripensu, ke la malamikoj neniel nin damaĝas ĝis kiam la Sinjoro estas kun ni. Fakte kiam ili venas, kiajn nin ili trovas, tiajn ili sin faras rilate nin: ili akomodas siajn iluziigojn al la dispozicioj kiujn ili trovas en nia animo.

“Tial, se ili trovos malkuraĝajn kaj distaŭzitajn homojn, tuj, kiel rabistoj, ili nin alsturnas, ĉar ili trovis lokon malzorgatan, kaj faros, plue, kion ni jam pensas en ni mem. Se ili nin konstatas ĝenitaj kaj malkuraĝaj, ili plue pliigas nian malkuraĝiĝon per iliaj aperoj kaj minacoj kaj do pro tio nia malfeliĉemo estos plitormentita. Se, totalie, ili nin trovos ĝojaj en la Sinjoro, ensorbitaj en la penso pri la estontaj bonoj, en medito pri la «aferoj de la Sinjoro»¹⁰⁶ kaj en la konsidero pri la fakto, ke ĉio estas en la manoj de la Sinjoro, kaj pri la fakto, ke nenion povas demono kontraŭ kristano, nome ke demono havas neniun povon sur neniuj, ili, vidinte la animon sekurigita tra tiaj pensoj, iros malantaŭen hontplenaj.. Tiel la malamiko, trovinte Ijobon fortigita ĉiuflanke, iris foren el li; dum kiam li trovis Judason sena je tiuj defendiloj, lin kaptis prizonulo.

“Sekve, se ni volas malestimi la malamikon, ĉiam pripensu pri la «aferoj de la Sinjoro» kaj nia animo «ĝoju» ĉiam «pro la espero»¹⁰⁷; vi vidos tiam, ke la ŝercoj de la demonoj estas kiel fumo foriĝanta anstataŭ postkuranta. La demonoj, fakte, kiel jam dirite, estas ekstreme malkuraĝaj, ĉiam antaŭvidantaj «la fajron preparitan por ili”.

¹⁰⁶ 1 Kor 7,32. La paŭla teksto pri la celibato, en kiu la apostolo invitas ĝuste prizorgi ĉe la “aferoj de Dio”, ĉi tie estas referata al la monaĥoj.

¹⁰⁷ Rm 12,12

43. Ni demandu la estulojn aperantajn

“Por ne timi la demonojn, vi havas je via dispono la jenan juĝnormon. Neniu estu venkata de la timo kiam okazas apero, sed, antaŭ ĉio, ĝin kuraĝe pripetu pri ĝia naturo: «Kiu vi estas? De kie vi venas?». Se temas pri apero de Sanktuloj, ilin vin trankviligos kaj transformos vian timon en ĝojon; koncerne tamen diabla apero, ĝi malfortiĝas tuj se ĝi alfrontas spiriton firman. Evidente la nura fakto demandi taksigiĝis pruvo de trankvileco.

“Tiel la filo de Nun, Josuo, lernis demandante, kaj sammaniere, la malamiko ne povis eskapi el la demandoj de Danielo”¹⁰⁸.

44. La ĉiela urbo en la dezerto

Ĉiuj ĝojis dum Antono rakontadis tiaĵojn, kaj en la unuj kreskis la amo al la virto, en aliaj, kiuj estis maldiligentaj, naskiĝis kuraĝo, en aliaj plue ĉesis orgojlo. Ĉiuj fariĝis decidaj al la malŝato pri la demonoj, pro admiro pri la graco de la distingo de spiritoj donita de la Sinjoro al Antono.

Sur la montoj la ermitaj loĝejoj estis do kiel tendoj resonantaj pro diaj ĥoroj de himnantoj psalmojn, legantoj Skribojn, inter fastoj kaj preĝoj, ĝojantoj en la espero pri estontaj bonaĵoj, laborantoj por povi almozdoni kaj vivantoj en amo kaj unuanima konkordo. Tie vere konstatablis regiono en kiu regnas pieco kaj justeco; tie neniu suferis pro maljusteco, nek estis malkontento pro impostenkasigisto, sed estis multego da ermitoj havantaj kiel unusolan prizorgon la virton, tiel ke iu kiu siavice vidintus la apartigitajn loĝejojn kaj tian monahan vivsystemon povintus laŭtesprimi: ”kiel belaj estas viaj tendoj, ho Jakob, viaj loĝejoj, ho Izrael. Ili estas kiel enombraj valoj, kiel ĝardeno apud rivero, kiel tendoj (arboj?) plantitaj de la Sinjoro, kiel cedroj apud akvo”¹⁰⁹.

45. Nepras zorgi pli pri la animo ol pri la korpo

Li do, retiriĝinte en soleco laŭ sia kutimo en sia loĝejo, intensigis askezajn praktikojn; ĉiutage suspiris konsiderante la ĉielajn loĝejojn, adresinte al ili sian deziron kaj meditante pri la mallongeco de la homa vivo.

Kaj kiam li estis ekmanĝanta kaj ekdormanta, aŭ prizorgante en aliaj korpaj flegindaĵoj. mem sentis honton pensante al la intelekta parto de la animo. Ofte, dum li estis ekmanĝanta kun multaj aliaj monaĥoj, je la ekmemoro pri la spiritaj nutraĵoj, sin senkulpigis kaj malproksimiĝis el ili taksante honton esti vidita manĝanta¹¹⁰.

¹⁰⁸ Dn 13,44-62

¹⁰⁹ No 24,5-6

¹¹⁰ Ermito hontis manĝi pro tio, ke lia korpo kaj homa febleco malhelpis, ke mem restu konstante kunigita, mense kaj materie, al sia Dio. La sanktulo anhelas la totalan kaj definitivan unuiĝon kun sia Dio.

Li do manĝadis tute sola, laŭ sia fizika bezono, sed ofte ankaŭ kun la fratoj: li hontis antaŭ ili, tamen montradis ĝojon pro la profito devenanta el la senvuala konversacio kun ili.

Li diradis, ke necesas dediĉi la tutan liberan tempon al la animo anstataŭ al la korpo kaj koncedi al la korpo malmulte da tempo laŭ neceso kaj, ĝenerale, elspezi la tempon avantaĝe al la animo kaj serĉi kion utilan al ĝi, por ke ĝi ne estu suben altirita de la korpaj plezuroj, sed prefere la korpo estu de ĝi reduktita al sklaveco¹¹¹.

Tiusencaj estis la vortoj de la Savinto: «ne faru al vi zorgojn pri io, kion vi manĝu; nek pri via korpo, kion vi surmetu. Vi ne penu por trovi kion manĝi aŭ trinki kaj ne maltrankviliĝu, ĉar Patro via scias ke vi bezonas ĉion tion. Celu prefere la dian regnon kaj ĉio tio estos aldonita al vi»¹¹².

46. Antono asistas suferantojn martiriĝon dum la persekutado de Masimino

Post tio, falis sur la eklezion la persekutado de la Masiminaj tempoj (309-313). Kiam la sanktaj kondamnitaj al martiriĝo estis kondukataj al Aleksandrio, ankaŭ li, forlasinte sian solecan loĝejon, ilin sekvis dirante: ”Ni iru pugni se al tio ni estis alvokataj, aŭ ni iru admiri tiujn kiuj pugnas”.

Kaj dezirante suferi martiriĝon, sed, ne volante sin transdoni siainiciate, li flege engaĝiĝis inter la kredkonfesantoj en la minoj kaj en karceroj. Grandan zorgon li montris en tribunalo: kuraĝigis al la lukto la juĝotojn, ilin asistis dum ilian kredateston kaj akompanis ĝis ilia morto.

La juĝisto tial, vidinte la sentiman zorgon de Antono kaj de ties kunuloj en tia flego, ordonis, ke neniuj monaĥoj eniru juĝejon kaj eĉ ke neniuj monaĥoj loĝu en la urbo. Ĉiuj sin kaŝis tiun tagon, krom Antono kiu pro tio tiom ne ĝeniĝis ĝis tiupunkte ke, levinte sian mantelon, la sekvan tagon sin montre metis en altan lokon publike observeblan kaj sin igis vidata de la prefekto. Kaj dum ĉiuj miris pro tio kaj la prefekto, revenante postjuĝe el la tribunalo, lin vidis, li restis senmova kaj kvieta montrante tiel la ardon de ni kristanoj.

Kiel mi jam diris, li revis ricevi martiriĝon: tial, li similis al tiu kiu malĝojas pro tio ke al li ne estis destinita la martiriĝan sorton. Sed la Sinjoro prigardis lin por bono nia kaj alies, por ke Antono fariĝu pro multaj majstro en la askezo kiun mem lernis el la Skriboj. Fakte, eĉ nur vidinte lian vivkonducon, multaj strebadis imiti sian vivmanieron. Laŭ komuna kutimo, li daŭrigis helpe servi la kredkonfesantojn kaj, “kvazaŭ al ili katenita”¹¹³, tute sin elŝpezis je ilia servo.

¹¹¹ 1 Kor 9,27

¹¹² Lk 12,22.29; Mt 6, 31-33

¹¹³ Heb 13,3

47. *Reveninte al sia ermita loĝejo, Antono plifortigas en si mem askeziĝo*

Post la ĉesado de la persekutado kaj la martiriĝo de la episkopo Petro, Antono foriris kaj plu retiriĝis ĉe sian solecan loĝejon; kaj tie ĉiutage realigadis la martiriĝon en sia konscienco¹¹⁴ kaj bataladis la luktojn por sia kredo.

Li sin dediĉis al la askezo konstante kaj ĉiam pli fervorece. Li insiste fastadis kaj kiel vesto surmetis interne haraĵon kaj eksterne haŭtaĵon. Ĝis la morto li daŭre evitis bani sian korpon por la purigado kaj ne purigi siajn piedojn kaj ilin mergi en akvon sennecese¹¹⁵. Neniu lin vidis senvestan, neniu vidis nudan lian korpon eksepte kiam jam mortinta oni devis lin entombigi.

48. *Sanigo de demonposedatino*

Kvankam Antono, apartiĝinte, estis proponinta al si trapasi tempoperiodon evitante eliri kaj ricevi iun ĉe sia rezidejo, alkuris lin molesti armea oficiro, iu Martiniano, pro tio, ke ties filino estis turmentata de la diablo. Kaj, dum tiu ĉi daŭrigis resti kaj frapi ĉe lia pordo, petante, ke li eliru por preĝi al Dio por sia filino, Antono ne konsentis malfermi al li; sed, sin montrante el alto al li laŭtvoĉis: "Ho homo! Kial vi krias kontraŭ mi? Mi estas nur homo kiel vi. Sed se vi fidas je Jesuo Kristo, al kiu mi servas, iru, preĝu al Dio kun tuta via fido kaj okazos tio kion vi petis". Tuj tiu, fidplena, foriris kaj, post alpreĝo al Kristo, lia filino estis purigita je la diablo.

La Sinjoro, kiu diras: "petu kaj al vi estos donita", faris multajn aliajn mirindaĵojn permane de Antono. La plejgranda parto de la malsanuloj, pro tio ke li ne malfermis la pordon, dormadis apenaŭ ekstere de lia soleca loĝejo kaj tiuj kiuj vere kredis kaj sincere preĝis ricevis purigadon".

49. *Antono serĉas ermitecon por forfuĝi el homamaso*

Jam certiĝinte, ke mem estas ĝenata de multaj kaj malebligata retire vivi laŭ sia deziro, por eviti fieriĝi pro la verkoj kiujn la Sinjoro plenumadis pere de li, aŭ, ke kelkiu ekestimu lin pli ol la vero, Antono pripensis la aferon kaj decidis rifuĝi en alta Tebaido, ĉe personoj lin nekonantaj. Tial, post kiam li ricevis de siaj kunfratoj panojn, li sidiĝis ĉe la riverbordo por vidi ĉu hazarde pasas ŝipeto sur kiu li enŝipiĝu kun maristoj.

Li estis ĵus tion decidinta kiam voĉo el la ĉielo lin pridedmandis: "Antono, kien vi iras? kaj kial?". Kaj li, pro nenio ĝenata, eĉ, kvazaŭ li estus kutimiĝinta esti alvokita tiamaniere, ĉe aŭdo de tia voĉo respondis: "Mi volas iri al Alta

¹¹⁴ Tia esprimo, kiu referencas al 2 Kor 1,12, volas signifi, ke la vivo de la monaĥo, kun sia ĉiutaga askezo, estis konsiderata kiel ekvivalenton de martiriĝo. Tiutipaj konsideroj troviĝas, ekzemple, en Ambrozio kaj Hieronimo.

¹¹⁵ Pro spiritalaj motivoj, ermitoj foje pelis siajn askezaĵojn ĝis ekstrema neglekto pri sia korpo. La tempopaso kaj pli raciecaj kaj kredaj atingoj mildigis eĉ la monaĥajn kutimojn.

Tebaido, ĉar homamaso min ne lasas vivi trankvile, pro tio, ke multaj loĝantoj ĉi-najbare min makvietigas, kaj ĉefe ĉar ili pripetas ĉe mi aferojn kiuj superas mian povon.”. Sed la voĉo al li insistis: ”Eĉ se vi suprenirus Tebajden, eĉ se vi malsuprenirus Bukolion¹¹⁶ kiel vi deziras, vi devus superi penojn certe pli grandajn, eĉ duoblajn. Se, male, vi volas vivi trankvile, iru nun en la internan dezerton”¹¹⁷.

Kaj Antono: “Kaj kiu al mi indikos la vojon? Ĉar min ĝin ne konas” kaj subite la voĉo al li indikis Saracenojn¹¹⁸ ekenirantajn tiun vojon.

Tiam Antono adresiĝis al ili, kaj, proksimiĝinta, petis, ke ili lin konduku en la dezerton; tiuj, kvazaŭ ordone de la Providenco, lin volonte akceptis. Post tritaga kaj trinokta paŝado kun ili, li atingis monton tre altan¹¹⁹; ĉe la piedoj de la monto fontis kristalpura akvo, dolĉa kaj freŝa, kaj ne multe fore etendiĝis plano kun altaj palmoj en forlasiteca kondiĉo.

50. La monto en la interna dezerto

Antono, kvazaŭ puŝite de Dio, enamiĝis al la loko ĉar ĝi estis ĝuste tiu indikita de voĉo al li parolinta ĉe la riverbordo.

Ĉe la komenco, ĉar jam ricevinte kelkion da pano fare de siaj kunvojaĝantoj, li restis soleca sur la monto, sen do homkompanio. Li daŭre restis en tiu loko kvazaŭ ĝi estus lia persona loĝejo. La Saracenoj, konstatinte la ardon de Antono, intence trairadis tiun vojon, kaj portadis panojn. Ankaŭ la palmoj tiam havigis al li kelke da malgranda kaj momenta komforto.

Sekve, kiam al liaj fratuloj estis konigita lia loĝloko, tiuj ĉi kiel filoj rememorantaj pri sia patro, prizorgadis sendi al li nutraĵojn. Sed kiam Antono konsciiĝis ke, per la preteksto de la pano-provizado, iuj ĝene kaj pene streĉiĝis, dezirante ŝparigi al la monaĥoj eĉ tiun laciĝon, pripensante ene de si kun si, petis al iuj lin vizitantoj, ke al li estu provizitaj pioĉo, adzo kaj io da tritiksemaro. Kiam ĉio estis portita, ekesplore ĉirkaŭirinte la monton kaj trovinte tre etan adekvatan terpecon, li tiun ekkultivis kaj, havante abundon da akvo, semis la grenon. Tion farante laŭplurjare, li havigis el tio sian panon kaj estis tre feliĉa ne ĝeni kelkan kaj eviti esti, ĉiubezone, je ŝarĝo de aliaj,

¹¹⁶ Ĉe marĉejo en la Nila delto

¹¹⁷ Eble temas pri la araba dezerto

¹¹⁸ Saracenoj estis tribo de Arabio, en postaj epokoj la termino “saraceno” estis uzita kiel sinonimo de “arabo” sendistinge.

¹¹⁹ Tradicio lokigas la solecejon de Antono en la araba dezerto najbare de Quadi-al-Arab, tridek kilometrojn el Ruĝa Maro, kie hodiaŭ troviĝas la monaĥejo Deir-amba-Antonos (Deir-al Arab): Antono nomis tiun lokon “la interna monto”, eble por ĝin distingi el la “ekstera monto” Pispir, kien li de tempo al tempo revenis por viziti siajn disĉiplojn. La idilia priskribo pri la nova loĝejo de la ermito kaj, aparte, la abundo de freŝa kaj klara akvo estas komuna diro ankaŭ ĉe aliaj aŭtoroj.

Pliposte, vidinte, ke iuj insistis lin viziti, li ekkultivis kelkion da legomoj¹²⁰, por ke liaj vizitantoj ricevu ion da revigligo post tiom da pena marŝado.

Ĉe komence dezertaj sovaĝaj bestoj, puŝitaj el bezono sensoifige trinki, ofte ruinigis lian semitaĵon kaj kultivaĵojn. Tiam, kaptinte unu el tiuj sovaĝbestoj, li diradis al ĉiuj: “Kial vi min tiel damaĝas, dum mi neniam vin damaĝis? Foriru kaj en la nomo de la Sinjoro ne plu alproksimiĝu al tiu-ĉi loko!”. Kaj de tiu momento, kvazaŭ timante pro la ricevita ordono, ili ne plu apudiĝis al tiu loko¹²¹.

51. Kromaj luktoj de Antono kun la diablo

Antono do daŭrigis solece travivi en la parto pli interna de l’ monto, sin dediĉante al la preĝo kaj askezo. La vizitantoj kunfratoj petegis por ke lin ili povu flegi kaj, monaton post monato, ili kumportis olivojn, legomojn kaj oleon, ĉar li jam estis maljuna.

Helpe de tiuj kiuj lin vizitis ni scias kiom da luktoj li, restante tie, devis alfronti ne la karnon kaj sangon, sed siajn malamikojn, nome la demonoj¹²². Eĉ tie ili fakte ofte aŭdis bruegojn, diversajn voĉojn kaj armilsonojn, nokte ili vidis la monton fajrerplenan kaj konstatis, ke Antono luktadis kun videblaj kontraŭuloj kaj preĝadis por rezisti al ili.

Antono daŭre inspiris kuraĝon al siaj vizitantoj kaj, se plue diri pri li, li engaĝiĝis en sia lukto surgenuiĝante kaj preĝadresigante al Dio. Kaj vere mire estis ke, kvankam sola en tia dezerto, li ne sentis timon pro demonoj lin sturmantaj kaj, malgraŭ la diversaj sovaĝaj bestoj tie vagantaj, eĉ tiuj ĉi lin ne ĝenis pro sia kruelemo. Sed li, kiel estis jam skribite¹²³, sin nutris je vera fido en la Sinjoro, havante, “kiel monto Siono”, la spiriton firma kaj ne malkvieta, tiel ke la demonoj preferis fuĝi kaj la sovaĝaj bestoj, kiel jam skribite¹²⁴, pacpakti kun li.

52. Antono evitas la trompojn de la diablo

La diablo, kiel kantas Davido en sia psalmo¹²⁵, kaŝobservis Antonon kaj “grancidis la dentojn kontraŭ li, sed Antono estis komfortata de la Savinto kaj vivadis tute defendita kontraŭ ties ruzoj kaj insidaj diversaĵoj.

¹²⁰ Tiel faris ankaŭ sankta Pakomio

¹²¹ La povo sur la bestoj retrovis, kun la pureco kaj interna paco, la harmonion kun la kreitaro, nome la paradiza kondiĉo de la homo antaŭ la origina peko: estas temo ofta en la hagiografia literaturo.

¹²² Ef 6,12

¹²³ Ps 125

¹²⁴ Ijobo 5,23

¹²⁵ Ps 35,16

Iun nokton dumdorme, la diablo kontraŭ lin sturme adresigis sovaĝajn bestojn kaj preskaŭ la tutan hienaron de la dezerto, elirintajn el siaj kuŝejoj, lin ĉirkaŭis kaj li, do, staris en la mezo: Sed ĉar ĉiu el ili malfermegis la faŭkojn minacante lin mordi, li, kompreninte la artifikojn de la malamiko, ĉiujn alparolis: “Se vi ricevis povon kontraŭ min, mi estas preta min lasi vori de vi; sed se vi estis subaĉetitaj de la demonoj, ne malfru: retiriĝi ĉar mi estas «servisto de Kristo»”¹²⁶.

Ĝus diritaj tiuj vortoj de Antono, tiuj forfuĝis, kvazaŭ forpuŝitaj per la skurĝo propra de la vortoj.

53. Forfuĝo de la demonoj

Post ne multe da tagoj, dum li estis laboranta (fakte li ŝatis ankaŭ labori), alvenis iu ĉe sian pordon kaj tiris la ŝnuron per kiu li sin servis por labori: li fakte teksis korbojn donacotajn al siaj vizitantoj interŝange kun tio kion tiuj ĉi oferis.

Leviĝinte, li vidis beston, similan al homo ĝiskoksen, kun kruroj kaj piedoj similaj al tiuj de azeno. Antono, limiĝante sin kruksigni, diris: “Mi servas al Kristo. Se vi estis sendita kontraŭ min, jen mi estas tie ĉi!” Kaj la besto kun siaj demonoj fuĝis tiom rapide, ke ĝi falis kaj mortis. La morto de la besto signifis la falon de la demonoj. Tiuj ĉi ĉiuruze provis lin formovi el la dezerto, sed en tio ili ne sukcesis.

54. Sinjora interveno preĝakirita de Antono

Iam, sollicitita de la monaĥoj malsupreniri kaj vizite gastigi ĉe ili kaj iliaj loĝejoj dum kelke da tempo, li marŝis akompanate de la monaĥoj venintaj lin inviti. Kamelino portis por ili panojn kaj akvon ĉar tiu dezerto estis arida kaj seka kaj ne troviĝas trinkebla akvo se ne en la nura monto el kiu ili jam ĉerpis la provizaĵon, kaj kiu estas loĝata de Antono. Ĉar dummarŝe la akvo jam ĉerpiĝis kaj varmegis, ĉiuj estis en danĝero. Post senrezulta serĉado en la najbaraj lokoj, ili ne povis plue antaŭeniri kaj sterniĝis surteren kaj, jam senespere, allasis al sia destino la kamelinon.

Sed la maljunulo, ilin ĉiujn vidinte en vivdanĝero kaj sentante pro tio grandan doloron kaj ĝemante, li iom malproksimiĝis el ili kaj, klinitajn la genuoj kaj levitaj la manojn al la ĉielo, ekpreĝis. Kaj tuj la Sinjoro fontigis akvon en la loko en kiu li estis preĝanta. Kaj tiel ĉiuj sin refortigis trinkante kaj, post plenigo de felsakoj, ili serĉis kaj trovis la kamelinon kies kolbrido hazarde estas implikiĝinta inter ŝtonoj sin blokante. Post ĝia sensoiĝo al tiu akvofonto, sur ĝian dorson ili ŝarĝis la felsakojn kaj reprenis la marŝon.

Ĝus veninta ĉe la ermitajn eksterajn loĝejojn, ĉiuj lin brakumis, vidante en li patron kaj li, kvazaŭ portantanto el monto vojaĝprovizojn, regalis ilin per sia

¹²⁶ Rm 1,1

vorto kvazaŭ gasteca donaco kaj ilin partoprenigis en sian enan gajnon. Kaj denove estis ĝojo sur la montoj, tensio al la progresado kaj komforto pro la komuna kredo. Ĝojis ankaŭ li mem konstatante la fervoron de la monaĥoj kaj retrovante, jam maljuniĝintan, sian fratinon, virgine soleculinon kaj gvidantinon, ŝi mem, de aliaj solecaj virginoj¹²⁷.

55. Instigo al la Monaĥoj

Post kelkaj tagoj, li revenis al sia monto. Ekde tiam, multaj venis ĉe lin, kaj aliaj, malsanaj, aŭdacis lin aliri. Al ĉiuj monaĥoj, lin alirintaj, li allasis jenajn instruojn: fidi je la Sinjoro kaj lin ami, sin gardi kontraŭ malĉastaj pensoj kaj la karnaj plezuroj kaj, kiel skribite en la Sentencoj: “Ne vin lasu trompi de la sugestiero de la ventro”; rezigni el memadmiro, preĝi ĉiam, kanti la psalmojn jen antaŭ jen post la dormo, parkere reciti la preceptojn entenatajn en la Skriboj, memori la agojn de la sanktuloj¹²⁸ por ke la animo, prezentigante al si la ordonojn, reguliĝu laŭ ilia zorgindeco.

Precipe, li konsilis daŭre mediti pri la diro de la apostolo: “La suno ne subiru sur vian koleron”¹²⁹, kaj opiniis, ke tio aplikeblas rilate ĉiun ordonon: “Ja jes, ke la suno ne subiru sur vian koleron sed eĉ ne sur ĉiun ajn nian pekon. Bonas kaj nepras, ke nin kondamnu nek la suno pro aĉaĵo dumtaga, nek la luno pro peko aŭ nura penso dumnokta.

Por ke estu konservata tia dispozicio, utilas aŭskulti kaj gardi lian instruon kiu fakte diras: “Ekzamenu vin mem, provu vin mem”¹³⁰. Ĉiutage ĉiu kalkulu la kvanton kaj kvaliton de siaj tagaj kaj noktaj agoj. Kaj se li pekis, tion ĉesigu; se, bonŝance, ne pekis, li ne sin admiru, sed persistu en la bono kaj ne estu maldiligenta, ne kondamne juĝu najbarulon, kaj ne pravigu sin mem, kiel diris la apostolo Paŭlo: “...ĝis venos la Sinjoro kiu enlumigos la kaŝitaĵojn”¹³¹.

Ofte ne konsciiĝas eĉ ni mem pri kio ni estas farantaj¹³², sed dum ni nekonscias, la Sinjoro notas ĉiun aĵon. Oni lasu, do, al Li la juĝon kaj ni nin eltenu unu la

¹²⁷ Oportunas rimarki, ke en la dezerto ne jam establiĝis monaĥejoj kiajn ni hodiaŭ konas; sekve ni ne rajtas imagi **ekston** de «porvirinaj konvivejoj»: la askezuloj vivis en solecaj loĝejoj kaj la fratino de Antono estis konsiderata kiel spirita konsilantino de aliaj virginoj kiuj, eble, askeze vivis ne malproksime de tiaj loĝejoj, intencante imiti la askezan vivon de la monaĥoj.

¹²⁸ La sanktuloj aludataj estas sendube tiuj de la Malnova kaj Nova Testamentoj.

¹²⁹ Ef 4,26

¹³⁰ 2 Kor 13,5

¹³¹ 1 Kor 4,5; Rm 2,16

¹³² Inter la kompleksecaĵoj de la homa psiko ĉi tie estas iamaniere suspetigata io kiu similas al la “moderna” nekonscio.

alian kaj portu la pezojn unuj de la aliaj¹³³ kaj zorgu plenigi tion je kio ni mankas.

Kaj por havi la certecon povi eviti pekon, prizorgu eĉ pri tio: ĉiu el ni notu kaj skribu siajn agojn kaj animajn movojn kvazaŭ ni estus ekraporantaj unuj al la aliaj. Kaj estu sendube ke, pro honto, ke ĉio tio estos konata, ni ĉesos peki kaj ankaŭ pensi ion malbonan. Kiu fakte akceptus esti surprizita dum peke agas? Samkiel, tial, sub rigardo de unuj sur la aliaj, ni ne povus peki per fornikado, tiel, se ni skribas niajn pensojn kvazaŭ ni pretus pri ili raporti unuj al la aliaj, ni evitos ĉiamdaŭre, la malĉastajn pensojn pro honto esti malkovritaj. Skribitaĵo pri tio estu por ni la okuloj de niaj askezkunuloj, por ke, ruĝigante dumskribe tiom kiom dumrigardate, ni tute ne pensu pri malbonaĵoj.

Forĝante nin mem tiamaniere, ni povos redukti al sklaveco nian korpon¹³⁴, plaĉi al la Sinjoro kaj treti la maĥinaĵojn de la malamiko¹³⁵.

56. Permane de Antono la Sinjoro resanigas malsanulojn

Al lin vizitantoj, do, li preskribis tiaĵojn.

Li provis, plue, kompaton¹³⁶ al la malsanuloj kaj preĝis kun ili. Ofte la Sinjoro elaŭdis liajn preĝojn avantaĝe de multaj. Sed li ne vatemis se elaŭdita, nek plendis se ne elaŭdita, sed ĉiam li dankis al la Sinjoro kaj instigis la malsanulojn pacienci kaj rekoni, ke la sanigo estis tasko nek lia nek de homoj, sed nur apartenanta al Dio, kiu agas kiam mem volas kaj favoras laŭvole¹³⁷.

La malsanuloj, tial, ricevis kiel sanigon la vortojn de la maljunulo, lernante mem ne malkuraĝiĝi kaj prefere elteni pacience. Kaj tiuj tiuj ricevis resanigon lernis danki ne al Antono, sed nur al la Sinjoro¹³⁸.

57. Saniĝo de Frontono, grava ŝtatfunkciulo

Ulo, nome Frontono, membro de la Palaco¹³⁹ kaj suferanta pro horora malsano (li mordadis sian langon kaj estis perdanta siajn okulojn), venis al la monto kaj petegis por ke Antono preĝu por li. Kaj tiu ĉi, post esti preĝanta, diris al Frontono: “Iru kaj saniĝu!”. Sed ĉar tiu daŭrigis resti sur la interna (= supera parto) monto laŭ diversaj tagoj, Antono insistis: “Vi ne povos saniĝi se vi restas ĉi tie, decide iru kaj alvenu al la Egiptio, vi vidos la signon realiĝanta

¹³³ Gal 6,2

¹³⁴ 1 Kor 9,27

¹³⁵ Ef 6,11

¹³⁶ 1 Kor 12,26

¹³⁷ Rm 9,15-18

¹³⁸ Atanazio rimarkigas plurfoje, ke Dio peras miraklojn, ne Antono: tiu ĉi fakte estas la *servisto*, la instrumenro de kiu la Sinjoro sin servas por agi.

¹³⁹ Ĉu vere gubernia Palaco aŭ nomo de urbo? La helena παλάτιον (=palation) ne klare signifas.

en vi”. Kaj tiu, fidema, foriris: Ĵus Egiptio aperis al liaj okuloj, kiam la malsano finiĝis kaj la homo resaniĝis laŭ la vorto kiun Antono ricevis de la Sinjoro dumpreĝe.

58 Saniĝo de junulino de Busiris

Junulino el Busiris, en la regiono de Tripolo, suferis pro malsano terura kaj abomeninda: la larmoj, la naza muko kaj likvoj gutetantaj el oreloj, tuŝante la teron fariĝis vermoj. Ŝi estis jam malfortigita en la korpo kaj havis okulojn nenormalajn.

Iliaj gepatroj, informite, ke iuj monaĥoj estis ekirantaj viziti Antonon, konfidinte en la Sinjoro kiu sanigis virinon kiu havis sangofluon¹⁴⁰, petis permeson marŝi kun ili akompanante sian filinon. Tiuj konsentis, sed la gepatroj kun la filino restis ekster la loĝeja monto, nome gaste ĉe Panucio¹⁴¹, la monaĥo kredkonfesinta, La monaĥoj, male, eniris kaj, apenaŭ ili provis ekparoli pri la junulino, Antono ilin anticipis priskribante al ili ŝian malsanon kaj kiel ŝi vojaĝis kun ili.

Sed, kvankam tiuj ĉi lin petis, ke estus permesate, ke ankaŭ la aliaj eniru, li ne konsentis, tamen li diris. ”Iru, kaj, se ŝi jam ne mortis, ŝin vi trovos resanigita, Tia resaniĝo, fakte, ne dependas de mi, tiel ke ne utilas veni ĉe min, nome ĉe mizeran homon kia mi estas: la resaniĝo dependas, plej precize, de la Savinto, kiu ĉie favore kompatas tiujn kiuj lin preĝe alvokas. La Sinjoro do elaŭdis la junulinon pro ties preĝoj, kaj ia amo al la homoj rivelis al mi, ke Li tie malsupre ŝin sanigos”.

Okazis vere la miraklo kaj la monaĥoj, elirinte, renkontis la gepatrojn ĝojplenaj kaj la filinon tute sanigita,

59 Ravelo pri du fratoj en danĝero en la dezerto

Du fratoj:estis venantaj lin renkonti kaj, pro la elĉerpiĝo de akvo laŭvoje, unu mortis kaj la alia jam ekforlasiĝis al la sama sorto. Fakte, eĉ tiu ĉi, ne havante kromajn fortojn por antaŭeniri, terkuŝis atendante la morton.

Sed Antono, sidinta sur la monto¹⁴², alvokinte du monaĥojn hazarde liajn gastojn, ilin urĝis per tiuj ĉi vortoj: “Prenu amforon akvoplenan kaj kuru tra la

¹⁴⁰ Mt 9,20

¹⁴¹ Panucio estis episkopo de Supera Tebaido. Laŭ iuj fontoj, li suferis turmentojn dum la persekutado de Maksimiano; laŭ aliaj dum tiu de Massimino (kiu estis la lasta granda persekuto kontraŭ kristanoj, en la jaroj 303 kaj 313. Ni scias krome, ke li partroprenis en la Nicea Koncilio

¹⁴² Kiel jam rimarkite alifoje, Antono estas komparata al Elija. Ĉi tie, kiel diversfoje ĉi-verke, la du personuloj estas kunigitaj per aparta sinteno: simbole, resti ”sidinta” markas la internan kvieton kaj la stabilecon de la homo de Dio, kaj la “monto”, reprezentante la lokon starantan supre de la mondo kaj ties malbonaĵoj, fariĝas la “loĝejo” karakterizanta tian homon.

vojo en la direkto al Egiptujo: du fratoj estis venantaj ĉi-tien, unu jam mortis la alia mortos se vi ne hastu! Al mi tio estis rivelita per vizio dumpreĝe”. La monaĥoj, finalvenintaj, trovis surtere kuŝanta tiun mortintan kaj lin enterigis, refortigis, male, la alian per akvo kaj lin kondukis ĉe la maljunulon: marŝado plenumita en unu tago.

Se iu scivolemus kial li ne estis konigite antaŭ ol la alia mortus, pri tio enketus malprave: ne estis tasko de Antono decidi pri la vivo kaj morto, sed de Dio, kiu decidis koncerne tiun kaj rivelis koncerne tiun ĉi. Admira estis nur la fakto ke, Antono, sidinta sur la monto, havis la animon vigla kaj atenta al tio kion la Sinjoro al li montris okazanta fore.

60. Antono ĉeestas la ĉielascendon de la animo de Amoun

Alifojn plue, dum lia sidado sur la monto, adresiginte alten la rigardon, li vidis ulon leviĝanta¹⁴³, kaj observis, ke la gajado de lia sekvantataro estis granda: Mirinte kaj taksinte beatula la ĥoron, li bondeziris alpreni kion okazantan. Tuj lin atingis voĉo sciiganta, ke tiu estis la animo de Amoun¹⁴⁴, la monaĥo de Nitria. Tiu ĉi estis persistinta en la askezo ĝis sia maljunecaĝo. Nitria distas el la monto kie loĝis Antono tritagan marŝadon. Tiuj kiuj staris kun Antono, vidinte la maljunulon mirplena, lin demandis komuniki la kialon; ili tiam alprenis, ke estis ĵus mortinta Amoun. Tiu ĉi fakte estis de ili konata, ĉar plurfoje veninta tien ĉi kaj jam farinta multajn miraklojn, inter kiuj la jenan.

Iam, devigite transiri riveron nomatan Likon (en ĝi tiam fluis akvoabundo), li petis sian akompanantan monaĥon Teodoron alproksimiĝi el li por ke li ne sin vidis nudaj reciproke dum naĝado en la rivero¹⁴⁵. Teodoro malproksimiĝis, sed tiu daŭrigis senti honton eĉ pro la neceso vidi sin mem nuda. Suferante pro tia honto kaj pro lia ĝeniĝo, tuj li sin sentis traveturata aliborden. Teodoro, eĉ mem homo pia, reveninte ĉe lin, konstatis, ke Amoun estis transirinta tute senmalsekiĝe kaj lin petis, ke estu konigata kiamaniere li taransiris. Konstatinte, ke li rifuzis tion komuniki, Teodoro, genuiĝante antaŭ liaj piedoj, deklaris, ke mem ne lin lasu antaŭ ol tio estos senvualota. Tiam Amoun, vidinte la obstinon de Teodoro kaj ĉefe pro ties eldiroj, siavice lin petis, ke tiu afero ne estu rivelata

¹⁴³ Je tiaj vizioj, en kiuj sanktulo vidas la morton de alia sanktulo, iom plenas la hagiografiaj tekstoj.

¹⁴⁴ Pri tiu monaĥo troviĝas mencio ankaŭ ĉe diversaj kristanaj aŭtoroj. Pri li ni scias ke, orfa kaj el riĉeta familio, estis devigita, preme de onklo, edziĝi; li vivis kun edzino en amrilata abstimo laŭ dekok jaroj kaj, kuraĝigita de la sama virino, sin separis de ŝi por ermite vivi en la dezerto de Nitria, okcidente de la Nila delto. Amoun travivis en la dezerto laŭ la cetera vivo, sed dufojon jare li iris viziti sian edzinon. Li estis konsiderita la fondinto de la monaĥa vivo en Nitria kaj havis diversajn sekvantojn.

¹⁴⁵ Eble kanalo elfluanta el Nilo najbare de Likopolo, en la Alta Egiptio.

antaŭ ol okazos lia morto. Kaj tiam li rakontis, ke mem estis transportita kaj lokumita aliborden, tamen sen piediri sur la akvo, ĉar tio eblas ne al homoj sed nur al la Sinjoro kaj al tiuj al kiuj tio estas koncedita far tiu ĉi, kiu tion okazigis al la granda apostolo Petro. Teodoro rakontis tiun epizodon post la morto de Amoun.

La monaĥoj, al kiuj Antono estis sciiganta pri la morto de Amoun, registris la tagon. Kiam el Nitria alvenis iuj monaĥoj tridek tagojn poste, ili informiĝis kaj sciis de tiuj, ke Amoun estis dorminta (= elvivinta) ĝuste tiun tagon kaj tiun horon dum kiuj la maljunulo vidis lian animon portata ĉielen.

Jen tiuj ĉi jen tiuj miris pri la pureco de la animo de Antono, ĉu pro la fakto, ke li estis informita pri tio okazanta je dektritaĝa vojaĝa distanco jen pro la maniero per kiu li estis vidinta la animon ĉielleviĝanta.

61 Saniĝo de la virgino Polikracia

Iam, ankaŭ la nobelo Arkelao, kiu lin estis renkontinta en la malsupera monta parto, lin petis reciti preĝon por Polikracia el Laodikeo, virgino admira kaj tute sin dediĉanta al Kristo. Ŝi, fakte, suferis je horora malsano nivele de stomako kaj sur flanko pro eksĉeso da askezo kaj jam ŝia korpo estis tute malfortigita.

Antono do preĝis kaj la nobelulo registris la tagon dum kiu li estis preĝinta. Reveninte al Loadikeo, li trovis, ke la virgino jam ĝuis bonan farton. Post informiĝo pri kiam kaj kia tago ŝi estis elirinta el sia febleco, la nobelulo elpoŝigis la dokumenton sur kiu mem estis registrinta la momenton de la preĝo. Kaj, post ĝia legado, tuj montris kion mem estis skribinta sur la sama dokumento. Kaj ĉiuj miris, rekonante, ke la Sinjoro ŝin estis resanigita ĝuste en la momento en kiu Antono estis preĝanta kaj peteganta por ŝi la Sinjoran bonkorecon.

62. Antono anticipe scias kiu estas ekvenanta al li

Ofte li antaŭanoncis (foje ankaŭ monatojn antaŭe) kiuj estis alvenantaj ĉe lin kaj la kialoj ilin puŝantaj tion fari. Iuj venis lin viziti nur por lin renkonti, aliaj male ĉar malsanuloj, aliaj plue ĉar turmentitaj de demonoj. Kaj neniu konsideris la vojaĝpenon turmento kaj puno, ĉar ĉiu, ĉe sia reveno, konstatis el tio la profiton.

Sed Antono, malgraŭ tion vidanta kaj diranta, insiste petis, ke neniu lin admiru pro tio, sed prefere oni admiru la Sinjoron kiu donis al ni homoj la gracon per kiu ni lin konas laŭ niaj fortoj.

63. Saniĝo de demonposedato

Alifojon, li malsupeniris ĝis la malsuperaj ermitaj loĝejoj kaj al li estas proponite aliri boaton por preĝi kun la monaĥoj: nur li perceptis akran odoron tre penetran. Sed, dum la enboatiĝintoj diris, ke en la boato troviĝas fiŝaro en salakvo kaj ke el tio estas elfluanta la naŭzaodoro, nur li insistis ke la fetoro havas alian originon. Ĵus li diris tion, junulo demonposedata, kiu enboatiĝis antaŭ ol aliaj kaj kiu sin kaŝis, abrupte laŭtkriis. La demono, riproĉita per nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, eliris el li kaj la homo fariĝis sana dum ĉiuj konstatis, ke la fetoro fontis el diablo.

64. Saniĝo de alia demonposedato

Aliulo, je nobela familio ĉifoje, venis ĉe lin. Kaj la demono estis tiel terura, ke la demonposedato eĉ ne konsciis pri la loko kie mem estis kaj manĝadis ekskrementojn de sia korpo. La lin kondukintoj petegis por ke Antono preĝu por li kaj Antono, kompatinte la junulon, preĝis kaj vigilis kun li la tutan nokton. La junulo, ĉe ektagiĝo, abrupte stumis Antonon tiun ĉi forigante kaj, malgraŭ ke lin kondukintoj ekprovis indignon, Antono diris: “Ne indignu kontraŭ la junulo, sed kontraŭ la demono lin posedinta. Fakte, tiu demono furioziĝis kaj tion faris pro tio, ke al ĝi estis decide ordonite resti kaŝita en aridaj lokoj¹⁴⁶. Gloru, tial, la Sinjoron ĉar la fakto, ke tiu ĉi sturmis sur min estas signo, ke la demono jam eliris”. Tuj post tiuj vortoj de Antono, la junulo saniĝis kaj, retrovinte sian prudenton, konsciiĝis pri la loko kie mem troviĝas kaj brakumis Antonon dankante al la Sinjoro.

65. Antono vidas sian animon ascendanta al la ĉielo

Tre nombraj monaĥoj asertis, plenplene akordiĝintaj inter si, ke multaj samtipaj eventoj okazis pere de li. Sed tiuj ĉi estas ne tiom admireblaj kiom tiaj povas aperi aliaj, eĉ pli atentokaptaj.

Iam, fakte, dum ekmanĝo leviĝinte por preĝi ĉirkaŭ la naŭa¹⁴⁷ horo, li konsciiĝis, ke mem estas spirite forkaptita. Kaj, evento eksterordinara, malgraŭ sia senmoveco, li vidis sin forigata el si mem kaj transportata en la aero de iuj estaĵoj; poste da tiaj li vidis aliajn, kruelajn kaj terurajn, kiuj staris en la aero kaj provis lin obstakli tiel ke mem ne povis ascendi¹⁴⁸.

Tiuj uloj, ĉar la kondukantoj luktis por lin defendi, enketis ĉu li estas al ili submetita. Dum ili pretendis, ke li ŝuldu¹⁴⁹ pri siaj agoj, la lin ascendigantoj oponis respondante: “La Sinjoro rezignis pri ĉio koncernanta lian naskiĝon, sed

¹⁴⁶ Lk 11,24-26

¹⁴⁷ Ĉirkaŭ la tria posttagmeze.

¹⁴⁸ Tiu ĉi temo koncerne la demonojn de la aero kiuj obstaklas la ascendon de la animoj de la forpasintoj al la ĉielo eniris en la greka-latinan mondon sub influoj de la orienta kulturo.

¹⁴⁹ Eble aludo al Mt 18,23.

vi povas pretendi, ke li respondu pri la vivtempo ek de kiu li fariĝis monaĥo kaj sin dediĉis al Dio”¹⁵⁰. Tiam, ĉar ili akuzadis sed ne prezentis iun ajn pruvon, la vojo fariĝis tute trairebla kaj senobstakla. Kaj tuj li sin vidis kiel revenantan kaj sin posedantan: Antono, do, akiris denove sian integrecon.

Forgesinte la manĝon, li restis ĝemi kaj preĝi la pluan tagan tempon kaj la tutan nokton. Li estis, fakte, mirkaptita pro la konstato kontraŭ kiom da malamikoj ni devas lukti kaj per kiuj penoj ni devas trairi la aeron. Kaj venis al lia memoro, ke jam la apostolo intencis ĝuste tion diri kiam mem asertis: “Laŭ la estro de la potenco de la aero”¹⁵¹. En jeno la malamiko havas povon: batali kaj provi obstakli tiujn kiuj trairas la aeron. Pro tio precipe, la apostolo admonis tiel: “Tiel vi prenenu la tutan armilaron de Dio, por ke vi povu rezisti en la malbona tago”¹⁵² tiel ke la malamiko “ne povante ion malbonan diri kontraŭ ni”¹⁵³, estus hontigita.

Kaj ni, alpreninte tion, memoris pri la vortoj de la apostolo: “se tio estis en la korpo aŭ for de la korpo mi ne scias, sed Dio tion scias”. Sed Paŭlo estis forkaptita ĝis la tria ĉielo, kaj, aŭdinte neeldireblajn vortojn, malascendis; Antono malsame sin vidis alvenanta ĝis la aero kaj luktanta ĝis atingi liberon.

66. Giganto provas malhelpi la ĉielascendon de la animoj

Antono ĝuis eĉ je tiu ĉi karismo. Al li preĝanta, ermite sidinta sur la monto, kiam iu ajn temo de lia meditado manifestiĝis al li obskura, ĝuste tiun ĉi klarigis interveno de la dia Providenco. Kiel estas dirate en la Skriboj, la beatulo “estis instruata de Dio”¹⁵⁴.

Sekve, post diskutado kun uloj, venintaj lin viziti, pri la transiro de la animo kaj la loko kie ĝi estus loĝinta, sekvantan nokton iu lin alvokis el alto dirante: “Antono, leviĝu, kaj rigardu”. Elirinte (fakte, li sciis al kiu konvenas obei) kaj levinte la rigardon, li vidis giganton, abomenan kaj teruran, kiu starante atingis la nubojn, kaj kelkajn estaĵojn ascendantajn kvazaŭ flugilprovizitajn. Kaj li vidis, ke tiu streĉis la manojn kaj el tiuj ĉi iuj estis malhelpataj de ĝi, aliaj tamen flugadis malsuben kaj estis kondukataj alten trairantaj la aeron senĝene.

Kaj por tiuj lastaj la giganto rezervis dentgrincadon dum por la falantoj suben montris ĝuon. Subite alvenis al Antono voĉo. “Komprenu kion vi vidas!”¹⁵⁵. Lia menso alertiĝis kaj komprenis, ke temas pri la transiro de la animoj kaj ke

¹⁵⁰ La komenco de la monaĥa vivo estas ĉi tie konsiderata kiel dua baptito. Kiel, do, la baptito fortrekas ĉiujn pekojn, ankaŭ monaĥi(n)ĝo forstrekas la pekan pasinton: nur rilate la postan kondulon la diablo povas enketi.

¹⁵¹ Ef 2,2

¹⁵² Ef 6,13

¹⁵³ Tit 2,8

¹⁵⁴ Jes 54,13; Jo 6,45

¹⁵⁵ Dn 9,23

la giganto estas la malamiko, malamanta la kredantajn homojn kaj retenanta kaj malhelpanta al siaj submetiĝintoj trairi la ĉielon, sed nepovanta reteni tiujn kiuj ne sin lasis allogi de ĝi, kiuj eĉ ascendas pli alten ol ĝi.

Vidinte tion, kvazaŭ avertita, li luktis pli ol antaŭe por pliboniĝi ĉiutage. Sed li ne parolis volonte pri tiaĵoj. Tamen, ĉar li daŭrigis resti preĝanta kaj travideblis lia mirstato kaŭzita de tiaj vizioj, la loĝantoj ĉe li insistis demandadi, kaj li estis devigata ekspliki, kvazaŭ patro kiu povas kaŝi nenion al siaj filoj. Tamen pro la konstato, ke lia konscienco estas pura, lia rakonto fariĝis profita al ili, kiuj tiamaniere alprenis, ke la frukto de la askezo bonas kaj la vizioj ofte estas la konsolo en la penoj.

67. Respekto de Antono al la eklezia hierarkio

Kiel li estis pacienca karaktere kaj humila anime! Kaj tiel estinte, li havis grandan respekton al la normoj de la Eklezio kaj volis, ke ĉiu ekleziulo lin superu en la honoro-rango. Li ne hontis kapklini antaŭ episkopoj kaj pastroj. Kaj se eventuale diakono venis, por sia propra spirita avantaĝo, lin viziti, al tiu ĉi li eksplikis kio utilas al ties spirita profito, sed al li cedis la postenon en aferoj koncernantaj la preĝon, sen provi honton lernante eĉ li mem.

Ofte informiĝis kaj petis aŭskulti ion el tiuj kiuj ĉeestis kaj rekonis, ke mem estis ricevinta avantaĝon, kiam iu diris ion utilan. Ankaŭ lia vizaĝo aspekte graciis. La Sinjoro lin dotis per tiu eksterordinara karismo: se troviĝis kun amaso da monaĥoj kaj unu, kiu neniam kun li renkontiĝis antaŭe, deziris lin vidi, tuj li, direktiĝante al tiu, forgesadis la aliajn kaj kuradis al li kvazaŭ allogita de ties rigardo.

Antono ne distingiĝis el la aliaj per alto aŭ staturo, sed per la stabileco de siaj moroj kaj per la pureco de sia animo, Kaj ĉar lia animo estis senturbamenta, tiaj estis ankaŭ iliaj sensaciaj aspektoj, tiel ke la ĝojo de la animo al li igis serena ankaŭ la vizaĝon dum la movojn de lia korpo perceptigis kaj travidebligis la staton de lia animo¹⁵⁶, ĝuste laŭ la diraĵo de la Skriboj: “Kiam la koro ĝojas, la vizaĝo serenas, sed kiam malĝojas malserenas”¹⁵⁷. Samscie ankaŭ Jakobo konsciiĝis, ke Labano estis intriganta insidojn kaj diris al la virinoj: “La vizaĝo de via patro ne similas tiun de hieraŭ kaj antaŭhieraŭ”¹⁵⁸. Samscie Samuelo taksis Davidon. “Li havis fakte la okulojn reflektantaj ĝojon kaj la dentojn blankaj kiel lakto”¹⁵⁹.

Tia ankaŭ Antono estis rekonata. Kiam, fakte, li estus en turmentoj se lia animo estis serena? Aŭ kiam li sombrus se lia menso konstantis en ĝojo?

¹⁵⁶ la ekstera aspekto reflektas la internan sintenon.

¹⁵⁷ Sen 15,13

¹⁵⁸ Gn 31,5

¹⁵⁹ 1 Sam 16,12; 17,42; Gn 49,12 (dirite rilate Judason).

68. *Antono instigas sin gardi de la herezuloj kaj el skismuloj*

Koncerne la kredon, li estis vere admira kaj pia. Neniam kaj nenion li havis komunan kun Melecianaj skismuloj¹⁶⁰, jam konstatinte ties originajn malbonecon kaj apostatiĝon. Nek li kultivis amikecajn rilatojn kun manikeoj¹⁶¹ aŭ kun iu ajn hereza grupo, se ne por ilin admoni kaj konverti al la pieco, konsiderinte kaj deklarinte, ke amikeco kaj frekventeco kun tiuloj estas noca por la animo kaj portanta al la perdiĝo. Sammaniere li abomenis ankaŭ la arianan¹⁶² herezon kaj rekomendis al ĉiuj ne alproksimiĝi al tiuj kaj ne sekvi iliajn krederojn.

Iam, demandante iujn Arianojn alvenintojn ĉe lin, malkovris ilian aĉecon kaj ilin forigis el la monto, dirante, ke iliaj vortoj estas pli malbonaj ol serpentoj.

69. *Antono kontraŭ la Arianoj de Aleksandrio*

Iam, ĉar Arianoj trompige asertis, ke li pensis kiel ili, Antono sentis indignon kun mirkonsterno aŭdante tiaĵojn. Tial, je postulo de la episkopoj kaj de la kunfrataro, malsupreniris el la monto kaj, atinginte Aleksandron, publike kondamnis la Arianojn dirante, ke ilia herezo estas jen la lasta jen tiu kiu antaŭiras la Antikriston.

Kaj li instruis la popolon, ke la Difilo ne estas kreaĵo kaj ke Li ne estis farita el ne-esto, sed ke Li estas eterna, Parolo kaj Saĝo de la substanco de la Patro. Tial, malpias diri, ke estis tempo en kiu Li ne estis ĉar la Parolo estas ĉiam kunekzistanta kun la Patro: “Ne tenu, do, nenispecajn rilatojn kun la Arianoj, kiuj estas malpiaj. Ne povas esti, fakte, neniŭ rilato inter la lumo kaj la tenebroj. Vi estas kristanoj devotaj, sed tiuj kiuj diras, ke la Filo, naskiĝinta de la Patro, la Parolo de Dio, estas kreaĵo, tute similas al paganoj kiuj adoras la kreitaron

¹⁶⁰ Inter la herezaj grupoj furorantaj en Egitio de IV jarcento estis krom la Arianoj, ankaŭ Melecianoj, kiuj, laŭ diversaj fontoj, jam trovis ne negleteblajn adherojn ĝuste inter la monaĥoj de Erakleopolo, naskiĝloko de Antono. La skismo, naskiĝinta post la persekutoj de 306 kaj 311, estis kaŭzita de Melecio, episkopo de Eliopolo pro ties diverĝoj kun Petro, episkopo de Aleksandrio. Fakte, dum tiu lasta estis kaŝita pro la persekuto, Melecio sacerdotigis pastrojn ekstere de sia episkopa jurisdicia zono kaj, ekskomunikita, kontestis la aŭtoritaton de la ĉefo de la egiptia eklezio kaj senreteneme atakis la indulgemon de Petro rilate la tieliritajn lapsi (= falintoj), nome tiuj kiuj pro la persekutoj “falis” el la kredo, neante Kriston. La grupo de la adherintoj al la Melecia skismo kreskis tiom rapide, ke en 325 la eklezio fondita de Melrcio nombris jam 29 episkopoj. La Nicea Koncilio kondamnis tiun skismon, sed ne sukcesis ĝin tute malfajrigi.

¹⁶¹ Manikeismo estis herezo naskiĝinta en la tria jarcento sekve de la predikado de Mani, inspire gnoza.-kristana, ĝi fondiĝis sur la dualisma principo de la ĉeesto en la mondo, kaj en la homo, de principo de la Bono kaj principo de la Malbono

¹⁶² La herezio de Ario (IV j.) minis la kristanismon en ties fundamento, ĉar li neis la dian naturon en Jesuo, tutan ekonomion de la savo kaj la saman koncepton de revelacio, per la reduktado de kristanismo al raciismo. La ariana doktrino estis kondamnita en la Nicea Koncilio (325).

anstataŭ la kreinton¹⁶³. KREDU, male, ke la tuta kreaĵaro ekindignas kontraŭ ili ĉar ili envicigas inter la aĵojn kreitajn la Kreinton kaj Sinjoron de ĉio, per kiu ĉio estas farita”.

70. Aleksandrianoj admiras Antonon

La tuta popolo ĝojis aŭdante tian homon ĵeti anatemon kontraŭ herezon kiu batalas kontraŭ Kriston, kaj la tuta urbanaro alkuris por vidi Antonon. Eĉ paganoj kaj iliaj tieldiritaj sacerdotoj venis al la domo de la Sinjoro kaj diris. “Ni petas vidi la homon de Dio”. Ĉiuj fakte lin tiel nomis ĉar ankaŭ tie, pere de li, la Sinjoro purigis multajn el demonoj kaj sanigis la spirite ruiniĝintojn.

Multaj el la paganaro insiste provis tuŝi la maljunulon, opiniante ricevi avantaĝon. Certe en tiuj tagoj adheris al kristanismo samkvante tiaj fariĝus en unu tuta jaro. Kaj ĉar iuj pensis, ke li povus esti ĝenata pro la homamaso kaj provis, tial, malproksimigi el li ĉiujn, li, nenimaniere ĝenata, diris, ke tiuj estas kvante malpli nombraj ol la demonoj kontraŭ kiuj ni luktas sur la monto.

71. Saniĝo de demonposedato

Kiam li foriris kaj ni lin akompanis, ĵus apenaŭ ni atingis la urban pordon, malantaŭ ni virino ekkriis. “Atendu, ho homo de Dio! Mia filino estas terure turmentata de demono. Atendu, mi vin petegas, por ke ne risku ankaŭ mi min vundi pro la zorgo vin sekvi”. La maljunulo aŭdis kaj, instigita eĉ de ni, volis atendi. Kiam la virino alproksimiĝis, la knabino je tiĝis teren. Kaj dum Antono preĝis kaj alvokis la nomon de Kristo, la knabino saniĝis, ĉar la malpura demono eliris el ŝi.

Dum ĉiuj benis Dion Lin dankante, Antono revenis ĝoje al sia monto kaj al sia propra loĝejo.


72. Saĝo de Antono en diskutoj kun paganaj filozofoj

Antono estis tre saĝa, kaj la afero plej admirebla estas ke, malgraŭ senkultura, li estis sagaca kaj tre menslerta. Iam venis al li du paganaj filozofoj, opiniantaj povi lin embarasi. Li loĝis tiukaze en la parto malsupera de la mono. Sed li, kompreninte pro ilia eksteriĝo kun kiuj uloj li estas ekkonversacianta, diris helpe de interpreto. “Kial, ho saĝuloj, tiom vi penis por renkonti stultulon?”. Kaj ĉar tiuj respondis, ke li ne estas malsaĝa, sed homo tre sagaca, li rebatis. “Se vi venis ĉe stultulon, via peno senutilas; se, male, vi kredas, ke mi estas saĝa, fariĝu kiel mi, ĉar necesas imiti la bonon”¹⁶⁴. Kaj se mi estus veninte ĉe

¹⁶³ La instruo de Antono koncernas unu el la mulfacetaj eroj debatitaj en la diskuto kontraŭ Arianismon, t.e. la problemo de Triunuo: neante la diecon de Jesuo, la Arianoj neis, konsekve, la konsubstancialecon de la Patro kaj de la Filo; tiu ĉi, tial, ne estus eterna, sed estus kreita de la Patro, kaj tial al li submetita kaj, nivele de persono, ne egala kaj sammotive adorinda.

¹⁶⁴ 3 Jo 11

vin, mi vin imitus, sed ĉar estis vi la venintaj al mi, imitu min. mi estas kristano”. Kaj tiuj foriris mirplenaj ĉar konstatis kiel la demonoj lin timis.



Sassetta. Sankta Antono kun Sankta Paŭlo

73. Antono mirvekas en la venintoj lin viziti

Plue, aliaj samtipaj personoj venis lin viziti en la ekstera monta parto konvinkiĝintaj povi lin primoki pro lia neklereco. Sed Antono ilin anticipis. “Kion pri jeno vi diras? Kio antaŭas unue: la spirito aŭ la literaturo? Kaj kiu estas la kaŭzo de la alia: ĉu la spirito estas la kaŭzo de la literaturo aŭ la literaturo kaŭzas la spiriton?”. Ĉar tiuj respondis, ke unuas la spirito kaj ĝi estas la fonto de la literaturo, Antono deduktis. “Do, por menssanulo, literaturo ne necesas”. Tia konkludo mirigis jen la ĉeestantojn jen la lin vizitantojn. Tiuj ĉi, tial, foriris mirplenaj pro tio, ke ili estis vidintaj tiom grandan saĝon en neklera homo.

Fakte, malgraŭ siaj lokiĝo sur la monto kaj tie-restado laŭ la tuta vivo, li ne havis krudajn manierojn, sed anstataŭe li estis amebla kaj sociema. Lia lingvaĵo estis “spicita per dia salo”¹⁶⁵, tiel ke neniuj lin enviis, male liaj vizitantoj ĝojis ĉe li.

74. Enkarniĝo kaj kruco de Kristo. Spirito kaj animo

Post tiuj okazaĵoj, supreniris aliaj (el la aro kiu ĉe la paganoj taksigas saĝuloj) por lin ekzameni pri la motivoj de nia kredo.

Kaj ĉar ili provis eluzi siajn silogismojn koncerne la predikadon temantan pri la dia kruco kaj emis priridi ĝin, Antono, unue, kvankam iom sin moderante kaj kompatante ilian nescion, diris helpe de interpreto kiu bone transdonis

¹⁶⁵ Kol 4,6

liajn pensojn: ”Kio pli belas. ĉu konfesi la fidon en la kruco aŭ atribui al viaj tieldiritaj dioj adoltojn kaj koruptadon de knaboj? Tio pri kio ni parolas estas pruvo de kuraĝo kaj signo de netimo pri la morto, viaj kredindaĵoj male mergiĝas en malĉastajn sentojn”.

Kaj plue. ”Kio pli bonas: ĉu diri, ke la dia vorto ne trairis vage, eĉ, ke, kvankam restante si mem, por la savo kaj bonkoreco al la homoj, ĝi prenis homan korpon por igi la homoj «partoprenantaj je la naturo dia kaj spirita»¹⁶⁶, aŭ pli bonas similigi la diecon al estaĵoj senraciaj kaj, tial, ade riverenci kvarpiedulojn, reptiliojn kaj serpentojn kaj bildojn de homoj? Tiaj, fakte, estas la objektoj adorindaj ĉe vi saĝuloj¹⁶⁷. Sed kial vi aŭdacas primoki nin ĉar ni diras, ke Kristo manifestiĝis kiel homo, se konsideri, ke vi, difinante la animon emanaĵo de la dia Inteligento¹⁶⁸, asertas, ke ĝi iris vagadi kaj falis el la ĉiela volbo en korpon? Kaj bonŝance, ke ĝi falis nur en homan korpon kaj ne en kvarpiedulojn aŭ reptiliojn!¹⁶⁹

”Nia kredo parolas pri la alveno de Kristo por la savo de la homaro, vi male rakontas pri vagado de animo negenerata¹⁷⁰. Ni pripensas la potencon de la dia Providenco kaj ties amo al la homoj, ĉar eĉ tio ne estis neebla ĉe Dio¹⁷¹; vi anstataŭe parolante pri animo kiel reflektado de la dia Inteligento, al ĝi vi atribuas falojn kaj, en viaj mitoj, estas parolate pri ĝi kiel pri estaĵo ŝanĝanta kaj, konsekvence, vi faras, kaŭze de ĝi, ŝanĝebla ankaŭ la sama dia naturo: kia la bildo tia devas esti ankaŭ tio pri kio ĝi estas bildo. Sed kiam vi konfesas tiaĵojn koncerne la dian Inteligenton, vi bonvolu konsideri, ke vi estas blasfemanta ĝuste kontraŭ la Patro de la dia Inteligento”.

75. Mitaj rakontoj kaj evangeliaj mirakloj

“Koncerne plue krucon, kio laŭ vi pli bonas ĉu pacienci kiam nin atingas la insidoj de la aĉuloj kaj ne timi la morton, ĉiumaniere ĝi okazus, aŭ ĉu rakonti sensencaĵojn pri vagadaĵoj de Izido kaj Ozirido, pri la fuĝo de Krono, pri la filoj vorataj kaj pri patromurdoj? Tia fakte estas via saĝo! Primokante la krucon¹⁷², kiamaniere vi povas ne miri pri la resurekto, je konstato, ke kiuj parolis pri la unua parolis ankaŭ pri la dua? Kial, malgraŭ klaĉado pri la kruco, vi silentas

¹⁶⁶ 2 Pt 1,4

¹⁶⁷ Ag 17,29 kaj Rm 1,23

¹⁶⁸ En la helena lingvo *nour* (Nus) estas termino filozofa kiu nivelo de kosmologio indikas, de Platono kaj Aristotelo ĝis Plotino, la dian inteligenton.

¹⁶⁹ Adora riverencado al kvarpieduloj kaj reptilioj estis karakterizo de Egiptoj. Pri tiuj “kredoj” propraj de Egiptio parolas ankaŭ aliaj kristanaj aŭtoroj, kiel Eŭsebio el K. kaj Klemento el A.

¹⁷⁰ Aludo al la Metempsikozo.

¹⁷¹ Mt 10,27; Lk 18,27

¹⁷² La paganoj ne komprenas la potencon de la kruco, laŭ tiu rimarko. Tiu sama rimarko elstariĝas ankaŭ el *Contra Gentes* kaj el *De incarnatione*, du verkoj de Atanazio kun kiuj la ĉapitroj 74-78 prezentas diverajn paralelismojn, aparte rilate la temon de la disputo kun paganoj.

rilate mortintojn resurektigitaj, blindulojn vidricevintaj, paralizulojn resanigitaj, leprulojn purigitaj, promenadon surakva kaj ĉiujn aliajn mirindaĵojn pruvantaj, ke Kristo estas ne nur homo, sed ankaŭ Dio?

Al mi ŝajnas, ke ege maljustas kaj ke vi ne sincerece legis niajn Skribojn. Ilin plulegu, tial, kaj observu, ke la agoj de Kristo rivelas, ke li estas Dio, la Dio veninta por la savo de la homaro”.

76. *Paganoj, alegorizante la mitojn, adoras ne Dion, sed la kreitaron*

“Diru ankaŭ vi pri viaj kredaĵoj. Sed kion vi povus diri pri estaĵoj senraciaj, se ne neraciaĵojn kaj sovaĝaĵojn? Se poste, kiel oni aŭdas dirate, vi volus enŝteli, ke tiuj estas mitaĵoj kiuj entenas nur alegorian valoron (la kaptiĝo de Koro reprezentas la teron, la lamstato de Efesto la fajron, Ero la aeron, Apolo la sunon, Artemido la lunon, Pozidono la maron...), vi neniel adorkliniĝas al Dio, sed kultas la kreitaron anstataŭ la Dion kreinto de ĉio¹⁷³.

Se plue vi estigus tian mitojn ĉar la kreaĵaro estas bela, vi devintus limiĝi al la komtemplado pri ĝi kaj ne diigi la aĵojn kreitajn, por ne atribui al io kreita la honoron apartenantan al tiu kiu ĝin faris. Pro tio vi estis puŝitaj transdoni al la aĵo farita de la konstruinto la adoron al tiu ĉi devigata¹⁷⁴, aŭ tiun de la generalo al la soldato. Kion vi respondas koncerne tion por ke ni sciu ĉu la kruco prezentas motivojn indajn je moko?”

77. *Demonstroj de la kredo*

Ĉar tiuj estis inter malfacilaĵoj kaj turniĝis tratie kaj tratie-ĉi, Antono reprenis pere de interpretisto: “Tiaj pensoj, unuavide, postulas refuton. Sed ĉar vi baziĝas sur dialektikaĵoj demonstraĵoj kaj, sekvante tian metodon, vi volas, ke ankaŭ ni adore rekonu Dion per raciaj pruvoj, diru al mi, antaŭ ĉio: la faktoj kaj, ĉefe, la kono pri Dio kiamaniere rekonigiĝas laŭvere? Ĉu per demonstraĵoj dialektikaĵoj aŭ per la efika forto de la kredo? Kaj kio okupas la unuan postenon, ĉu la kredo kun sia fakta efika forto aŭ ĉu la demonstra dialektikado?”¹⁷⁵

Ĉar tiuj ĉi respondis, ke antaŭvenas la efiko de la kredo kaj ke tiu ĉi estas la scio plena, Antono diris: “Bone vi respondis; la kredo fakte fontas el anima dispozicio, dum la dialektikaĵoj originas el artifikemo de tiuj kiuj ĝin konsistigis. Tial, por tiuj en kiuj agas la efiko de la kredo, la demonstro per dialketikaj rezonadoj ne estis postulata, eĉ, probable ĝi superfluas.

¹⁷³ Rm 1,25. La diigo de la naturo estis, cetere, koncepto jam repuŝita de judajismo (Sg 13,13).

¹⁷⁴ Artisto indas je admiro pli ol la verko de li kreita. (vidu *Contra Gentes* kaj Heb 3,3-4)

¹⁷⁵ Evidentas, ke tie ĉi Antono, nome Atanazio, intencas pruvojn similajn al tiuj enpensitajn de paganaj saĝuloj por montri fundita ilian kredon. Fakte la pruvo, kiun Antono ŝvebigas, naskiĝas el historiaj kaj raciaj fontoj.

“Vi fakte baraktas establi per rezonaĵoj kion ni konas per kredo kaj ofte vi ne kapablas esprimi kion ni jam konas. Tiel ke prefereblas kaj pli fortas la efiko de la kredo ol viaj sofistecaj silogismoj”.

78. La kredo je Kristo

“Por ni kristanoj, tial, la mistero ne kuŝas en la saĝo de la paganaj dialektikaĵoj, sed en la forto de la kredo revelaciita de Dio pere de Jesuo Kristo¹⁷⁶. Tias la pruvo, ke nia vorto estas vera: malgraŭ nia malabunda kleriĝo¹⁷⁷, ni havas pruvojn por kredi je Dio, rekonante en liaj verkoj ties providenco ĉiufanka.

“Jen la pruvo, ke nia kredo estas agema: ni apogiĝas sur la kredo de Kristo, vi male sur disputoj modlataj laŭ metodo de sofistoj. Dum la iluzioj produktitaj de viaj idoloj malefikas, nia kredo disvastiĝas ĉiuloke. Vi, sidiĝintaj sur silogismoj kaj sofismoj, ne konvertas kristanojn al paganismo, ni kontraŭe, instruante la kredon je Kristo, senvestigas vian superstiĉon, ĉar ĉiuj rekonas, ke Kristo estas Dio kaj Difilo. Vi, per via bela elokventeco, ne estas obstaklon al la Kristaj instruadoj, ni male, alvokante la nomon de Kristo krucumita, forigas ĉiujn demonojn, kiujn vi elstarigas kiel diojn, kaj kie oni faras krucsignon, magio malfortiĝas kaj ĉesas allogi per sorĉaĵoj”.

79. Disvastiĝo de kristanismo kaj dekadenco de paganismo

“Diru al ni: kie estas viaj orakoloj? Kie la envultaĵoj de egiptanoj? Kie la iluziigoj de magiistoj? Kiam ĉio tio ekfiniĝis kaj ekmalvigliĝis se ne en la momento en kiu anonciĝis la kruco de Kristo? Ĉu tiu ĉi indas je moko aŭ, male, la aferoj kiuj ĝi reduktis al nenio kaj kiuj manifestiĝis senkonsistaj?

“Vekas miron krome la fakto, ke via religio estis neniel persekutata, male ĝi estis favore juĝata de la homoj ĉiurbe: la sekvantoj de Kristo kontraste estas persekutataj, tamen nia religio kreskas kaj disvastiĝas pli ol la via. Via religio spite de celebriĝo kaj honoriĝo, ruiniĝas ĉiam pli; la kredo kaj laŭkrista doktrino, male, kvankam mokitaj de vi kaj ofte persekutataj de homoj, plenigas la teron.

“Kiam la kono pri Dio brilis tiome? Kiam tiome elstariĝis la saĝo kaj virto de la virgeco? Aŭ kiam la morto estis tiel malŝatata, se ne en la momento en kiu naskiĝis la kruco de Kristo? Neniu povas pridubi tion, vidinte ke, por Kristo, la martirigoj malŝatas la morton kaj la virginoj de la Eklezio konservas siajn korpojn puraj kaj nemakulitaj”.

¹⁷⁶ 1 Kor 2,4-5

¹⁷⁷ 1 Kor 1,26

80. *Miraklo en la nomo de Kristo pruvas la veron de la kredo*

“Tiaj argumentoj sufiĉas por pruvi, ke nur la kredo je Kristo enkondukas al la pieco. Kaj se vi daŭrigas ne kredi kaj serĉas silogismojn estiĝintajn per rezonaĵoj kun dialektikecaj persvadigoj, ni male ne faras demonstrojn per la persvadiga lingvaĵo de la pagana saĝo¹⁷⁸, laŭsugeste de nia majstro, sed ni altiras per la kredo, kiu klare antaŭas la argumentadon per rezonadoj.

“Jen, ĉeestas iuj kiuj suferas pro demonoj (tiuoj estis ĵus venintaj al li ĉar turmentitaj de demonoj. Ilin kondukiginte en la mezo, Antono daŭrigis). «Aŭ vi ilin purigos per alvoko al viaj idoloj, per viaj silogismoj aŭ per ĉiu ajn artifiko aŭ magio, aŭ, se vi ne sukcesas, ĉesigu la militon kontraŭ nin kaj vi vidos la potencon de la kruco de Kristo».

Tion dirinte, li preĝalvokis Kriston kaj faris la krucsignon sur la suferantoj du aŭ tri fojojn. Tuj tiuj homoj leviĝis tute resanigitaj, jam mense konsciĝantaj kaj dankantaj al la Sinjoro.

La tieldiritaj filozofoj miris kaj restis vere konsternitaj pro la inteligento de tia homo kaj pro la okazinta miraklo. Antono plu diris. “Kial vi miras antaŭ tio? Ne estas ni la farantoj de tio, sed Kristo kiu tion faras pere de tiuj kiuj kredas je li. KREDU, do, ankaŭ vi. Fariĝu kiel ni kaj vi vidos, ke nia religio ne estas vorta artifiko, sed «kredo kiu agas per la amo al Kristo»¹⁷⁹: se ĝin atingos ankaŭ vi, vi ne plu kredos pro la demonstroj aranĝitaj per rezonaĵoj, sed pensos, ke sufiĉas la kredo je Kristo”.

Tiaj la vortoj de Antono. Kaj tiuj, mirplene ŝokite, foriris lin brakumante kaj asertante, ĉiuj samkonsente, ke mem ricevis profiton de li.

81. *Antono ricevas leterojn el la imperiestroj*

La famo de Antono atingis eĉ la imperiestrojn. Fakte, informite pri tio, Konstanteno Aŭgusto kaj ties filoj Konstanco kaj Konstante Aŭgustoj¹⁸⁰, al li skribis leterojn kvazaŭ al patro, kaj arde aspiris el Antono ricevi korespondan respondon. Sed Antono ne multe konsideris iliajn skribaĵojn, nek sentis ĝojon ricevante leterojn, eĉ li restadis tia kia li estis antaŭ ol la imperiestroj al li ekkorespondis.

Kiam al li oni liveris tiajn leterojn, Antono kutimis kunvoki ĉe sin monaĥojn dirante. “Kial vi miras se imperiestro al ni skribas? Eĉ li estas nur homo. Prefere miru pri la fakto, ke Dio skribis la leĝon por la homoj kaj parolis al ni pere de

¹⁷⁸ Vidu antaŭajn notojn.

¹⁷⁹ Gal 5,6

¹⁸⁰ Ĉar Konsrango kaj Konstanto surpronis la titolon de Aŭgustoj ĉe la morto de la patro en 337, versimilas, ke la korespondo kun Antono, partoprenata ankaŭ de Konstanteno, okazis antaŭ tiu dato aŭ mamulte da monatoj antaŭe. La teksto ne klaras kaj historiistoj pridubas la historecon de tiuj informoj. Ĉiukaze, Atanazio ĉi-tie ŝajnas ne pensigi al iu aparta situacio.

sia Filo”¹⁸¹. Tial, Li ne volis ricevi la leterojn dirante, ke li ne sciis kiel respondi al tiuj enhavoj.

Sed ĉar la tuta monaĥaro lin instigis, dirante, ke la imperiestroj estas kristanoj kaj ankaŭ por eviti en tiuj lastaj skandaliĝon pro rifuzo respondi, konsentis, ke iliaj leteroj estu legataj. Liaj respondoj aprobis iliajn adoradon al Kristo kaj donis konsilojn por ilia savo: ilin admonis ne estimi gravaj la tiuvivajn okazaĵojn, sed prefere rememori pri la estonta juĝo kaj konsideri, ke ununura Kristo estas imperiestro vera kaj eterna; postulis, ke ili amu la homojn kaj prizorgu justecon kaj povrulojn.

La imperiestroj ĝojis ricevante liajn leterojn. Tiel Antono estis tre amata de ĉiuj kaj ĉiuj petis permeson nomi lin sia patro.

82. Vizio de Antono pri la atakoj de Arianoj

Konite, tial, kiel tia kaj tiel respondinte al tiuj kiuj venis lin viziti, Antono denove retiriĝis en la supera monta zono. Li sin dediĉis al sia askezo, sed ofte, sidinta aŭ promene, silentis kun la vizitantoj, kiel estas skribate pri Danielo¹⁸²; kelkan horon pli malfrue, li reprenadis la konversacion kun la kunfratoj ĉe li ĉeestantaj. Tiuj ĉi ofte perceptis, ke Antono estis ricevinta vizion: ofte fakte, dum sia loĝado sur la monto, vidinte tion kio estis okazanta en Egiptujo, tion li rakontis al episkopo Serapiono¹⁸³, kiu starante sur la sama monta zono, vidis Antonon absorbita en la vizio.

Iun tagon, dum sidado en la laborejo, li, kvazaŭ absorbita en ekstazo, dumvizie¹⁸⁴, elmetis grandajn suspirojn. Unu horon poste, li sin turnis al la ĉeestantaro kaj, ekstremante, leviĝis por preĝi, poste, genuiĝinte, restis tiel longatempon. Fine la maljunulo leviĝis plorante. Tiam, kaptite de tremo kaj granda timo, la ĉeestantaro petis, ke li ilin informu kaj tiom insistis ke, devigite, li parolis.

Tial, kun grandaj suspiroj, li ilin alparolis. “Filoj miaj, plejbone estus morti antaŭ ol okazos tio kion mi vidis”. Kaj ĉar tiuj denove petis, li diris larmante: “La kolero estas ekposedanta la Eklezion kaj tiu ĉi ekliveratas al homoj similaj al senraciaj bestoj. Mi vidis fakte la manĝotablon de la Sinjoro kaj tute ĉirkaŭe de ĝi mulojn piedsvingantaj kontraŭ tiuj kiuj staris apud la manĝotablo, same

¹⁸¹ Heb 1,2

¹⁸² Dan 4,19

¹⁸³ Spirita gvidanto de grupo de monaĥoj, tiu Serapiono surpenints la episkopan taskon por la urbo Timuiso, en la Malalta Egiptio antaŭ la jaro 339. Iuj kristanaj verkistoj, inter kiuj Hieronimo, lin priskribas kiel erudician kaj elokventan personon. Ni scias, el aliaj fontoj, ke li estis devigita lasi laŭ kelke da tempo la episkopan sidejon pro la atakoj de Arianoj. Aŭtoro de verko kontraŭ la manikeismo, Serapiono famiĝis precipe pro kolekto de liturgiaj preĝoj, kiu estiĝas hodiaŭ grava fonto por la historio de la liturgio de la unuaj jarcentoj.

¹⁸⁴ Tiu ĉi vizio de Antono estas menciita ankaŭ de Johano Krizostomo.

kiel ili farus koleriĝintaj en malordo. Vi certe perceptis - li diris - kiel mi suspiris; mi aŭdis voĉon diranta. «Mia altaro estos malpurigata»¹⁸⁵. Tio estas kio la maljunulo vidis.

Du jarojn poste realiĝis la nuna atako de Arianoj¹⁸⁶ kaj la disrabado de la preĝejoj, kial tiuj ĉi rabadis perforte la sanktan ilaron kaj ĝin rabadigis de paganoj kaj kiam ili devigis ĝuste la paganojn, ke ili forlasu siajn laborojn kaj kuniĝu kun ili kaj en ties ĉeesto faris el Sinjora manĝotablo kion ili volis. Tiam ni ĉiuj rekonis, ke piedbatoj de la azenoj antaŭanoncis al Antono, ke nun la Arianoj agas senracie, same kiel la bestoj.

Ĝus vidinte tiaĵojn, Antono admonis la ĉeestantaron per tiuj vortoj.

“Ne senkuraĝiĝu, filoj miaj¹⁸⁷; same kiel la Sinjoro koleriĝis, tiel denove li resanigu¹⁸⁸. Kaj denove la Eklezio retrovos baldaŭ sian ordon kaj sian kutiman brilon, Kaj vi vidos la persekutitojn reveni al sia antaŭkondiĉo kaj la malpieco retiriĝi denove en siajn fosaĵojn dum la vera kredo esprimiĝos ĉie en tuta libero.

“Ke almenaŭ vi ne vin lasu malpurigi per la kontakto kun Arianoj, ĉar ties doktrino ne devenas el la apostoloj, sed el demonoj kaj el ilia patro, la diablo, kaj estas evidente sena je racio (nome Logoso), sterila kaj propra de penso nekorekta, same kiel la stulteco de la muloj”¹⁸⁹.

83. Promesoj de la Sinjoro koncerne miraklojn

Tia la vivo de Antono. Ni tamen ne devas rifuzi kredi, ke pere de unu homo realiĝis mirakloj tiom grandaj. Kaj fakte la promeso de la Savinto diranta: “Se vi havas fidon granda kiel sinapa semero, vi diros al tiu ĉi monto: ‘formoviĝu’ el tiu loko, kaj tiu delokiĝos. Kaj nenio estos por vi neebla”¹⁹⁰. Kaj plue: “Vere, vere mi diras al vi, se vi preĝpetu ion de la Patro en mia nomo, Li tion al vi donos. Preĝpetu kaj vi akiros”¹⁹¹. Kaj estas ĝuste Li kiu diras al siaj disĉiploj

¹⁸⁵ Mt 1,7

¹⁸⁶ Eble temas pri la konflikto de 336/7, dum kiu Atanazio, eskapite atencon en februaro de 337, rifuĝis ĉe la monaĥaro de la Alta Egiptio.

¹⁸⁷ Kol 3,21

¹⁸⁸ Ijob 5,18

¹⁸⁹ Spertuloj pri antikva kristana verkaro rimarkigas, ke la difino pri la ariana doktrino kiel alogos ἀλογος, nome “sena je racio” povus esti aranĝo, en la stilo de Atanazio, de vortoludo eluzanta la duoblan signifon de la lesikaĵo. En la kristana lingvaĵo, fakte, tiu lesilaĵo “alogos” (littersence “senracia”) oftas kaj ŝprucigas la signifon “sena je racio” ĝuste rilate al Arianismo, kiu ne rekonis al Jesuo, Vorto (Logos) de Dio, la dian naturon. Cetere, Atanazio ludas sur la ambigueco de la termino “alogos” jam en *Contra Gentes* 19 kaj 26.

¹⁹⁰ Mt 17,20

¹⁹¹ Jo 16,23s

kaj al ĉiuj kredantoj je Li: “Malsanulojn sanigu, demonojn elpelu, donace vi ricevis, donace donu”¹⁹².

84. *Eĉ juĝistoj iris ĉe Antonon*

Antono, tial, sanigis ne ordonante, sed preĝante kaj alvokante la nomon de Kristo, tiel ke evidentiĝis al ĉiuj, ke estis ne li la aganto, sed Kristo, kiu pere de Antono manifestis sian amon al homoj kaj sanigis malsanulojn.

Propraj de Antono estis nur la preĝo kaj askezo, por kiuj li restis sidinta sur la monto; li ĝojis je kontemplo pri diaj aferoj, sed suferis pri ĝenoj kaŭzitaj de la multo da vizitantoj kaj pri la devo malsupreniri al la malsupera parto de la monto.

Ankaŭ juĝistoj amase petis, ke li descendu de la monto, ĉar por ili ne eblis supreniri pro la ĉeesto de tiuj kiuj gardis la akuzitojn. Ili tamen lin petegis veni ankaŭ por ke ili povu lin vidi. Antono rifuzis iri ĉe ilin, sed tiuj persistis kaj plue aŭdace sendis la akuzitojn sub soldata eskorto por ke li malsupreniru almenaŭ altirita de ties aperiĝo.

Ĉiam li sentis penon vidante, ke ili ĝemas, kaj tiam malsupreniris al la malsupera monta zono. Denove esti ĝenata estis ne senutile, ĉar lia veno al multaj inspiris avantaĝon kaj helpon. Antono helpis ankaŭ al juĝistoj konsilante, ke ili preferu justecon ĉiukaze, timu Dion kaj estu konsciaj pri la fakto, ke mem estos juĝataj per la sama juĝmezuro per kiu ili juĝas¹⁹³. Super ĉio li ŝatis sian restadon sur la monto.

85. *Soleco estas por monaĥo kio la maro estas por fiŝoj*

Iam, ĉar li estis tiom premita flanke de lin bezonintoj kaj la armeoestro estis insiste lin invitinta malsupreniri, li, fine alveninte, restis ĉe li nur malmulte da tempo konversacianta pri tio kio koncernas la savon kaj pri personoj bezonantaj, poste haste retiriĝis. Ĉar la *dux* (tia estis lia titolo) lin invitis pluresti kun ili, li respondis, ke al li ne eblis pluresti kaj provis tiun persvadi per sprita ekzemplo: “Kiel fiŝoj mortas se ili restas longtempe sur sekigita tero, tiel la monaĥoj, kunparolante kaj malfruante ĉe vi, spirite febliĝas. Necesas, tial, ke same kiel fiŝaro al la maro, same ni hastu reiri al la monto por ke, plurestante for, ni ekforĝesu pri la aferoj de la spirito”.

Aŭdinte tiaĵojn kaj multajn aliajn samspecajn, la armeoestro miris kaj diris, ke vere tiu ĉi estis servisto de Dio. De kie fakte venis tia kaj tiomgranda inteligento al homo neklariĝinta, se mem ne estas amata de Dio?”.

86. *Antono antaŭanoncas la morton de Balacios*

¹⁹² Mt 10,8

¹⁹³ Mt 7,2

Oficiro, nome Balacios¹⁹⁴, kruele persekutis nin kristanojn pro zorga sindoniĝo al la neŝatindaj Arianoj. Ĉar li estis tiom bestia ĝis batigi virginojn kaj senvestigi kaj vipigi monaĥojn, Antono al li skribas kaj sendas leteron jentonan: “Mi vidas ekfalanta sur vin la dian koleron. Ĉesu persekuti kristanojn, se vi ne volas, ke la dia kolero vin frapu, ĉar jam ĝi estas vin atinganta”¹⁹⁵. Balacios ekridis, ĵetis teren la leteron kaj tuj, post sputado sur ĝin, mistraktis la liverintojn de ĝi, ordonante, ke ili jenon raportu al Antono. “Ĉar vi tiom protekte prizorgas monaĥojn, nun mi senprotekte ekprizorgos vin”.

Ne pasis kvin tagoj, ke la dia kolero lin pikis: ĝuste Balacios kun Nestorio¹⁹⁶, urba prefekto, estis irantaj en la direkton de la unua monaĥejo de Aleksandrio, nomata Kaireos¹⁹⁷, kaj ambaŭ rajdis sur ĉevaloj (apartenantaj al Balacios kaj ili estis la plej obeemaj el tiuj de li breditaj). Sed ne jam ili atingis la celatan lokon, kiam la ĉevaloj komencis ludi inter si, kiel kutime, kaj abrupte la plej malsovaĝa, sur kiu rajdis Nestorio, ĵetis teren Balacios lin mordante, plonĝis sur lin, disŝiris lian femuron per dentoj, tiel ke li estis tuj veturigita urben, mortis post tri tagoj kaj ĉiuj miris, ke la antaŭanonco de Antono faktiĝis tiom baldaŭ.

87. Kiu vizitis Antonon rehejmiĝas transformitaj en la animo

Tiel li admonis la plej kruelajn. La venintojn lin viziti, male, li instigis tiamaniere, ke ili tuj forgesis jurajn kverelojn kaj proklamis beataj tiujn kiuj retiriĝis el tiu ĉi vivo. Antono defendis la suferantojn pro maljusteco tiamaniere, ke ŝajnis, ke la suferanto estis li mem. Li estis tiel lerta avantaĝigi ĉiujn, ke multaj el la ŝtataj funkciuloj¹⁹⁸ kaj el jam akirintoj de multe da posedaĵoj rezignis la pezojn de sia vivo kaj fariĝis monaĥoj. Vere Dio donis Antonon kiel kuraciston al Egiptujo.

Kiu, fakte, afliktita pro sufero, alveninte al li ne revenis ĝojplena? Kiu veninta por plori siajn forpasintojn kaj tuj ne lasis malantaŭ si afliktiĝon? Kiu venis en kolero kaj ne revenis en amikeco? Kiu povrulo, de li konsolita, aŭdinte kaj vidinte Antonon, ne ekmalŝatis riĉecon kaj sin konsolis en sia povreco? Kiu monaĥo, jam neglektiĝinta, lin atinginte, ne plidiligentiĝis? Kiu junulo, veninte al la monto kaj vidinte Antonon, ne tuj rezignis siajn plezurojn kaj ne ekamis la moderon? Kiu veninta al li, ĉar turmentita de demono, kaj ne trovis ripozon? Kiu fine venis, maltrankviliĝinta en siaj pensoj, kaj sereniĝinta en sia animo ne rehejmiĝis?

¹⁹⁴ Palacios okupis oficon de *dux* en Egiptujo de 340 al 345.

¹⁹⁵ Tiu epizodo estas raportata, sed leĝere malsame, ankaŭ en alia verko de Atanazio. La malsameco inter la du tekstoj eksplikiĝas per la malsamaj celoj al kiuj direktiĝas la verkoj.

¹⁹⁶ Nestorio posteulis Balacios kiel *dux* de 345 al 352.

¹⁹⁷ Urbo de la Malalta Egiptio, situanta ĉirkaŭ tridek kilometrojn de Aleksandrio.

¹⁹⁸ Propre στρατευόμενοι (=strateuōmenoi) signifas “esti soldatoj”.

88. Ĉiuj konsideras Antonon kiel patron

En la askezo de Antono graviĝis ankaŭ jeno: ĝuante je la karismo, kiel jam dirite, de la ‘distingo de la spiritoj’, li intuiciis ties movojn kaj la intrigojn tra kiuj ĉiu impete kaj zorge direktiĝas. Kaj ja ne nur li ne sin lasis moktrompi de tra ĝin enplektiĝintoj, sed eĉ instruis tiujn en tia stato pense kaptitajn kiel ili povus devoĵigi iliajn entrudiĝojn, eksplikante iliajn ruzecojn kaj la defendeblecon kontraŭ ilia enŝteliĝo. Ĉiu, tial, kvazaŭ de li pretigita por la lukto, engaĝigis en la batalo, ardo-plena kontraŭ la intencoj de la diablo kaj de ties demonoj. Kiom da fraŭlinoj, kvankam jam svatiĝintaj, post renkontiĝo kun Antono, eĉ nur el fore, restis needzinaj pro amo al Kristo?

Al li venis ularo el foraj landoj; kaj tiuj, kiel ĉiuj, rehejmiĝis jam akirintaj avantaĝon, kvazaŭ ili estus gviditaj de patro. Fakte, kiam li mortis, ĉiuj kiel orfoj senigitaj el patro konsoliĝis nur per la rememoro pri li, tenante fiksitaĵ en sia menso liajn admonojn kaj instigojn.

89. Lasta vizito de Antono al la kunfratoj

Justas, ke mi remorigu kaj ke vi, kiuj tion deziras, aŭskultu pri kia estis la fino de lia vivo. Eĉ tio fakte indas esti imitata.

Kiel kutme li vizitis la monaĥojn loĝantajn en la malsupera monta zono. Antaŭsciiginte, intervene de la Providenco, pri sia morto, dum konversacio kun la kunfratoj li informis. “Ĉi-foja estas la lasta vizito kiujn mi faras kaj mi mirus se ankoraŭ ni nin revidos en tiu-ĉi vivo. Tempo estas, ke mi foriru¹⁹⁹, ĉar mi aĝas centkvinjare”. Tion aŭdinte, ili ekploris kaj ĉirkaŭpremis kaj brakumis la maljunulon. Sed tiu, kvazaŭ mem forlasus fremdan urbon por reveni al la sia, parolis ĝoje kaj ilin instigis ne regresi pro la klopodaj penoj kaj ne senkuraĝiĝi en la askezo; sed sin konduti kvazaŭ oni “devus morti ĉiutage”²⁰⁰.

Kiel mi diris, li ilin stimulis zorge gardi sian animon el malĉastaj pensoj kaj imiti la sanktulojn, ne alproksimiĝi al la skismemaj Melecianoj (“vi scias fakte, ke ilia doktrino estas malbona kaj malsaĝa”), ne havi komunaĵojn kun la Arianoj, ĉar ilia malpieco evidentas al ĉiuj.

“Se vi konstatos, ke juĝistoj ilin defendas, ne maltrankviliĝu: ilia agado ĉesos, ĝi estas mortiga kaj kurtadaŭra. Estante vi pli purigitaj, vin gardu, tial, de tiuj, konservu la tradiciojn de la patroj kaj super ĉio la pion al nia Sinjoro Jesuo Kristo, la fidon kiun vi alprenis el la Skriboj kaj kiun ofte ankaŭ mi al vi rememoris”

¹⁹⁹ Tm 4,6

²⁰⁰ 1 Kor15,31

90. Antono kondamnas la funebrajn kutimojn de Egiptanoj

Ĉar liaj kunfratoj provis lin konvinki resti ĉe ili kaj tie lasi finiĝi sia vivo, Antono (kiel montris li mem per silento) tion ne akceptis, kaj pro ego da motivoj, sed ĉefe pro jeno: egiptanoj, kiam mortas zorgoplenaj homoj kaj super ĉio sanktaj martiroj, emas ilin honori per funebroj kaj envolvas la korpojn en linteksaĵoj: ilin ne lokigas subteren, sed kuŝigas sur litojn kaj konservas ĉe si²⁰¹, opiniante per tia maniero plejhonori la forpasintojn. Ĉi-koncerne, Antono ofte petis, ke ankaŭ la episkopoj sugestu normojn al la popoloj.

Li sentis pro tio honton eĉ antaŭ laikoj kaj riproĉis virinojn dirante, ke tia uzanco ne laŭis leĝe nek sankte. “La tomboj de Patriarkoj kaj profetoj estis konservitaj ĝis nun, eĉ la korpo de la Sinjoro estis entombigita kaj ŝtono antaŭmetita ĝin kaŝis, ĝis kiam ĝi resurektis la trian tagon”.

Per tiaj vortoj pruvis, ke kiu ne entombigas, postmorte, la korpojn de la forpasintoj, eĉ se temus pri la korpoj de Sanktuloj, agas kontraŭ la leĝo. Kion fakte oni trovas pli sanktan ol la korpon de la Sinjoro? Multaj, tial, post tia lia admono, de tiam deponis la mortintojn subteren kaj dankis al la Sinjoro pro tio, ke ili estis tiel sufiĉe instruitaj.

91. Lastaj rekomendoj de Antono

Sed Antono, spertinte tian uzancon kaj timante, ke tio povas okazi ankaŭ al sia korpo, post la adiaŭaj diroj adresitaj al la monaĥoj troviĝantaj en parto ekstera de la monto, hastis foriri. Alveninte al la interna monto, kie li kutimis retiriĝi, malsaniĝis kelkajn tagojn poste. Li alvokis tiujn kiuj estis ĉe li (estis du kiuj daŭre restis en la interna monto, praktikante tie la askezo ek de dekkvin jaroj kaj serviste zorgante pri li ĉar jam maljuniĝanta) kaj diris:

“Mi, kiel estas skribite, «estas trakuranta la straton de la Patroj»²⁰²; mi vidas, fakte, ke la Sinjoro estas min alvokanta. Vi male daŭrigu vigli kaj ne lasu, ke via askezo ŝrumpu, kiu daŭras tiom delonge; kaj kvazaŭ vi komencus nur nun, prizorgu konservi vian fervoron. Vi konas la demonojn kaj ties atakojn, vi konscias kiom ili estas ferocaj kvankam feblaj en siaj potencoj. Vi ne ilin timu, tial, sed respiru ĉiam Kriston kaj kredu je Li kaj vivu kvazaŭ vi devus morti ĉiutage, zorgante pri vi mem kaj rememorante pri la admono kiujn vi aŭdis de mi.

²⁰¹ Aludo al kutimo konservi en hejmoj la mumiojn.

²⁰² Gn 23,14; 1 Rĝ 2,2. Studuloj pri tio rimarkigas, ke tiuj lastaj vortoj de Antono diversanalogie similas al tiuj eldiritaj de Pacomio antaŭ ol li mortis: troviĝas jen la referencaĵoj al tie cititaj el la Malnova Testamento jen la invito rememori la instigojn jam semitajn en la kunfratojn jen la admono ne sin lasi trompi de la falsaj doktrinoj de herezuloj kaj skimemuloj. Temas, do, pri Agiografia “konstanto”.

“Ne konatiĝu kun skismuloj, nek kun herezaj Arianoj, Vi scias fakte kiel ankaŭ mi ilin evitis pro ilia doktrino erariga kaj batalanta Kriston. Atentigu vin prefere adheri ĉiam pli al la Sinjoro, unuazorge, kaj poste ankaŭ al la sanktuloj, por ke, post via morto, tiuj vin ricevu, kiel amikoj kaj parencoj, en la eternaj tendoj. Pensu kaj pripensu pri tio!

“Kaj se vi intencas prizorgi min kaj rememori pri mi kiel pri patro, ne permesu, ke iu ajn portu mian korpon al Egiptujo por ke ĝin oni konservu en sia domo: por evitigi tion mi supreniris tien-ĉi. Vi scias ankaŭ kiel mi ĉiam riproĉis tiujn kiuj praktikas tion, kaj kiel ilin instigegis forlasi tian moron.

Tial entombigu vi mian korpon kaj deponu ĝin subteren, estu obeata de vi tio kion mi diris, tiel ke neniu, krom vi du, konu la lokon de la entombigita mia korpo. Ĉe la resurekto de la korpoj, fakte mi ĝin ricevos senkorupta flanke de la Savinto.

Disdonu tiel miajn vestaĵojn: al la episkopo Atanazio donu unu el miaj melotoj²⁰³ kaj la mantelon sur kiu mi kutimis kuŝi, nome la sama kiun li donis al mi kaj kiun mi uzis. Al la episkopo Serapiono liveru la alian meloton. Se io ankaŭ al vi, vi tenu mian fibran veston. Kaj nun adiaŭon, filoj miaj! Antono pasas al la alia loko kaj ne plu estas kun vi”.

92. Morto de Antono

Tion dirinte, kaj post kiam li estis brakumitaj de tiuj, Antono etendiĝis sur la lito, kaj, kvazaŭ vidante amikojn venantajn direkte al li, ĝojplena pro ties ĉeesto (estante fakte sternita, kun la vizaĝo ĝuece absorta), mortis kaj kuniĝis ankaŭ mem al la patroj²⁰⁴.

Se ion diri pri la prizorgintoj, tiuj ĉi, laŭ la dispozicioj de li siatempe liveritaj, lin funebriis, envolvis en linaĵoj kaj enterigis lian korpon: neniu ĝis nun scias kie li estis deponita, krom tiuj du.

Ĉiu el tiuj kiuj estis ricevintaj meloton apartenintan al la beata Antono kaj la mantelon de li uzitan, tiujn ili konservis kiel grandvalorajn objektojn: tiaĵon vidante, ili sentas sin kvazaŭ vidantaj Antonon kaj, ilin surmetinte, kvazaŭ stampitaj sur si liaj rekomendoj.

93. Lasta portreto de Antono

Tiu ĉi estis la rakonto pri la fino de la surtera vivo de Antono kaj tiu²⁰⁵ la komenco de lia askezo. Kaj kvankam tiuj okazaĵoj (kiujn mi al vi rakontis) malmultas se komparataj kun lia virto, el tiuj juĝu vi mem kia estis tiu homo

²⁰³ Tipa surtuto el ŝafa felo

²⁰⁴ Je imito de la morto de Moseo

²⁰⁵ La verko estas ideale dividita en du partoj, la unua rilatas al lia eksindediĉo al la askezo, la dua al la finiĝo de lia vivo.

de Dio, nome Antono, kiu ekde sia ekjuneco ĝis la malfrua aĝo konservis la saman ardon en la askezo, nek estis venkita, pro maljunaĝo, de la deziro pri nutraĵoj pli delikataj, nek variis, pro sia fizika febliĝo, siajn askezecan vestaĵon aŭ la kutimon bani per akvo nur la piedojn, kaj malgraŭ tio li sin konservis sana.

Li havis, fakte, la okulojn integraj kaj akutvidaj ĉar li vidis bone, kaj neniam el li falis dento: dentaro estis konsumitaj nur nivele de gingivoj pro la grandaĝo de la maljunulo; liaj piedoj kaj manoj konserviĝis sanaj kaj li aperis absolute pli disradiana kaj arde forta ol ĉiuj kiuj sin traktis per diversa nutro kaj kutimas sin bani diversmaniere kaj sin vesti pli taŭge.

Estas signoj de lia virto kaj de amikeco de lia animo kun Dio esti celebrata ĉiuloke, estimata de ĉiuj kaj dezirata ankaŭ de tiuj kiuj neniam estis lin vidintaj, Antono, fakte, famiĝis ne pro verkoj, nek pro profana saĝo, nek pro kelkaspeca arto, sed pro la nura pieco al Dio. Neniu povus nei, ke tio estis dia donaco. Kiel eblus aŭdi paroli pri tiu homo, kaŝita kaj sidinta sur la monto, ĝis Hispanio kaj Galio, Romo kaj en Afriko se ne intervenus Dio mem konigi ĉie homojn al li devotajn kaj promesi ĝuste tion al Antono ekde la komenco? Malgraŭ ke tiaj homoj agas en la silento kaj volas resti ignoritaj, la Sinjoro ilin laŭtigas al ĉiuj kiel flamon, por ke eĉ tiel la aŭdantoj paroli pri ili rekonu, ke eblas plenumi la ordonojn ĝis gajni perfetiĝon kaj povu akiri la fervoron por trakuri la vojon kondukantan al la virto.

94. La legado de la vivo de Antono utilas al ĉiuj

Legu, tial, tiaĵojn antaŭ la aliaj kunfratoj, por ke ankaŭ ili lernu kia devas esti la vivo de monaĥoj²⁰⁶ kaj estu konvinkitaj, ke la Sinjoro kaj Savinto Jesuo Kristo glorigas²⁰⁷ tiujn kiuj lin glorigas. Li ne nur enirigas en la ĉielregnon tiujn kiuj Lin servas ĝis la fino, sed, pro ilia virto kaj edifo por la aliaj, ankaŭ manifestigas kaj igas ĉiuloke renomaj tiujn kiuj sin kaŝas kaj klopodas travivi retirĝeman vivon.

Se necesus pludiri, legu tiaĵojn ankaŭ al paganoj por ke eĉ ili rekonu jenon: ke nia Sinjoro Jesuo Kristo estas Dio kaj Difilo; ne nur tio, sed ke tiuj kiuj Lin sincere servas kaj pie kredas je Li, nome la kristanoj, ne limiĝas alerti pri demonoj²⁰⁸, kiujn la paganoj mem taksas kiel diojn dum ili tiaj ne estas, sed ankaŭ ilin tretas kaj forigas kiel trompantojn kaj koruptantojn de la homaro, helpe de Jesuo Kristo nia Sinjoro, «al kiu estu la gloro en la jarcentoj de la jarcentoj. Amen»

²⁰⁶ Ne forfuĝu, ke la verko estas preskaŭ letero sendita al la okcodentaj monaĥoj.

²⁰⁷ 1 Sam 2,30. La samo estas paŭsata en la rakonto pri la vivo de la preskaŭ samtempa S. Pakonio.

²⁰⁸ Revenas la komenca temo: la paganoj estis obsedataj pro la penso de la ĉeesto de demonoj. La kristanoj antaŭ ĉio prizorgas certigi, ke eĉ la demonoj estas subigitaj al la dia volo kaj devigitaj obei al Kristo!

Indekso

Antaŭparolo

Enkonduko.

1. Naskiĝo kaj junaĝo de Antono.
2. La evangeliaj vortoj pri la perfektigo lin altiras al konvertigo
3. Komenciĝo de la askezo
4. Antono sin dediĉas al la askezo imitante la virtojn de la ermitoj.
5. La diablo engaĝiĝas por ke li rezignu la askezan vivon.
6. La diablo al li aperas subaspekte de nigra infano.
7. Antono fortigas sian askezon
8. Antono, enfermita en tombo-ĉambro, estas sturmata de la diablo
9. La demonoj sturmas Antonon subaspekte de sovaĝaj bestoj
10. La Sinjoro alkuras helpi Antonon
11. Antono pli insistas en sia askezo en la dezerto
12. Antono establas sia loĝejon en fortreso
13. Pluaj bataloj kontraŭ demonoj
14. Portreto pri Antono post kiam li devis forlasi sian rifuĝejon
15. Antono fariĝas kiel patro por la najbaraj monaĥoj
16. Parolado de Antono al la monaĥoj pri la klopodoj por vivi askeze
17. Instigo ne sopiri grandajn entreprenojn
18. Instigo al la persistemo ...
19. Ni travivu kvazaŭ ni devas morti ĉiutage ...
20. Animo kaj virtoj ...
21. Ni luktu kontraŭ la demonojn ...
22. Nepras koni iliajn movojn ...
23. La demonoj provas trompi ĉiurimede
24. Oni ne timu la demonojn ĉar ili estas malfortaj
25. Oni ne maltrankviliĝu pro iliaj insidoj
26. La demonoj foje ŝajnigas aserti la veron por pli facile nin allogi
27. Ni ne aŭskultu la demonojn ĉar ili nin trompas
28. La demonoj perdis ĉiun sian povon post la alveno de Kristo
29. La diablo ne havas povojn se ne tiujn al li konceditajn de Dio
30. Askezo kaj virto: du fortegaj armiloj kontraŭ la demonoj
31. Ni ne aŭskultu la antaŭdirojn de la demonoj ĉar senfundamentaj
32. La demonoj antaŭanoncas kion ili jam vidis
33. La demonoj konjektas, ne antaŭscias.
34. profetecdonu postulas puran koron
35. Kiel distingi la spiritojn bonajn el la spiritoj malbonaj

36. Signoj montrantaj la ĉeeston de spiritoj bonaj kaj malbonaj
37. La Sinjora ekzemplo
38. Forigi la demonojn kaj sanigi estas donacoj de la Sinjoro
39. Antono rakontas sian sperton pri la demonoj
40. Antono forigas la demonojn per la helpo de Kristo
41. Satano venkita de la monaĥoj
42. La demonoj foriĝas se ni montras ne ilin timi
43. Ni demandu la estulojn aperigantajn
44. La ĉiela urbo en la dezerto
45. Necesas prizorgi pli la animon ol la korpon
46. Antono asistas suferantojn pro martiriĝo dum la persekuto de Masimino
47. Reveninte al sia ermita loko, Antono pliintensigas sian askezon
48. Saniĝo de demonposedato
49. Antono serĉas la solecon por forfuĝi la homamason
50. La monto en la interna dezerto
51. Pluaj luktoj de Antono kontraŭ la demonoj
52. Antono evitas la insidojn de la diablo
53. Fuĝo de la demonoj
54. Interveno de la Sinjoro sekve de la preĝoj de Antono
55. Admonoj al la monaĥoj
56. Permane de Antono la Sinjoro sanigas malsanulojn
57. Saniĝo de Frontono, grava ŝtatfunkciulo
58. Saniĝo de junulino de Busiris
59. Ravelo pri du fratoj en la dezerto
60. Antono kontemplas la ascendon al la ĉielo de la animo de Amoun
61. Saniĝo de virgino Polikracia
62. Antono scias anticipe kiu estas lin venanta
63. Saniĝo de demonposedato
64. Saniĝo de alia demonposedato
65. Antono vidas sian animon supreniranta la ĉielon
66. Giganto provas malhelpi la ascendon de animoj al la ĉielo
67. Respektemo de Antono por la ĥierarkio
68. Antono instigas sin gardi de la herezuloj kaj skismuloj ...
69. Antono kontraŭ Arianoj de Aleksandrio
70. Aleksandrianoj admiras Antonon
71. Saniĝo de demonposedatino
72. Saĝo de Antono diskutanta kun paganaj filozofoj
73. Antono vekas miron ĉe lin vizitantoj
74. La enkarniĝo kaj kruco de Kristo. Spirito kaj animo

75. Mitaj rakontaĵoj kaj evangeliaj mirakloj
76. La paganoj, alegorizante la mitojn, adoras ne Dion, sed la kreitaron
77. Demonstro de la kredo ...
78. La kredo je Kristo
79. Disvastiĝo de kristanismo kaj dekadenco de paganismo
80. La miraklo en la nomo de Kristo pruvas la veron de la kredo
81. Antono ricevas leterojn el la imperiestroj
82. Vizio de Antono pri la atakoj de Arianoj
83. Promesoj de la Sinjoro rilate miraklojn
84. Juĝistoj vizitas Antonon
85. Soleco estas por monaĥoj kio la akvo estas por la fiŝoj
86. Antono antaŭanonce la morton de Balacios
87. La vizitantoj de Antono hejmen revenas transformitaj en la spirito
88. Ĉiuj konsideras Antonon kiel patron
89. Lasta vizito de Antono al la kunfratoj
90. Antono kondamnas la funebrajn kutimojn de Egiptanoj
91. Lastaj rekomendoj de Antono
92. La morto de Antono
93. Lasta portreto pri Antono
94. La legado de la vivo de Antono utilas al ĉiuj

